Esperanto-Muzik-Magazino

ROK-gazet'





Prof. Oumar Mba



Persone

Flávio Fonseca

KEF 5

EUROKKA
FR-31450 DONNEVILLE

NUMERO 8
Jaro 1997

ROK - gazet'n° 8

Administration-rédaction / administrejo-redaktejo :
ROK-gazet'
p/a EUROKKA
FR-31450 DONNEVILLE
Francio
Tel/faks : +33 5 61 81 95 65
Directeur de publication / eldondirektisto :
Floréal MARTORELL
Rédacteur en chef / ĉefredaktisto :
vaka posteno
Rédacteurs / redaktistaro :
Bertrando Albault
Solange ARAUJO
Yves BACHIMONT
Rafa BLANCO
Julio CALEGARI
Miquela CATLLA
Jacques CAUBEL
Francisco José DÁVILA DORTA
Michel DUC GONINAZ
Flo !
Tony GUYOT
JIANG Yunlin
Fred KEZAKO
Glebo MALCEV
António MARTINS
Floréal MARTORELL
Bruno MASALA
Ionel ONET
Manuel PANCORBO CASTRO
Andrzej PETTYN
RoKo
Arturo SARDÁ
Hubertus M. SCHWEIZER
Luit STAGHOUWER
Duncan THOMSON
Renée TRIOLLE
Saisie / enkomputiligo :
Bertrando ALBAULT
Rikardo CASH
Flo !
PAO / PKE :
Rikardo CASH
Mark EATON
Dessins / desegnoj :
Niko Kruela Devil', JMB, Max.
Photos / fotoj :
Axel BELINFANTE
Flo !
Expédition / ekspedo :
La Lletra A, Reus
Imprimerie / presejo :
Sacco
Distribution / distribuo :
Associations esperantistes / espasocioj
Dépot Légal à parution.
Edité par / eldonas :
EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio),
FR.31450 DONNEVILLE, Francio
Helpe de :
FAME-Fondajo
Eduka Fondajo Carson
EJF
(Eŭropa Junulara Fondajo/European Youth Foundation/Fonds Européen pour la Jeunesse)

MARK EATON
Graphic Design
+33 5 62 20 04 89

Atentu !

Abono validas por 4 numeroj, ne por unu jaro.

Abontarifoj
35 NLG
21 IRK (Internaciaj Respond-Kuponoj)
100 FRF por Francio
20 USD
16 EKU

Por netranspagpovaj landoj
20 NLG, 12 IRK, aŭ egalvaloro

Anoncetoj
Ĉiu linio kostas 6 FRF, 2 NLG, 1,5 IRK

La abono pagendas per
IRK
UEA-kodo rokk-b
internacia poŝtmandato je la adreso de EUROKKA
poŝtĉekkonto CCP TOULOUSE 5 460 70 W
FR 31900 TOULOUSE Cedex

Landaj kotizperantoj

Argentino
Roberto SARTORO
Casilla 344
AR 5000 CÓRDOBA

Aŭstralio
Libroservo de AŬSTRALIA Esperanto-Asocio
POB 230
MATRAVILLE, NSW 2036

Belgio
FLANDRA Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
BE 2000 ANTWERPEN

Brazilo
BRAZILA Esperanto-Ligo
Caixa Postal 03625
BR 70084-970 BRASÍLIA - DF

Britio
Esperanto-Asocio de BRITIO
140 Holland Park Ave.
LONDON, W11 4UF

Bulgario
Muzika Esperanto-Ligo
p/o Dimitŭr TERZIEV
ul. Milin Kamŭk 5B
BG 1421 SOFIA

Ĉeĥio
ĈEĤA Esperanto-Junularo
PS 1069
CZ 111 21 PRAHA

Ĉinio
WANG Xigen
Chizhou China Travel Service
15 Qiupu Road, Guichi City
CN 247 100 ANHUI

Danio
Libroservo de DANA
Esperanto-Asocio
p/o Wolfgang KIRSCHSTEIN
Hvedebjergvej 30
DK 8220 BRÅBAND

Germanio
Esperanto-Libroservo
Vera TAUTORAT
Prenzlauer Allée 87
DE 10450 BERLIN

Hispanio
Nikolao GIL
Postkoko 305
ES 24080 LEÓN

Hungario
Lingvo-Studio
Szolgáltató Iroda
PF 87
HU 1675 BUDAPEST

Italio
Mauro TAUZZI
Str. Rozzol 47
IT 34139 TRIESTE

Japanio
AKCP
ONO Takao
Kaziyaya-hyŝ 43-B
Sakae-gu
JP 247 YOKOHAMA-si

Jugoslavio
Renato PETROVIĆ
p/o SERBA
Esperanto-Junulara Organizo
Terazije 42
YU 11000 BEOGRAD

Kanado
KANADA Esperanto-Asocio
PO Box 2159
SYDNEY, BC V8L 3S6

Katalunio
Centro de Esperanto Sabadell
Apartat 407
ES 08200 SABADELL

Kroatio
KROATA Esperantista Unuiĝo
Marija BELOŠEVIĆ
Sveti Duh 130
HR 41000 ZAGREB

Litovio
Viktoras BANIULAITIS
I. Kanto 26-1
LT 5800 KLAIPĖDA

Norvegio
NORVEGA Esperanto-Ligo
Eldonejo Esperanto
Olaf Schous Vei 18
NO 0572 OSLO

Nov-Zelando
David RYAN
PO Box 3867
WELLINGTON 1

Portugalio
PORTUGALA Esperanto-Asocio
Rua Dr João Couto N6 R/C-A
PT 1500 LISBOA

Rusio
Libroservo de RUSIA Esperanto-Unuiĝo
Andrej LYSKOV
a/k 34
RU 117 071 MOSKVA

Slovakio
Stano MARČEK
Zvolenská 15
SL 03601 MARTIN

Svedio
SVEDA Esperanto-Federacio
p/o Lisbet ANDREANSSON
Södra Rörum PL 455
SE 242 94 HÖRBY

Usono
Esperanto-Ligo de NORD-AMERIKO
POB 1129
EL CERRITO, CA
94530

Ĉefartikolas Flo !

Ĉu vi pentas ?

Pli ol jaro pasis kaj ni esperas ke vi ne pentas aboni ***ROK-gazeton***. Dum tiom longa periodo plej riĉoplenaj aferoj okazis en la esporokmuzika mondo, kaj tio ebligis al ni kolekti amason da materialo per kiu ni volas ĝojigi vin. Vi povos legi ĉisekve pri relative multenombraj novaĵoj. Espomuziko rapide evoluas. Novaj artistoj aperas, aliaj malaperas, sed la kvanto kaj la kvalito konstante kreskas, tiel riĉigante espokulturon.

Tiu ĉi ***ROK-gazet'*** malfruegas pro diversaj kialoj: la preparo kaj distribuado de *Vinilkosmo-Kompil'* Vol. 2 forrabis multan tempon; kontribuoj por la *"Speciala Dosiero"* malakuratis; tradukoj kaj korektoj postulis tempon; novaj produktoj aperis lastminute kaj prokrastigis la recenzojn kaj la katalogon de VINILKOSMO; kontribuoj promesitaj por ***ROK-gazet'*** alvenis ege malrapide; ktp., ktp., ktp. Ĉio ĉi kunigita kulpas. Ni pardonpetegas pro tio al ĉiuj niaj fidelaj legantoj.-

Tutlaste EUROKKA decidis malfermi proprajn TTT-paĝojn, kie povos esti konsultitaj informoj, novaĵoj, la katalogo de VINILKOSMO kun muzikfragmentoj de la diversaj prezentitaj albumoj, ktp. Pri tiu freŝa projekto ni eklaboros dum 1997 tuj post apero de tiu ĉi 8a ***ROK-gazet'***.

Ceteraj informoj kaj projektoj de EUROKKA vi legos en la rubriko *"Rokagado"* .

Tiu ĉi numero de ***ROK-gazet'*** aperas parte per helpo de FAME-Fondaĵo, Eduka Fondaĵo Carson, kaj EJF (Eŭropa Junulara Fondaĵo) tra TEJO, kiuj subtenis finance la projekton de *Vinilkosmo-Kompil'* Vol. 2, kiu inkluzivas la *"Specialan Dosieron"* kaj la katalogon de VINILKOSMO aperantajn kun ĉi tiu 8a numero. Mi aparte volas danki pro ilia helpo en la *Vinilkosmo-Kompil'*-projekto **Saskian Idzerda**, **Annan Ritamäki**, kaj **Jeroenon Balkande**.-

Finante tiujn ĉi klarigojn, la tuta teamo deziregas al vi bonan roksomeron.

ENHAVO

★ **Teknologoj** * Espomuziko en Interreto * Triopa Liniaro * paĝo 4-5
★ **Recenzoj** * * paĝo 6
★ **Sonzinoj** * Sonmagazinoj * paĝo 7
★ **Kritikloj** * Muzikrecenzoj * paĝo 8-13
★ **Diskeldoneja Ĝangalo** * Disk - Novaĵoj * paĝo 14-16
★ **Malkovrindaĵo** * Rob de Nijs * paĝo 17-20
★ **Dosiero KEF 96** * Raportoj kaj Interviuoj * paĝo 21-29
★ **Pop- kaj Rokbandoj** * Novaĵoj pri Rok / Pop - Bandoj * paĝo 30-35
★ **Ĵazaĵoj** * Trattbandet - la "Funelbando" * paĝo 36
★ **Afrika Angulo** * Novaĵoj el Afriko * paĝo 37-38
★ **Muzikmovado** * Voyaĝo en Teknokernon * Brazila subgrunda scenejo * paĝo 39-41
★ **Malrokmuziko** * Ramona van Dalsem * Malroknovaĵoj * Malrokrecenzoj * paĝo 42-45
★ **Tute ne gravas...** * E-fika polemiko daŭras * Pri la superregado de la angla en rokenrolio, kaj 2 * paĝo 46-47
★ **Rokagado** * EUROKKA * paĝo 48
★ **Muzika Terminaro** * Instrumentoj kaj aliaj iloj - parto 4 * paĝo 48-49
★ **Radiologoj** * Radio-informoj * paĝo 50
★ **Haste-Klaĉe** * Roknovaĵoj * Rok-Reto-Anoncoj * paĝo 51-52

TEKNOLOGOJ

Teknologas Duncan THOMSON

Espomuziko en Interreto

Interreton (*Internet*) jam dum kelkaj jaroj uzas espistoj por propagandi kaj interkomuniki. La lastatempa apero de Tut-Tera Teksaĵo "TTT", *WWW* furorigas Interreton inter ĉiuj homoj. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj nur malgranda ono de homoj, kutime en universitatoj, havis aliron al la reto; sed nuntempe pli kaj pli da firmaoj kaj privatuloj havigis al si konekton.
Do kio estas tiu Tut-Tera Teksaĵo, kaj kiel ĝi rilatas al espo, kaj specife al espomuziko?

Kio estas TTT ?
Tut-Tera Teksaĵo estas metodo meti informojn (ĉu tekstajn, ĉu bildajn, ĉu filmajn, ĉu sonajn) en la reton en facile alirebla kaj komprenebla formo por kiu ajn homo. En tekston oni povas meti tiel nomatajn "hiperligojn" por aliri rekte alian tekston. Ene de la reto espistoj diversaj dum lastaj jaroj verkis TTT-paĝojn pri diversaj temoj, por neespistoj (por propagandaj celoj) kaj espistoj (serve al la espodiasporo kaj ĝia kulturo). El tiuj lastaj paĝoj inkluziviĝas paĝoj pri literaturo (tradukita kaj originala; proza kaj poezia), la Movado, radioelsendoj, kaj diversaj ikoj: gramatiko, erotiko, kaj kompreneble muziko.

Virtuala Esperanto-Biblioteko
Rilate muzikon, ekzistas diversaj paĝoj, sed la ĉefa estas parto de la tiel nomata Virtuala Esperanto-Biblioteko, kiu enkadrigas ligojn al paĝoj pri diversaj aferoj en unu indekson (la TTT-paĝoj mem, tamen, loĝas en malsamaj lokoj). Tie listiĝas multaj artistoj kaj grupoj espaj, kune kun listoj de muzikajoj, foje kun bildoj. Malfeliĉe, ĝis nun, mankas sona dimensio – kaj muziko ja estas kerne sono, ĉu ne? Espereble tio iam ŝanĝiĝos.
Krom tiuj centraj paĝoj, kiuj celas – tamen ne ĉiam sukcesas – aktuali kaj ĉionpriskribi, ekzistas personaj paĝoj de individuaj muzikgrupoj. Menciindaj el tiuj estas la paĝoj de **La Mevo** kaj **Persone** (se vi aliajn konas, sciigu al la aktualiganto de la centra paĝo). Krome, la agentejo de EUROKKA en Japanio havas TTT-paĝon, kvankam ĝis nun ne ekzistas oficiala TTT-paĝo por EUROKKA.
Resume, do, espo, kaj espomuziko ekzistas kaj vivas en la nova teknologio de Internet. Serĉu la koncernajn paĝojn per TTT-frandilo – adresoj uzindaj estas:

- **Virtuala Esperanto-Biblioteko** (VEB): http://www.cs.chalmers.se/~martinw/esperanto/veb/
- **Centra paĝo pri Esperanto-Muziko**: http://www.medc.paisley.ac.uk/~duncan/eo/muziko/
- **Japana Agentejo de EUROKKA**: http://www.bekkoame.or.jp/~taon/eurokka.html
- Paĝo de **La Mevo**: http://www.bekkoame.or.jp/~taon/lamevo.html
- Paĝo de **Persone**: http://www-dataphone.se/~bertilow/bertilo.htm

Redakcio & Abonoj :

Stano Marček
Zvolenská 15
SK-03601 Martin
Slovakio

Lastminute
EUROKKA decidis malfermi proprajn TTT-paĝojn, kie povos esti konsultitaj informoj, novaĵoj, la katalogo de VINILKOSMO kun muzikfragmentoj de la diversaj prezentataj albumoj, ktp. Pri tiu freŝa projekto ni eklaboros dum 1997 tuj post apero de tiu ĉi 8a ***ROK-gazet'***. Ceteraj informoj kaj projektoj de EUROKKA vi legos en rubriko *"Rokagado"*.

Artikolas JIANG Yunlin

Triopa Liniaro

Kiel konate, ordinara liniaro devas havi kvin liniojn. Ĉu vi scias ke ekzistas ankoraŭ pli scienca liniaro kun nur tri linioj?

Neceso reformi la kvinopan liniaron

Estas fakto ke la kvinopa liniaro havas sian avantaĝon. Sed, krom iuj fakuloj, tre malmultaj konas tiun ĉi notacion - ankaŭ tio estas fakto. Kial do? Ĉar oni nepre devas uzi multe da tempo kaj energio por vere posedi ĝin – kvankam iuj homoj ne volas agnoski la mankojn kiuj tute sensence malfaciligas la lernadon kaj uzadon. Kaj tiuj mankoj estas ne malmultaj:

1.Sama tono estas skribita jen sur linion, jen en interspacon.

2.Identa tono troviĝas en diversaj pozicioj en ĉiuj voĉpartoj.

3.En voĉparto la identaj tonoj ne respondas unu al alia.

4.La grupoj de gamo estas aranĝitaj en malsamaj pozicioj.

5.La skribmaniero de tonalsigno en la partliniaroj estas tre komplika kaj ĝena.

Se ni volas doni la muziknotacion al multnombra amaso, reformo estas neevitebla. Ĉu tiuj neraciajoj povus esti forigitaj kaj la liniaro simpligita? *"Jes"*, estas la respondo.

Kio estas Triopa Liniaro?

Se ni reduktus du liniojn el la kvinopa liniaro, ĝi do fariĝus triopa liniaro, eble en du tavoloj. Tiel ĝi ne nur ne perdos siajn originajn funkciojn, sed male aperos pli konciza, facile lernebla kaj uzebla. Ni nomas tiun ĉi novan notacion **Triopa Liniaro** anstataŭ sesopa, kvankam ĝi estas uzita plejofte en du tavoloj. La motivo estas ke ĝiaj esencaj linioj efektive estas tri, dum la ceteraj tri nur aldonitaj. La muziknotoj, silentoj, kaj aliaj koncernaj signoj, escepte de kelkaj, estas samaj kiel tiuj de la kvinopa liniaro.

Tia reformo aspektas eta, sed ĝia efiko ja estas granda. Projekti laŭ la septona gamo estas la sekreto. Ĉi tiu notacia sistemo havas sep partiliniarojn, povante enteni naŭ oktavojn, t.e. sesdek tri tonojn. La komenca tono de G-parto estas centra C.

Ĝia karakteraĵo

1.En paragrafa formo: Po tri linioj paralelaj egaldistancaj konsistigas ĉiun paragrafon.



2.Tono sama, pozicio sama: Ĉu en sama, ĉu en malsama voĉparto, ĉiu tono staras en konstanta pozicio.

3.Speciala krominterspaco: Unua krominterspaco, fakte apartenante al alia paragrafo, devas esti larĝigita je duono de ordinara por enteni du malsamajn tonojn.

4.Elasteco: Ĝiaj kromlinioj povas uziĝi libere, metite fikse aŭ pase. Kiam aperas du tavoloj, tio signifas ke la liniaro estas kun tri fiksaj kromlinioj. Kaj tono C povas moviĝi laŭokaze. Alivorte, estas cirkule ruligeblaj la linioj de du tavoloj, celante noti pli oportune, precipe por muziko instrumenta.

Kompare kun la kvinopa liniaro

Oni povas facile trovi la avantaĝojn de **Triopa Liniaro**.

1.Tonnomo (notnomo) aŭ gamo ĉiam estas en respektive fiksa pozicio, ĉu leviĝinte ĉu malleviĝinte je kiomoktavo.

2.Pozicioj de propraj duontonoj estas nevariaj kaj troveblaj tre facile. Ili estas nur du.

3.La almontro de dieso aŭ bemolo estas evidenta kaj klara en la tuta amplekso de partliniaro.

4.En diversaj partliniaroj la pozicio de tonalsigno estas tute sendiferenca.

5.La komponado de klavoj de piano povas esti klare spegulita.

6.Ankaŭ la ligo de kordoj de violono povas esti spegulita. La pozicio de komenca tono de la kvar kordoj estas nature responda unu al la alia pare.

Epilogo

Kiel facile! Vi scipovos legi ĉiujn partliniarojn kondiĉe ke vi scipovis legi unu. Sed tio ne eblas absolute en lernado de la kvinopa liniaro. **Triopa Liniaro** povas malpezigi la amasan ŝarĝon lerni muzikaĵojn kaj instrumentojn, povas diskonigi kompleksajn kompoziciojn vaste kaj rapide. Unuvorte, ĝi estas favora al la polularigado de muziko. Ni povas diri ke **Triopa Liniaro** en unu tavolo estas pafilo, dum en du tavoloj kanono. Sekve de tio, ĝi povas iri tra la mondo, nur per kelkaj simplaj klarigoj.

Lanĉi **Triopan Liniaron** ne malhelpus tiujn sciantajn kaj uzantajn la kvinopan liniaron. Ĉar ili povas legi **Triopan Liniaron** bezonante apenaŭ denove lerni, tuj kiam ili vidas ĝin. Ĉi tiuj du liniaroj povas ekzisti samtempe. Oni elektu per kompare en la praktikado.

Por pluaj informoj kaj interŝanĝoj de ideoj kaj spertoj pri tiu ĉi temo, bonvolu kontakti:

s-ro JIANG Yunlin
1-404 Guangda Lu 335
CN 350 004 FUZHOU
Ĉinio

Kunhistoriumas Tony & Flo!

Espomuzika historio kaj enciklopedio

Zdravka Bojĉeva estas profesia instruistino pri muziko en **Sofio**, Bulgario. Ŝi estas ankaŭ TEJO-komisiito. Ŝi gvidis espan fiortrejnkurson en Arieĝo, sudokcidenta Francio, en februaro 1996, kie ŝi ankaŭ prelegis pri bulgara popolmuziko. En KEF, **Kopenhago**, Danio, ŝi kolektis la kantemulojn kaj faris ĥorkurson. La rezulto estis treege bona – ĉar pli ol dudek kvin personoj partoprenis.

Zdravka komencis grandegan laboron kiu daŭros plurajn jarojn (eble tutan vivon). Ŝi preparas gravan verkon pri la evoluo de muziko en espo. Ŝi volas prepari, traserĉadas, amasigas, kaj kolektas informojn de ĉie pri muziko en espo, de la komenco de la lingvo ĝis nun. Ŝi serĉas kunlaborantojn por kolekti fortojn por sukcesigi tiun laboron. Ŝi celas verki plej precizan kaj detalan historion de la muzika espomovado. Iom kiel antologio kiu prezentos ĉion rilate al espomuziko – senlime plej diversaj muzikstiloj de klasika, popola, folka, ĝis roka.

Sia ideo estas ke tiu verko prezentiĝos kun apartaj ĉapitroj – unue la muzika historio, kaj poste kiel muzika enciklopedio kun informoj pri ĉiuj muzikistoj, ĉia muziko ĝenerale, inkluzive de muziko farita de neprofesiuloj, ekz-e dum tendaraj renkontiĝoj, enmovadaj kantoj, ktp. Estos parto ankaŭ kun prezento de la enmovadaj muzikaj festivaloj, asocioj, organizaĵoj, ktp. – unuvorte ĉiuj agantoj de la espomuzika vivo. Eventuale parto aŭ aldono povos ankaŭ utili kiel gvidlibro kun indikoj kaj kontaktoj ĝisdatigitaj ĉiujare por organizantoj, produktistoj, ktp. Kolektitajn informojn, dokumentojn, ktp., estas petate sendi al:

Zdravka BOJĈEVA
J.K. Mladost-3, bl. 374, vĥ. 2, et.3, ap. 13
BG 1712 SOFIA
Bulgario
Tel: +395 2 76 99 12

R-E-C-E-N-Z-O

Kompakte recenzas RoKo

EspeROM

Kiel eblas recenzi ion kiu enhavas 12 MB (megabitokojn, aŭ megabajtojn, laŭprefere) ? Oni simple pasigas horojn, perdite inter la labirinto da eblecoj. Sed se vi jam kutimas uzi KD-ROMojn, *EspeROM'* ne prezentos surprizojn : hipertekste vi povas klaki tienreen senĝene. Kaj la HTML-formato permesas al vi atingi diversajn TTT-ejojn, se vi estas ligita. La programo uzeblas per *PC*-komputilo kun Vindozo 3.4 aŭ 95 instalita, kaj kun *Sound-Blaster*-kongrua sonkarto.

Germana Esp-Asocio volis eldoni KD-ROMon en espo, kaj komisiis **Tilman MEIERFRANKENFELD**, kiu utiligis la diplomlaborajon de **Stefan FISAHN**. Ili kunmetis amasan fatrason de elementoj, kiel oni ofte trovas en tiaj *"shareware"*-ajoj – malmulte estas rekte utila, sed kelkaj ajoj estas amuzaj. Ĉi tie mi elektas nur po unu-du ajoj en ĉiu kategorio.

Pri muziko : estas ses horoj da muziko, sed plejparte nur prezentoj, ofte nur po 30 sekundoj, de diversaj grupoj aŭ kantistoj. Ekz-e **Tutti Futti** prezentas *Transeŭrokekspres'*, aperintan en ***VINILKOSMO-Kompil'*** n-ro 1.

Pri kursoj : la tuta kurso *Gerda malaperis*, eĉ voĉlegita – sed legita sufiĉe monotone de unusola persono, bedaŭrinde.

Pri vortaroj : *Roko kaj Popo*, de nia kunlaborulo **Bertilo WENNERGREN**.

Pri radio : sonspecimenoj de diversaj radioj, ekz. Radio Havano Kubo, Ĉina Radio Internacia, kaj evidente Pola Radio.

Pri eventoj : kalendaro 1997, kaj kvar (nur !) filmetoj po 1-minutaj pri renkontiĝoj, ekz-e KEF 5.

Plus : prezentoj de la ĉefaj esporganizaĵoj kaj gazetoj, ekz-e *Kontakto*, kun pli ol du horoj da voĉlegajoj ; prezento de la ĉefaj espobibliotekoj, speciale la surretaj ; amaso da legajoj (eĉ kelkaj voĉlegitaj), ekz-e *Fabeloj de Andersen* ; kaj..., kaj..., kaj... la tuta kristana biblio.

Por informoj kaj mendoj, kontaktu :

Tilman MEIERFRANKENFELD
Plesitermühlenweg 109
DE-48155 MÜNSTER
Germanio
Tel/fakso : +49 251 31 69 83
e-mail : meierfr@ uni-muenster.de
http ://machno.hbi-Stuttgart.de/~sf/esperom/Index.htm

Nurhome recenzas RoKo

Pli ol homo – esperantisto

kaj

La romantikulo en la XXa jarcento

de **Arnau TORRAS**

Subgrundaj bildstrioj (au *"komiksoj"*, se vi preferas) kiuj aperis dise-mise dum jaroj en *Kata-Luno*, nun arigitaj en du albumojn eldonitajn de Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo.

Pretu komplete freneziĝi. **Arnau** nin kondukas en la bildstrian mondon de **d-ro Senesperanto**, por kiu ĉio estas bona preteksto por amori. Iom laŭ la stilo de bildstriistoj usona **Crumb** kaj franca

Edika, por mencii nur tiujn – senpudoraj bildoj kiuj ofte karambolas inter sin, kaj malĉastaj tekstoj kiuj interŝokas kun la bildoj. Ja ne temas pri **Tinĉjo** ! Ĉi tiajn bildstriojn vi ne povos rapide legi – vi devos sidi trankvile ie kaj atente legi kaj rigardi (eĉ kun lupeo !) por ne maltrafi sukajn detalojn.

Ne uzu la tekstojn por unuagrada espokurso, ĉar la lingvaĵo de **Arnau** ne ĉiam estas modelo – ĝi estas la vivanta " dumkongresa " lingvaĵo, kie la celo estas kompreniĝi, ne gramatikumi.

Vi povas mendi la bildstrialbumojn ĉe via kutima libroservo, aŭ rekte ĉe :

SEK
Amrueva 5
HR 10000 ZAGREB
Kroatio

Tele-avide recenzas RoKo

Esperanto pasporto al la tuta mondo

Projekto de 15leciona vidbenda kurso

Ĉisomere, Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko komencos la filmadon de nova televida kurso kun 15 duonhoraj lecionoj. Jene prezentiĝas demonstra vidbendo, per kiu ili esperas konvinki la espistojn elkasigi kelkajn monbiletojn por financi la aferon, simile kiel faris IEI pri *Mazi*.

Tiu ĉi kurso celas plenkreskulojn, sed ŝajnas al mi ke ankaŭ infanoj ŝatos la amuzajn burleskaĵojn de la vivantaj geaktoroj. La metodo estas pura rekta metodo, sen uzo de nacia lingvo, kaj la ses geaktoroj estas veraj esperantistoj, eĉ movadanoj, el malsamaj nacioj, kio bone prezentas la variajn akcentojn de Espujo. Ĉiu aktoro ludas membron de fantazia familio **Bonvolo**, sed tute malbanale ĉiu havas eksterordinaran metion kaj kostumon – la patro estas greka filozofo, la patrino estas klasika baletisto, ktp. (Estas sufiĉe komike por ni revidi nian oftan kunlaborulon, **Ionel ONET**, kiel longdistancan kuriston !) La celo estas iel ekstertempigi la kurson, por ke ĝi ne eksmodiĝu.

La provlecionoj sur la vidbendo donas impreson de tute serioza laboro – la tekstojn ja verkis **Edwin GROBE** kaj **Paul GUBBINS** (aŭtoro de premiita metodo *Kunvojaĝu*), kaj la tuto aspektas tre profesia.

Vi povas mendi ekzempleron de la provbendo kontraŭ 15 USD aŭ ekvivalente ĉe :

ELNA
PO Box 1129
EL CERRITO, CA
94530
Usono

Vi povas pagi ankaŭ pere de UEA al konto nmvm-n.

Sonzinoj

" Sonmagazino " kontraŭ " songazeto "

Post apero de artikoloj sub la rubriko *"Songazetoj"* en la 7a ***ROK-gazet'***, ni ricevis plendon de **Georgo Silfer** de LF-Koop, kiu malpermesas al ni uzi la vorton *"songazeto"* ĉar tio estas la nomo de unu el iliaj produktoj. En sia letero **Georgo Silfer** prezentas la aferon tiel ĉi : *" Vi bone scias ke la nomo* Esperanta Songazeto *estas registrita marko de nia songazeto. Ke en la lasta, grafike gratulinda, n-ro 7 oni dediĉas artikolon al ĉiuj songazetoj ne menciante la nian, kaj eĉ misuzante ĝian nomon, tion ni ne kapablas konsideri hazardo."*

Nia rubriko estas tute malfermita al ĉiuj sonmagazinoj kiujn ni ricevas en nian redaktejon, kaj ni prezentas aŭ recenzas ilin laŭ la kutimo de la espogazetaro. LF-Koop neniam ĝis nun sendis kiun ajn produkton por recenzo aŭ prezento en niaj paĝoj – ni bedaŭras, sed ni ne povas inventi la informojn ! Ĉiukaze post tiu plendo ni iom cerbumis kaj decidis neniam plu uzi la vortojn *"esperanta songazeto"* kiu, kvankam estas tute normala espa vorto, fariĝis proprajo de LF-Koop – estas ilia rajto, kial ne... ? Ni avertas ĉiujn espistojn kiuj aperigas tiajn produktojn ke ili ne rajtas uzi tiun vorton krom LF-Koop. Pro tio ekde nun ni uzos la vortojn *"esperanta sonmagazino"* (mallonge *"esposonzino"*). Tamen ni petas nek aŭtor-, nek kopirajtojn pri tiu nomo, kiu troviĝas en *PIV* – oni kunmetu vorton *"magazino"* kun *"sono"* kaj tio fariĝas *"sonmagazino"*, kun *"esperanta"* antaŭe ĉar temas pri nia kara lingvo – ĉiuj espistoj tion scias fari, ĉu ne ?

SonROKzet'

Pri ***SonROK-gazet'*** (ekde nun ni diru ***SonROKzet'***), pro multnombraj okupiĝoj, **Fabrico** ne sukcesas trovi la tempon por tion realigi, kaj neniu kuraĝis sin proponi por efektivigi la projekton. La ideo daŭre validas (t.e. prezenti artikolojn aperintajn en ***ROK-gazet'*** reliefigitajn de muzikaj fragmentoj por havi pli klaran ideon pri kion ni prezentas). Interesitoj bonvenas – sufiĉas kontakti nian redaktejon.

Sonmagazino de UKS (Malagasio)

Ĝi estas samtempe instrua kaj informa materialo sur kasedoj. La radiostacioj esplingvaj ne estas kapteblaj en Malagasio (aŭ la tieaj espistoj ne havas rimedojn por ilin kapti), kaj por helpi ĉefe la izolitajn pedagogojn kiuj lernas la lingvon, **Eugène Raveloson** lanĉas alvokon al la espoprogramoj kaj al la espistoj por sendi intervjuojn kaj diversajn materialojn por realigi tiun sonmagazinon. Cetere helpas en la realigo de tiu projekto Eduka FondaĵO Carson. Subtenu tiun iniciaton mendante kaj abonante ĝin ĉe UKS :

Universala Kultura Servo
N° 387 Cité Analamahitsy
MG 101 ANTANANARIVO
Respubliko de Malagasio

Sonrevuo *INBE 59*

Antaŭ la jarfino 96 ni ricevis la sonrevuon *Internacia Neŭtrala Bulteno Esperantista* n-ro 59. Interesa, informriĉa, kaj kultura enhavo jenas : Enkonduko kaj bonvenigaj vortoj kun moskva rusa kanto. Aludo al la 50jariĝo la 13an de septembro 96 de la internacia ekologiprotekta organizaĵo Green Peace (Verda Paco). Anonco kaj komentoj pri forpaso de **Ada Fighiera-Sikorska**, redaktistino de *Heroldo de Esperanto*. Poeziaĵo " Novembro " de la itala poeto **Enriko Dondi**. Kanto de **Kajto** " Surstrande " el la albumo *Procesio multkolora*. Diskopatio, ĉu vertebra malsano ? Pri la nova akademia prezidanto d-ro **Werner Bormann**, el *Esperanto aktuell*. Apero interesa en Rusio, nome *Voĉo de amikeco*. Informoj pri la fondiĝo de INBE por blinduloj. Kanto de **Galina Komarova** el S-ta-Peterburgo. Vortoj de **Ulrich Lins** pri Fondaĵo Antoni Grabowski. Lulkanto de **Elizabeta Svalinska**. Venezuela rekontiĝo en Karako, el *Venezuela Stelo*. Adiaŭa parolo de **Fernando de Diego** forlasonta Karakon. Pri kverelo inter **Georgo Silfer** kaj **Jorge Camacho**. Pri mormonoj en Kanado. Prezento de la duvoluma *Vinilkosmo-Kompil'* kaj EUROKKA. " Movo estas vivo ", artikolo de **Adamo**. Kortuŝaj vortoj de **Aldo de' Giorgi**, el *Heroldo de Esperanto*. Adiaŭa kanto el Rusio kun adiaŭaj vortoj de la geredaktistoj. *INBE 59* disponeblas kaj abonoj ĉe la geredaktistoj :

Kristina kaj Adamo GORALKSI
Calle General Fanjul 17-1D
ES 38006 SANTA CRUZ DE TENERIFE
Kanariaj Insuloj, Hispanio



Kritikloj

Personece recenzas Flo :

Persone

Povus esti simple

Ni povas nur aplaŭdi la aperigon de tiu ĉi KD, fakte la 3a albumo de **Persone**. Jen la unua pure tutroka KDalbumo produktita en Espujo – vera juvelo ! **Persone** simple sukcesis krei sian esporokstilon, unu albumon post alia.

En 1987 aperis la unua kasedalbumo *62 minutoj*, kiu fariĝis klasikaĵo en Espujo pro ĝia poezio kaj engaĝiĝo, ekz-e " Ĉu vi pentas ", " Tute sekura ", " Ĉu al paca cel' ", " Nur por la pano ". Tiam la bando estis kvaropo kun **Börje** (gitaro, kanto) ; **Bertilo** (drumoj, kanto, korusoj) ; **Martin** (basgitaro, kanto, korusoj) ; **Per Ola** (saksofono, korusoj). Poste **Persone** travivis gravajn ŝanĝiĝojn kaj ni devis atendi kvar jarojn antaŭ apero de nova produkto. Efektive **Börje** kaj **Per Ola** forlasis la bandon, **Martin** prenis gitaron (certe ne en rubuj') kaj ĉefkantadon, nova muzikisto (basgitaristo) **Anders** alvenis, kun **Bertilo** daŭre ĉe drumoj.

En 1991 por la 10a jubileo de la stokholma klubo " La Ranetoj ", aperis do la dua kasedalbumo *En la spegulo*. Kompare al *62 Minutoj*, **Persone** " ŝtoniĝis ". La triopo evoluis al pli poproka stilo kun elstaraj titoloj kiaj " Kio ajn ", " Mi ne scias ", " Du homoj ", ktp.

Jen kvin jarojn poste, *Povus esti simple* konfirmas la direkton en kiun la bando orientiĝis ek de la antaŭa *En la spegulo*. Tiu ĉi albumo estas konstato de daŭra progreso kaj maturiĝo de **Persone**, kiu poluradis sian repertuaron atingante altkvalitan rezulton. Unuavice kio frapas, estas la sono, kvazaŭ estus viva koncerto ŝprucante el via aparataro. **Persone** sukcesis iel transdoni tian etoson per ŝtoneca sono, certe ne la plej aktuala kaj ne tiel pureca (studieca) kiel *En la spegulo*. Pro tio tiu ĉi albumo sonas rokvivece. 13 titoloj, ĉiuj el la mano de la triopo, kun nova malsama versio pli fajna de " Reĝoj de cindro " (aperinta en *Vinilkosmo-Kompil' Vol.1*). **U2**-ecaj kolorsonoj ŝvebas en ĝi sed la spuroj de **Persone** firme restas, pli kaj pli profundaj, neforigeblaj, tion sentigas al ni titoloj elstaraj kiaj, interalie, " Revoj ", aŭ " La leviĝo de la lun' ", en kiuj **Martin** gitarludas fajnece kiel puntistino. Lia gitarado fariĝis tute memfida, same kiel **Anders**, kiu vere majstras basgitarludon trafe kun **Bertilo** pli precizega ol iam ĉe sia drumado.

Kaj la voĉoj ? **Persone** sen tiaj voĉoj ne estus **Persone**. La ĉarmo venas de tiu grajneca voĉo duonrompita de **Martin**, kiun apogas koruse **Bertilo** kaj **Anders**. Tie kuŝas la sekreto de **Persone** : ekvilibra agordiĝo de bonegaj tekstoj integritaj en bone ellaboritajn rokmuzikaĵojn per oportunaj voĉoj.

Alia tendenco desegniĝas horizonte, anoncita de " Nun mallumas ekstere "– akustikaj eroj ŝajnas altiri la triopon, la polusaj kontrastoj en la rokmuziko kuniĝas kaj samtempe forpuŝiĝas. Tia fakte estas **Persone** kaj ilia muziko.

Tiu ĉi lastaperinta KDalbumo ! ? Jes ja, definitive mi ŝatas ĝin ! Ĝi kunigas amon, tristecon, liberecon, pasion, tenerecon, konteston, dubojn, timojn, pacemon, ĝojon, emociojn, verojn ... en ritmoj baladaj galopantaj... trans torent'. Ĉar vi scias ke ili venos por vi de multaj mejloj for trans la griza mar'. Sed je sunmalleviĝo roke viglaj vortoj forglitas el la man' de prizonulo de la tago. Ho karaj ! Ni ne postulas respondon, tamen jen demando : kiu frenezas ? Ĉu la mondo aŭ ĉu ni ? Revoj falas sur teron dum mallumas ekstere, atendante leviĝon de la lun', ŭahaŭ ŭahaŭaŭ ŭahaŭ ŭaŭ ŭahaŭ ah ah.... Ĉio povus esti simpla, sed ne estas...!

Per vigle trafa esporokpoezio tiu **Persone**-a KD enradikigas por ĉiam rokmuzikon en la espokulturon. Nepre havinda KD, ne nur por movadumi ! Ĝi disponeblas ĉe Vinilkosmo, referenco VKKD11.

Solo Tronikas !

Post Vulkano, Miraklo kaj Elektra 1

Solo el Malago, Hispanio, estas tre produktive kreema. Post apero de la kasedalbumo *Vulkano* fine de 94 (legu recenzon en ***Rg*** 7a), jen *Miraklo*, aperinta en 95. *Miraklo* estas la titolo de nova kasedalbumo de **Solo**. Tiu verko estas pli alirebla ol la antaŭaj kun muzikaĵoj pli intimaj : " Casa de Cristal " (Kristaldomo), " Somos lo mismo " (Ni estas samaj), " Expediente X ". Pli ritmaj, moviĝemaj kaj etosigaj : " Baila tecno " (Dancu teknoe), " Ĉinokte ", " Cielo rojo " (Ruĝa ĉielo), " ¡Aj ! que bien " (Ho ! kiom bone).



Tamen la farmaniero de **Solo** restas kun tiuj mediteraneaj hispanarabecaj kolorinfluoj " Donu al mi l' venenon de la dubo ", " Dale gu'to ar cuerpo " (Ĝuigu vian korpon), " Cha la lala ", " Miraklo ". Rimarkindas ke tiu albumo enhavas tri espotitolojn kies aŭtoroj estas **Ibere-Libere**anoj : n-ro 3 " Donu al mi l' venenon de la dubo " de **Miguel Fernández**, n-ro 13 " Miraklo " de **Jorge Camacho**, n-ro 14 " Ĉinokte " de **Gonçalvo Neves**. Tiu albumo estas la 4a eldonita de **Solo** kaj ĝi estis elpensita por multediversa publiko – ĉiuj kantoj estas mallongaj kaj enhavas facilajn strukturojn, facile kapteblaj kun instigaj rekantaĵoj kvazaŭ teknopopo. Interalie ni

sentas miksaĵojn de diversaj influoj de **Japan**, **Talking Heads**, **Roxy Music**, **David Bowie**, **Rumba Flamenca**, ktp. La ĝenerala impreso ne estas malagrabla kaj ankoraŭfoje **Eduardo VARGAS** montras en tiu ĉi muzika sfero talenton, ne nur por la komponaĵoj sed ankaŭ por la kantado. Certe oni povas malamegi kaj kritikegi lian muzikon, sed oni ne povas nei lian genion frenezan en komponado kaj serĉado de novaj sonoj per plej aktualaj sinteziloj, elektronikaj maŝinoj, kaj komputiloj.

Tion li pruvas en alia nova demokasedo titolita *Elektra 1*. Temas pri elektrosimfonio kun tekstoj en espo – mistiksciencfikciaĵo konsistanta el du partoj : " Hotel Reĝina 777 " kaj " Demetrios kaj lia kosmoŝipo en 4 movimentoj ". Li prezentis 4foje antaŭ neespopublika koncerton en aprilo kaj junio 96 kun tiu elektrosimfonia muziko, ne sub nomo **Solo** sed **Astra** en preĝejo de Sankta Anĝelo, en Edipsa-ejo en Malago kaj en Murcio, kaj unufoje en Hispana Federacia Kongreso. Notindas ke **Solo** ricevis premion kaj subvencion por tiu ĉi eksperimenta elektronika simfonio, en kiu abundas minimalismaj esprimismaj influoj de komponistoj kiaj **Schönenberg**, **Bartók**, **Stravinsky**, **Serocki**, **Ligeti**, **Messiaen**, **Boulez**, ktp. Nun li eksperimentas en nova muzik-aventuro – li akiris novan aparataron kun sekvencilo kaj provas novajn sonojn, novajn nuntempajn ritmojn de ĝangalo, hiphopo, subgrunda teknoo (legu artikolon pri *teknohaŭsmuziko* en tiu ĉi numero). **Solo** daŭrigas sian vojon kaj progresas en la direkton kiun li elektis. Liaj kasedalbumoj haveblas ĉe VINILKOSMO sub referencoj :

Vulkano VKKS22
Miraklo VKKS25

La diskego *Kosmo-Infano* kaj la kasedo *Ili estas nur kanzonoj* elĉerpiĝis.

F.M.

Flávio Fonseca

La forto kiu eĥas en ĉiu kanto de Flávio Fonseca

Ankoraŭfoje **Flávio Fonseca** pere de tiu ĉi nova 12titola albumo sur KD (la 3a kaj unua KD) montras sian talenton de komponisto-aranĝisto sed ankaŭ de kantisto. De la komenco la tuta albumo estas tre svinga. Tiu brazileca bosajazo vere donas emon mergiĝi en la brakojn de tiu muziko kaj vagadi. Instrumentado estas elstare kvalita fare de muzikistoj spertaj kaj plensentodonaj. La voĉo kaj muziko kunfandiĝas kiel sukero en varma trinkaĵo kiun vi gustumas plezurege. Trumpeto venas ĝuste por apogi delikate ŝvebe plezurmomenton en " Asa Delta ". Ver " per siaj trumpetado tiras vin movigadas vian tutan perkutilaroj kaj vipa el la antaŭa sveno kaj " Babela turo " falas korpon. Kaj tuj sekve per nova riĉa inpli kolora ol tiu en la sur vin fluegparole *Kompil'*, tamen sen la strumenta aranĝado estas la sola en espo unua *Vinilkosmo-* aliaj estas en la brazil- ina voĉo. Tiu titolo kaj portugala dolĉeca etoso de la albumo, ĉiuj albumo sukcesas portugala lingvo. Espo ripoziĝaj melankoliaj adaptiĝas perfekte al madrugada " (Nova brazilece jaza. poste sambiĝi vin en

Flávio en tiu ĉi ensorĉi vin per " Atestado de ĝbvios ". muzikaĵoj kiaj " Nova frandajalbumo. Ĝi mateniĝo), kaj tuj konfirmas la profesian kvaliton kiun ni povis aprezi dum la eŭropa turneo de **Flávio Fonseca** akompanata de bonegaj muzikistoj : ĉe gitaroj **Rubens HOLZMANN**, basgitaro **Marco VERDE**, klavaroj **Josué BUENO**, drumo **Almir JORGE**. Bedaŭrinde ne povis veturi por la turneo la perkutinstrumentisto kaj saksofonisto-trumpetisto kiuj alportas al la albumo gravan komplementon. Ni esperas revidi ilin ĉiujn kune surscenejo por denove gustumi tiom bonegajn momentojn. Produktis tiun albumon JADE ARTE . Disponebla ĉe VINILKOSMO laŭ referenco VKKD13.

F.M.

Esperanto

Nomadlando por espo

La triopo **Esperanto** el Rouen, Normandio, Francio, eldonis 8titolan albumon en kiu malkovriĝas kelkaj facetoj de ilia muziko. Akustika gitaro, akordiono, kontrabaso kaj perkutiletaroj estas la instrumenta bazo de **Esperanto**. La unua titolo estas en espo (la sola de la albumo en tiu lingvo), kaj titoliĝas " Bandonio ". Jes ja, la sama kiel tiu de la 2a volumo de *Vinilkosmo-Kompil'* – temas pri hispaneca flamenkotango.

Ĉiu muzikaĵo de tiu albumo transportas nin de unu flanko de la mondo al alia. Nomad'land " estas la 2a titolo (kaj tiu de la KD) en la franca laŭ cigana muziko. " Magalie la Cigale " alportas la varmegon de la mediteraneaj nor- dafriko kaj suda hispanio. " Celtitude ", strumenta titolo, indancbalancigas nin en Irlandon aŭ Skotlandon enkon- tukante la keltecan " Le banquet de Taranis ". " Ellea " nostalgias en rus- landaj stepoj kaj finfine daŭrigas laŭ ritmoj popolaj . Kun " Au Kazoo " ili restas en orienta Eŭropo kokaza. Kaj jam alvenas la lasta titolo kun denove mediteranea sudhispana arabeca etoso.

Tiu ĉi albumo donas bonan bildon pri la diverseco kaj kvalito de la muziko de **Esperanto**, kiu dum 21 minutoj ebligas al vi fuĝi en forajn landojn kie regas paradiza varma popolmuzika etoso. Kolektantoj kaj poplmuzikŝatantoj ne bedaŭros la akiron de la albumo eĉ se sur ĝi troviĝas nur unu espotitolo kaj du instrumentaj inter la ceteraj en al franca. La KDalbumo disponeblas ĉe VINILKOSMO, referenco : VKKD14.

F.M.

Instinkte recenzas Flo :

Instinkto X

Rokmuzika KD kontraŭ aidoso kun espotitolo !

Nun ĉiu scias ke aidoso kreskigis grandan timon kaj panikon. Amaso da asocioj, organismoj, societoj, ktp. naskiĝis kaj investas tempon kaj monon ĉu por esplorado, esperante trovi vakcinon, ĉu por helpi kaj akompani la malsanulojn, ĉu por antaŭgarda informado. Estis dediĉita al la temo eĉ Tutmonda Tago kontraŭ Aidoso – en 1996 estis la 1a de decembro.

Antaŭ ĉio, la oficialajn tezojn subtenatajn de la tuta tradicia alopata medicino, apotekindustrio, kaj registaroj, kontraŭstaras internacia grupo de medicinesploristoj, biologistoj, kuracistoj, ktp. (kontaktoj disponeblas) eĉ kuracistoj sufiĉe gravaj en nia espomovado kiaj **Harald Schicke**, kaj **Umberto M. Schweizer**.

Tiu lasta deklaras jam delonge ke :

" Aidoso ne estas vera infekta malsano, ĉar estas ĉefe *Akirita Imunsistem-Difektiĝ-Sindromo* (= AIDS = a-i-do-so), do difektiĝo de la imunsistemo ne nepre pro infekta malsano. Sed pro multaj aliaj kaŭzoj, la aidosviruso estas sufiĉe sendanĝera, aidosuloj mortas pli pro la ĝisnuna brutala terapio. En Germanio estis spertite ke pozitivuloj kaj eĉ malsanuloj kiuj ricevas naturkuracadon, plu kaj bone vivas, dum tiuj pacientoj kiuj estas kaj estis terapiataj de ordinara alopata medicino, rapide kaj kruele mortas. Aidoso mem tute ne nepre estas mortiga ! Akirita Imunsistem-Difektiĝo-Sindromo estas kaŭzata de drogoj, de medikamentoj, de malsaniga vivmaniero (interaliе malbona nutrado), de la medio (interaliе radioaktiveco kaj elektrosmogo). Aidoso ne estas vera malsano, sed difektiĝo de la korpa defendosistemo, ekzemple per antibiotikoj. D-ro **Gallo**, Usono, kaj d-ro **Montagnier**, Francio, malkovris HIViruson kaj diris ke ĝi estas la kaŭzo de aidoso. Sed ili ne pripensis ke same kiel ranoj ekloĝas nur en malseka medio, same ĉiu mikrobo ekloĝas nur en substrato adekvata al si, pro kio jam **Pasteur** diris ke la mikrobo estas nenio, la medio ĉio. Tio antaŭ ĉio validas por malfortaj mikroboj, dume sufiĉe fortaj kompreneble povas invadi organismon, trovi siajn pordojn. Menciindas ke la fakte malforta HIV aŭ aidosviruso estas tiom malgranda ke ĝi ekzemple ege facile trapasas la haŭton de kondomoj. Laŭ **Pasteur** ni dume povas konkludi ke bakterioj aŭ virusoj servas ĉiam por difini la specon de iu malsano, sed ne nepre supozeblas ke ili plene kaŭzis ĝin.

"Tamen, la medicinesploristoj bezonis trovi viruson, kaj tiu malkovro de **Gallo** kaj **Montagnier** alvenis oportune. Seksumantoj mem estas viktimoj, ne kaŭzantoj de aidoso. Aidoso precipe estas kultura kaj ekologia fenomeno ! La aidosesploro ekde sia komenco troviĝis en sakostrato kaj iĝis ĉefe komerca afero, kio validas precipe por aidos-testo. Ĝi estas sufiĉe sentaŭga diagnozo, kiu en kazo de pozitiveco psike kaj en terapia konsekvenco mortigas. La esploristoj de aidoso pensis kaj esploris en malĝustan direkton kaj tio estas tragedio por la suferantoj...."

Evidentas ke unu el la du tezoj eraras, kaj gravegas konscii pri tio. Ankaŭ estas klare ke unu disponas pri superpovaj subtenoj dum la alia male.... Tamen iam gravos scii kiu pravas ! Sama dilemno kiel por vakcinoj – kiu pravis ? Ĉu **Pasteur** ? Ĉu **Béchan** ? La rezulto estas ke nun vere malfacilas eviti vakcinojn por tiuj kiuj ne deziras ilin. Ĉu vero estos silentigita aŭ ĉu ĝi finfine elmergiĝos ? Gravas objektive analizi, traserĉi, informiĝi, ktp. por akiri pli kleran opinion, kaj mem decidi por ke aliaj ne plu pensu anstataŭ ni. Dume amaso da homoj agadas, investas sin fizike, morale, kaj finance en diversajn oficialajn organizojn, asociojn kiajn "Aides" , "Actup" , ktp. Ĉu prave ? Ĉu malprave ? Ĉiukaze endas fari ion – sed kion ? En kiun direkton ? Ĉu la oficialaj kiuj disponas pri tiom da subpremoj estas reale la pravaj ? Ĉu ni povas fidi ilin ? Duboj, duboj, kaj ankoraŭ duboj !

En Tuluzo, sudo de Francio, du rokagemuloj, **Rémy** kaj **François**, proponis projekton pri eldonado de KD kun bildstrio kontraŭ aidoso al *Secours Populaire Français* (oficiala franca organizo kiu helpas mizerulojn). Tiu organizo akceptis la projekton kaj financis ĝin helpe de multenombraj subtenoj. Tiel **Rémy** kaj **François** komencis, lanĉante alvokon en februaro 96 al ĉiuj gejunuloj de la suburbaj kvartaloj de Tuluzo por ke ili esprimu sin pri aidoso per verkoj, poemoj, desegnoj, bildstrioj, ktp. Mirige, alvenis amaso da kontribuoj tre interesaj : belaj tekstoj, foje kruelaj, plejparte emociplenaj pro travivaĵoj kun malsanuloj, belegaj desegnaĵoj, karikaturoj, ktp. Pluraj artistoj kaj muzikgrupoj estis invititaj partopreni por elekti tekstojn el tiuj ricevitaj por ilin enmuzikigi. Tiel ok bandoj diversstilaj de Tuluzo kunlaboris en la projekto kaj donis sian kreemon por vivigi tiom kortuŝajn verkojn. Entute proksimume 100 personoj kunlaboris kaj sukcesigis la realigon de tiu KD kune kun la bildstria broŝuro (en la franca, formato A4, kolora). La rezulto estas impona pro la kvalito profesia kiun atingis tiu kolektiva laboro fare de gejunuloj el suburba marĝena socio, inter kiuj multaj enmigrintoj. Intermiksado de kulturoj kaj de lingvoj aportas grandan originalecon al tiu KD kaj bildstrio titolita *Instinct X* (Instinkto X).

La unuan titolon de la KD, "Urgence" (Urĝo), verkis **Hervé Ker Anbrun** kaj **Aropla** laŭ teksmeks-stilo (speco de skao aŭ meksika roko) en la franca. La duan, "Listen When I Talk to You" (Aŭskultu kiam mi parolas al vi) verkis en la franca **Philippe Costil**, tradukis en la anglan kaj enmuzikigis **Macca Roots**, regea bando. La trian, "L'enfer se lasse" (Infero laciĝas), verkis en la franca **Aurore Balza**, tradukis kaj adaptis al la araba la maroka akustika tradicia triopo **El Karam**. La kvaran, "Pas de fumée sans flammes" (Ne estas fumo sen flamoj) verkita en la franca de la bando **Otentic** mem. La kvinan, "SIDA culture" (Aidoskulturo), verkis **Véronique Mabon**, interpretis la regea skarepbando **Joe N'jah** en la franca. La sesan, "Il y a" (Troviĝas), teksto de **Bruno Chavanette**, enmuzikigita de la ina rokbando **Aznia Bout Bout Yaparem**, en la franca. La sepan, "Sarah" , teksto de **Stella Magliani** en la franca, tradukis kaj adaptis al espo **Jomo kaj la Mamutoj** (eks**Rozmariaj Beboj**) laŭ rokenrola stilo de la 60aj jaroj emocia teksto en kiu la aŭtorino rakontas la malsanon kaj forpason pro aidoso de sia fratino. Fidinda espotraduko kun kvalita muziko. La okan, "Sen-mizik mi-gaz !" , senteksta perkutinstrumenta titolo de la perkutista duopo **Lapoka**. Ĉiuj tekstoj estas fortegaj pro veraj sentoj krudaj fare de gejunuloj kiuj timas, ne akceptas estonton tiel malhelan, kaj dubas. Subteninda iniciato, tamen ĉu en la bona direkto ? Pripensinda afero....

KD kaj bildstrio disponebla ĉe VINILKOSMO, referenco : VKKD16.

Nigre-kaj-blanke recenzas Flo :

Leclercq ruĝe kaj nigre

Leclercq

Post disiĝo de la **Rozmariaj Beboj**, **Jomo** ekis solokarieron fulmrapide kaj tuj aperis en diversaj produktoj : titolo en *Vinilkosmo-Kompil'* Vol. 2 kaj en *Instinct X* , tuluza kompilaĵo kontraŭ aidoso (vidu koncernan artikolon ĉinumere). **Jomo** (**Jean-Marc Leclercq** estas lia vera nomo) finfine aperigas sian unuan solo-produkton. Temas pri albumeto sestitola kiun li kunproduktis kun STANSY Productions. La enhavo entenas tre bone produktitajn muzikaĵojn laŭ la kutimaj muzikstiloj de **Jomo** kun liberecansintenaj tekstoj : la ruĝa kaj nigra koloroj de la antaŭa kovrilo de la KD tion klare indikas. La tekstoj same parolas pri homdoloroj, migradoj, rifuĝadoj, vivo, liberecalvoko, ktp. La albumeto alportas blovon de liberecemo kaj sincerajn ideojn. **Jomo** estas akompanita de la iamaj **Mamutoj**, kiuj intertempe transiris de la praaepoko al la nuno. Tie ni senvualigas iliajn verajn identecojn : **Jomo Leclercq** elektroakustika gitaro, kanto ; **El Sebo de la Huelga** basgitaro ; **El Pepe de la Juerga** elektra gitaro ; **El Ĝeĝe de la Vuelta** drumoj ; gastas **Piotr Antonjoviĉ** violono. En la KD la titoloj sinsekvas jene : "Loretta" , laŭ kaĵuna stilo el Luiziano, Usono, en la franca kaj angla ; temas pri foriro de amatino. "Le bateau" (La ŝipo), kantria stilo en la franca ; temas pri vojaĝemulo kiu planas multajn vojaĝojn per ŝipo. "Jen nia mondo" , rokenrola versio de la jam famkonata kanto de **Woody Guthrie**, tradukita de **Wouter Pilger** ; la sola espokanto de la disko. "Quand passent les cigognes" (Kiam preterflugas la cikonioj), slava muziko omaĝe al **Nestor Mafino** kaj ukrainaj liberecanoj kiuj post liberigo de Ukraino devis fuĝi aŭ pereis ; en la rusa kaj franca. "Tzigane" (Cigano), cigana muzikaĵo pri historio de la cigana popolo ; en la franca.

Remiksaĵo de **Black Feet** (iama **Bombaj-Dob'** en *Vinilkosmo-Kompil'*Vol.2) ; malantaŭ tiu nomo kaŝiĝas **Max Bale**. Li reprenis la temon "Kiam preterflugas la cikonioj" kaj faris remiksaĵon ĝangalan kun doba, acidjaza fono.

20 minutoj da agrabla muziko tre diverstila kiu bone respegulas la scenejan etoson dum viva koncerto de **Jomo**. Rokuloj same kiel malrokuloj ŝatos ĝin. Unua KDisko de **Jomo** nepre havinda eĉ se ne ĉio estas en espo. Eblas mendi ĝin ĉe VINILKOSMO, referenco VKKD17 (vidu katalogon).

Agorde recenzas Yves Bachimont :

Voĉaj kordoj en Akordo

Kiam mi unuafoje spektis kaj aŭdis la koruson **Akordo** en koncerto, estis dum la Eŭropa Kongreso en Parizo en 1995, kaj mi tiam agrable surpriziĝis pro la belsoneco de tiu kvarvoĉa sepopo, kiu kantas *a capella*, tio estas sen instrumenta akompano. Denove mi miris kiam mi malkovris la sekvantan jaron okaze de la IJK en Güntersberge, Germanio, ilian unuan kompaktdiskon tre profesie produktitan kaj belaspekte allogan. Mi malkovris ankaŭ ke **Akordo** fakte ekzistas de pluraj jaroj kaj komencis ekzerci ekde 1988.

Pri la disko mem, mi gustumis la unuajn Gufujo, loko fame konata de la kongresanoj etoso. Kvankam tiam ne pluvis, tiu ejo estis originalan, ripozigan kaj plezurigan por la disko titoliĝas *Muzik-Pluvo*. Ĉu ĉar estas eblas fari nenion alian ? Ĉu pro tio ke ofte de la kantoj milde glitas kiel pluveroj en multkoloran voĉan mondon ? Persone mi en la disko troviĝas ne malpli ol 25 kantoj la mezepokaj jarcentoj (dekkvina kaj dektradiciaj kantoj de diversaj regionoj, kaj eĉ de grupo **Persone**, sed kiam la ĥoro kantas "Ĉu simbola porpaca kanto tuj reaperas en la kiujn mi mem kantis kadre de ĥortrejnadoj, en prizono" (sudafrika batalkanto). Mi ("Mia Julia, damo" , "Ho kia bril'" , "Damo verdas" , "Per biciklo tra la pluv'") ; pri povas diri"). Rimarkindas la internacieco de Francio, Sud-Afriko, Bosnio, Kroatio, Hungario, Kenjo, Kimrio, kaj Italio.

Konklude mi vere ĝojegas pro la ekapero de tiu ĉi KD de **Akordo**, kaj konstatinte la bonegan kvaliton de la registrado kaj kantado, mi povas imagi la laboregon de la korusanoj kaj gratulas ilin rilate ilian strebon. Jam multaj diskoj vendiĝis okaze de kongresoj kaj daŭre vendiĝos. Ne atendu la venontan kongreson por ĝui muzikpluvon.

La KD disponeblas ĉe Vinilkosmo, referenco : VKKD12.

Novaj produktoj el Usono

Nia kara peranto en Usono

Ionel Onet sendis informon por tiuj kiuj pretas recenzi kaj prezenti por venontaj ***ROK-gazetoj*** jenajn produktojn :

Esperanto de **Bud COLLINS** (Conspiracy A Go-Go), KD & KS, poprok' ĉe NORTHEASTERN.

Esperanto Socialiste de **Holger CZUKAY** (Rome Remains Rome/Der Osten Is Rot), KD, poprok' ĉe BLUE PLATE.

Esperanto de **Shawn LANE** (Powers of Ten), poprok' ĉe WARNER BROS. Records.

Universale recenzas Manuel Pancorbo Castro :

Universala mesaĝo el magia disko

Esperanto

Aperis la unua komerca kompakta disko tute espe kantita, eldonita de la diskeldonejo WARNER MUSIC SPAIN, komence nur en Hispanio, sed espereble poste en aliaj landoj. Ĝi estas reale komerca lanĉo kun televida kampanjo, enigado en FMradiajn sukceslistojn de gravaj, tre aŭdataj radiostaciaj ĉenoj, recenzoj en la plej vendataj fakaj revuoj, ktp.

Ĝi nomiĝas *Esperanto*. La aŭtoro sin kaŝas sub la pseŭdonomo, ankaŭ **Esperanto**, kaj jam faris, antaŭ unu jaro, similan diskon kantitan angle kaj latine sub la pseŭdonomo **El Bosco**. La surbendigado estis farita diverslande : Sofio (Bulgario), Johanesburgo (Sud-Afriko), Havano (Kubo), Moskvo (Rusio), Madrido (Hispanio), Edimburgo (Skotio), kaj Rio de Ĵanejro (Brazilo).

La disko konsistas el 11 ĥoraj kantoj tute en espo, kies titoloj estas : " Astro Jupiter' ", " Mistero numero kvin ", " Maro Sadko ", " Tirano ", " Thais ", " Zamenhof ", " Lumo ", " Universala naturo ", " Cigno ", " La rido ", kaj " Esperanto " denove!

Ili estas kantitaj de la ĵenaj ĥoroj : Ĥoro de la Muzikakademio de Moskvo ; Soŭeto-ĥoro de Johanesburgo ; kaj ĥorgrupo de la Bulgara Radiotelevido. Ŝajne ankaŭ anonimaj kantantoj kontribuis. Foje sonas mallongaj frazoj en malfacile konebla (de mi, almenaŭ) lingvo.



La muziko estas moderna adapto kaj reverko de klasikaj instrumentaj pecoj, iu el ili tre konataj : " La rido " estas " Odo al ĝojo " de **Beethoven** ; " Astro Jupiter' " estas " Jupitero, la portanto de ĝojo " el *La planedoj* de **Holst** ; " Lumo " estas parto el " Largo " kaj " Allegro con fuoco ", movoj de *Simfonio Nova Mondo* de **Dvorák** ; " Universala naturo " estas adapto de fama maršo " Pompo kaj Cirkonstanco n-ro 1 " de **Elgar**. Ankaŭ " Maro Sadko ", " Zamenhof ", kaj " Cigno " estas tre konataj melodioj, sed mi ne identigis la originalajn verkojn kaj aŭtorojn.

La kovrilo estas parta reprodukto de murpentraĵo farita de **Norman Rockwell**, montranta la sidejon de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi montras plurrasulojn ridetantajn ; ĉe la centro, **Norman Rockwell** mem estas videbla, kiel blankrasa homo kun blua jako, tuŝante sian mentonon. Ankaŭ mikrofono estas malantaŭe surpentrita kiel prenata de azia infano. La vorto *Esperanto* krucas la fonon, je diafana blanka koloro.

La kajero enhavas la originalajn tekstojn en espo kaj tradukojn en la angla, franca, germana, hispana, itala, kaj japana.

Pri la muziko mem

Ĝi estas ĉefe elpensita laŭ rokmuzikaj skemoj, kun basgitaro, drummaŝino, kaj sekvencilo subtenantaj la sintezilajn sonaranĝojn kiuj plenigas la sonspacon.

Bonŝance, ili ne sonas kiel muziko por diskotekoj ! La drumoj ritmas jen simple jen iom pli komplike, ĉiam bonguste, sen akra ĉirpado sed ankaŭ ofte sen streĉo nek forto. Sonas ankaŭ elektraj gitaroj ludataj diverstile, tiel kontribuante al la senpersonecigo de la tuta verko.

La sonaranĝoj estas tre profesiaj sed samtempe malvarmaj : oni rapide rimarkas ke tiu estas laboro de produktisto, kvankam muzikisto.

Krom la ĥoroj, ne aperas aliaj akustikaj instrumentoj escepte de skotaj sakŝalmoj en " Astro Jupiter' ", kaj klasika gitaro dum mallonga momento en " Zamenhof ". Eble aliaj estas ludataj, ĉefe perkutinstrumentoj. Fakte plejparte devas esti samplitaj sonoj sed ili estas malfacile distingeblaj el la imitantaj sintezitaj sonoj.

Super ĉi ĉio la kantatajo flosas, ĉiele sonante, kvazaŭ kantataj de anĝelaj ĥoroj ; certe, kiam la ĥoro konsistas nur el blankaj voĉoj, tia estas la efiko !

La kantataj melodioj estas, preskaŭ ĉiam, tiaj famaj jam menciitaj.

Ili ludiĝas plejofte duvoĉe aŭ unuvoĉe ĉe mezaj registroj. Kiam ili sonas duvoĉe, la harmonio estas multfoje simple paralelaj tritoj aŭ sestoj, ĉefe ĉe tiaj fragmentoj originale verkitaj unuvoĉe. Iam ŝajnas soni multvoĉe sed neniam je komplika kontrapunkto.

La tekstoj

Ili estas mallongaj fragmentoj enhavantaj neniun klaran mesaĝon almenaŭ neniun klaran kompletan mesaĝon. Nur " Zamenhof " kaj eble " Tirano " havas plenkoheran sencon. La impreso post la unua legado estas ke multaj estas stultaĵoj. Ŝajnas ke la mesaĝo estas espo mem !

La gramatiko estas ĝusta, kaj ankaŭ la hispana kaj angla tradukoj.

Foje la teksto ne akurate akordas la kantitaĵon sed temas pri ne gravaj eraretoj.

La adaptado de tekstoj al melodioj ne estas tro bona, el muzika vidpunkto : tiuj melodioj tro ofte ŝanĝendis por alĝustigi la silabadon. Tamen, el lingva vidpunkto, la rezulto estas preskaŭ perfekta ! La vortoj akentiĝis korekte, neniu **i** aŭ **u** sonas kiel **j** aŭ **ŭ**, kaj reciproke. Ankaŭ la prononcado estas ĝusta.

Tamen la teksto estas nur pene komprenebla ĉe iuj kantoj, almenaŭ dum la unua aŭskultado, pro la ĥora aranĝo. Mi ne volas diri ke ĉi tiu ĥora aranĝo malpermesas kompreni la tekston bone ; preskaŭ male, ĝi estas efikema aranĝo por la aŭdebleco de la teksto ; sed ĉiuj ĥoraj kantoj estas ĉiam malfacile kompreneblaj.

La plej bonaj kantoj por komprenni la tekston estas " Zamenhof " kaj " Esperanto " ĉar ili estas komence kantataj de ununura persono.

Nepras unuafoje aŭskulti kaj sekvi legante la tekstojn.

Konkludoj

Ĝi estas bonkvalita muzikprodukto per tre profesia sonproduktado kaj ludado de muzikistoj, kantistoj, kaj ĥoroj. Sed rilate al muzika kreeco kaj originaleco... malmultajn bonajn ekstrajojn oni povas rimarki. Mi priskribus la rezultan muzikon kiel leĝera muziko, same kiel tia de, ekz-e, **Julio Iglesias** aŭ **Nana Mouskouri** : naiva, senpersoneca, neoriginala, nur mongajnema....

La nura originala alporto de tiu ĉi disko estas miaopinie, krom la espiĝo, la mikso de klasikaj ĥoroj kun modernaj sonaranĝoj, ĉar pli interesajn adaptojn el klasikuloj oni povas trovi ĉe rokmuziko : ekz. **Emerson**, **Lake & Palmer**, aŭ **King Crimson**.

Resume, ĝi estas perfekta kiel fona muziko por magazenoj, liftoj, atendoĉambroj de dentistoj, ktp....

WARNER MUSIC

Dua opinion donas Francisco José Dávila Dortala :

Pri Esperanto : alia recenzo

La disko estas tre bona kaj indas ĝin konsideri kiel donacon por aliuloj. Mi aĉetis 4 KDojn kaj ilin donacis inter personoj kiuj laŭ mi povus estonte espiĝi.

La orkestro ne estas simpla orkestro, sed vera simfonia orkestro altkvalita ; nur ke ĝi ludas muzikon laŭ la modernaj inklinoj : ritme. Sed ĝi certe estas bonega.

Pri la korusoj, laŭ mia opinio, oni rigardas ĉu ili ne estas espistoj kiuj bone regas nian lingvon, ĉu la prononcmaniero estas iomete malklara. Certe mi havis malfacilaĵojn por bone kompreni ilin, kaj mi nur tion atingis helpe de la kunigita broŝuro. Sed estas honeste, sufiĉe bona koruso.

La klasikaj kanzonoj de tiu disko, inter ili la " Hindia kanto ", de **Rimsky Korsakov**, estas ĝenerale bonegaj, tre bone elektitaj, kaj tio estas la sukceskialo.

Nepre legu recenzon aperinta en " KATA-LUNO " (NDLR).

Astre recenzas Floréal MARTORELL :

Esperanto, Astro Jupiter'

kaj la remiksoj

Ĝis nun ni neniam vidis grandan komercan diskeldonejon interesiĝi pri espo. Ne plu eblos diri tion : WARNER MUSIC SPAIN S.A. (WEA) faris la paŝon produktante albumon titolitan *Esperanto* kantitan en espo kun tekstlibreto en espo kaj pluraj aliaj lingvoj. Impresa kunlaboro inter artistoj, espistoj, kaj komercindustria diskeldonejo.

Sed tio ne sufiĉis.

Tuj post apero de la albumo, WARNER aperigis promocicele 6titolan KDon kun malsamaj remiksoj de la unua titolo de la albumo nome " Astro Jupiter' ". Tiu neatendita, nek anoncita KD ne disvendatas al la publiko kaj estis produktita en limigita kvanto. Ricevis ĝin precipe radiostacioj en Hispanio. Hazarde ni sukcesis devojigi kelkajn ekzemplerojn por kelkaj gravaj tutmondaj esporadioprogramoj – sen tio espistoj neniam havus okazon aŭskulti tiun unikaĵon kaj ĝi estus por ĉiam perdita por espokulturo. Tio trous, ĉu ne ? (Eĉ se temas pri tia elektronika komerca muziko).

Temas do, pri 6foje la sama titolo " Astro Jupiter' " laŭ stiloj :

1. Radiomikso, 3'52 (*Radio Mix*).
2. Revdancmuzika mikso, tipe diskoteka, 4'20 (*Dream Single Edit*)
3. La albumversio mem, 5'00 (*Album Version*).
4. Revteknodanca versio longdaŭra, 6'16 (*Dream Extended Mix*).
5. Ĝangala versio (ŝveba tekno kun mondmuzikaj influoj), 502 (*Trip Jungle Mix*).
6. Instrumenta mondmuzika malrapida versio, 3'55 (*Dub Single Reprise*).

Tiuj kiuj sukcesis trafi ekzempleron havas en siaj manoj raran unikaĵon : " kolektoron ". Kaj la malmultaj radioj kiuj disponas pri ĝi havas la gravan taskon disaŭdigi la diversajn versiojn por ke espistoj povu fojfoje profiti, malkovri, kaj eĉ ĝui ilin. Eĉ tiel malgrandkvante produktita, tiu KD ne forfalos en forgeson for de espokulturo.

La teksto de la ĥora kanto jenas :

" Astro Jupiter' "
Astroj jetitaj al turniĝado
Laŭ la orbitar',
Krucigataj kaj amasigataj
De egalaj fortoj.
Malliberigitaj
de la nedeĉifrebla
Flugado de la temp'
Kaj fendantaj la subtilajn
Spacojn de la lum'.

Konklude, tiu ĉi 6titola KD estas tiel bonkvalite produktita kiel la albumo, kun granda prilaborado en studio pere de plej aktuala altteknika sonaparataro.

La ideo intermiksi aktualajn rok- kaj teknodancsonojn kaj ritmojn kun malrokmuzikaj famaj eroj estas interesa – tio popularigas modernan muzikon ĉe malrokuloj kaj klasikan muzikon ĉe rokuloj– pliprecize dancteknouloj kaj mondmuzikuloj ! Tio estas tre bona – fakte muziko kaj espo mildigas la diferencojn kaj kontrastojn, kiuj tiel fariĝas pli elteneblaj por la diversaj generacioj. Do finfine ne tro malkontentiga rezulto, ĉu ?

Informoj ĉe :

Pascal LECAILLE

BP 3019 FR 69394 Lyon Cedex 03
Tel/Faks : +33 4 72 36 07 14
E-posto : pascal@zen.dedal.fr.net



Diskeldoneja

Ĝangalo

la unua subgrunda. En 1963 naskiĝis ESPERANTO-DISK', diskeldonejo kreita de **Bernard STOLLMAN**, kiu eldonis samjare la espalbumon *Ni kantu en esperanto*. El ĝi venas la fama movada kanto " La lingvo por ni ", kies rekantaĵo tekstas : " *Es-pe-ran-to estas la lingvo por ni, por ni.... "*

En 1964, ĝi evoluis kaj iĝis ESP-DISK'. Ĝia unua realigo estis albumo *Spiritual Unity* de la libera jazulo **Albert Ayler** aperinta en julio 64 en Nov-Jorko. Sekve ESP-DISK' produktis por multaj liberaj jazkomponistoj.

Iom post iom ESP-DISK' diversiĝis. En 1966 estis realigita unua albumo roka kun **The Fugs**, kaj tion sekvis multaj aliaj en diversaj stiloj. ESP-DISK' sukcesis kolekti ampleksan katalogon prezentante albumojn de bandoj kaj artistoj jazaj, funkrokaj, diskorokaj, acidrokaj (psikedelaj), punkrokaj, folkaj, ktp. ESP-DISK' estis la unua inter la subgrundaj diskeldonejoj, kies slogano estas indikita sur ĉiu albumo : *"Nur la artistoj mem elektas tion kion vi aŭdos sur ilia ESP-DISK"!"*

Laŭ evoluo kaj diversaj krizoj, ESP-DISK' ĉesis produktadon en 1976. En 1981 la diskeldonejo ESP-DISK' estis transprenita de **Flavia STOLLMAN**, kiu estis atenta pri la diversaj scenejoj en " vudstoka " [*Woodstock*] kampo, kaj nova programo komenciĝis en 1993 kun apero de diversaj albumoj kaj kompilaĵoj. Hodiaŭ, ŝajnas ke ESP-DISK' daŭre vivas, ĉar la katalogo ankoraŭ validas kaj el ĝi eblas mendi la indikitajn produktojn.

Paralele **Bernardo** survojigis novan projekton kiu progresas tre rapide. Temas pri UNIKOM, aŭtomata interlingva traduksistemo uzante espon. Kunlaborantoj espistaj inkluzivos lingvistojn, leksikografojn, tradukistojn, kaj programistojn (*VB*) por la 77 lingvoj parolataj de pli ol 88% de la monda popolaro. Informoj kaj eventualaj mendoj de ESP-DISK' adresendas al :

ESP-Disk'
PO Box 3968
KINGSTON, NY
12402
Usono
Tel : +1 914 437 0200
faks : +1 914 657 2861
e-mail : esp-disk@ aol.com Http :/esp.disk.com

Pliaj informoj pri UNIKOM haveblas ĉe :
UNIKOM LLC
PO Box 3968
KINGSTON, NY
12402
Usono
Tel : +1 914 437 0200
faks :+1 914 659 2861
e-mail : unikom@ tio.net http :/unikom.com



Ne plu aŭskultu indiferentecon : RROSE SELAVY. Jen diskeldonejo pri nekutimaj kaj malsamecaj muzikaĵoj bazitaj en la rokavangarda urbo Rennes en Bretonio, Francio. Tiu diskeldonejo subtenas sendependajn artistojn (pentristojn, fotistojn, grafistojn, videistojn, filozofojn...) kaj muzikgrupojn kies muziko estas kreema kaj eksperimenta. RROSE SELAVY eldonis plurajn albumojn de diversaj bandoj kaj



ankaŭ kompilaĵon kun partopreno de diversaj el ili. Aperas nomoj kiaj **Vein** (eksperimenta sintezila popo), **Complot** (ŝveba teknoo), **Venus de Rides** (eksperimenta ritmohipnota muziko). Unu el la plej elstaraj estas la bando **Torii Kami**. Ĝia muziko nedifineblas, ĝi prezentiĝas kiel elektronika fabelo kun etosoj strangaj, fascinaj, kaj foje ankaŭ kun jazeca koloro duonvoje inter abstrakteco kaj sciencfikcio, vojaĝante inter diversaj mutacioj. Vera muzika sintakso intermiksante plej aktualajn sintezilajn sonojn kun ekstrem- kaj mezorientaj etnaj instrumentoj, kaj miksaĵo de lingvaj voĉsonoj kiuj plej ofte arabecas. Titoloj kiaj " China Chain ", " Climats " (Klimatoj), " Locos en syncope " (Frenezuloj en sinkopo), " News X ", " Oiso mû ", " Jungle (day) ", " Une autre rive asiatique " (Alia azia bordo), " Obscure lumière " (Malluma lumo), " Les animaux du monde ", " India Fuse " (La bestoj de la mondo, Hinda fuzaĵo), " Piano pluie " (Pianopluvo) donas ideon en kiun etoson vi merĝiĝas aŭskultante tian impresan verkon. Se vi deziras ŝanĝi viajn muzikajn kutimojn kaj vojaĝi alliloken, tie ĉi vi trovos vian feliĉon. Malkovrindaj produktoj abundas tie :

Rrose Selavy
BP 521
FR-35006 RENNES Cedex
Tel : +33 2 99 31 30 13
faks :+33 2 99 31 30 83

Moskokids

Jen ilia unua KDalbumo ĉe BARCLAY-POLYGRAM (1996). Kiel estis edukitaj tiuj geknaboj ! Naskiĝintaj inter la 80aj kaj 90aj jaroj, tuniz- kaj maŭritandevenaj, ilĵ mirigas nin pro sia ritma varmo el la popolkvartaloj. Jam en 1992, **Manu Chao** (de **Mano Negra**) petis de ili kunlaboron en la albumo *Casa Babylon* en titolo " El Alakran " – tiam la plej aĝa estis 12jara kaj la malplejaĝa estis... 3jara ! Ekde tiam, ilia apero sur scenejoj multobliĝis kaj la bando de la suburba kvartalo Moskowa en Parizo, Francio, aŭdigas sian voĉon kaj talenton. Laŭ formo klara, ĝojiga, kaj senzorgema, ili elektis la feston per roko kolorigita de regeoropo. Sed tio ne forigas el iliaj tekstoj la mesaĝojn simplajn, plenplenajn de sentoj, kaj bone orientitajn pro ilia socia sentemo. Ili eĉ kantas titolon de la bando **Lofofora** " Justice pour tous " [Justecon por ĉiuj]. Ili kantas en la franca mikse kun lerneja slango. La muzikistoj kiuj akompanas ilin en tiu 13titola albumo estas tiuj de **Dirty District**. Kontakto :

Planète Moskow (Loran STEVAN)
16 rue Bonnet
FR 75018 PARIS
Francio
Tel : +33 1 42 63 16 26

estas diskeldonejo en Marsejlo (Marseille, en Provenco, sudorienta Okcitanio, Francio), starigita pro neceso en 1989 por diskonigi la turneojn kaj diskproduktojn de lokaj muzikgrupoj, interalie tiujn de **Massilia Sound System**, la plej antaŭa de la diskeldonejo. RÒKER PROMOCION celas disvastigi repon kaj ragamufinon por krei pontlingvon inter la generacioj kaj la tradicioj. RÒKER PROMOCION de la komenco laboras kaj agadas por okcitana kulturo kreante personecan sonon, majstranta kaj kunliganta muzikajon de ĉiuj originoj pere de sia surbendigostudio L'Estudiò Zerò en Vitrolles (marsejla apudurbo). Fakte, RÒKER PROMOCION estas sendependa diskeldonejo kiu sukcesis lanĉi bandojn kiajn **Fabulous Trobadors** kaj **Massilia Sound System** – grupoj kiuj fariĝis referenco ne nur en Okcitanio sed ankaŭ en tuta Francio kaj ekster ĝi. Ĝi sukcesis kunproduktadojn kaj distribuadon kun, en la komenco, BONDAGE, kaj poste kun SHAMAN/MERCURY. Krom **Fabulous** kaj **Massilia**, la plej famaj, RÒKER PROMOCION produktas aliajn bandojn de Okcitanio kaj eĉ de Italio pere de kompilaĵoj kiaj *Ragga Baleti* vol.1 (15 repaj kaj ragamufinaj bandoj), *Fondamentale* vol.1 (itala ragamufino & hiphopo) kaj *Double Tribu* kun **Toko Blaze**, **Black Lions**, **Wadada**. Plejparto de tiuj produktoj estas plurlingvaj precipe okcitane kaj france, sed foje ankaŭ arabe, itale.... RÒKER PROMOCION sukcesis krei sian reton TÒRNAVIRA por organizi turneojn; sed ankaŭ por informi per la fanzineto *Le courrier* kaj reto de fanoj kiuj tiel povas fari interŝanĝojn kaj eĉ gastigadon en Okcitanio kaj cetera Francio; kaj eĉ pli, nome Massilia Chourmo (iom kiel Amikeca Reto kaj Pasporta Servo rezervita por ties ragamufinmovadulojn). Ĉiuj ĉi servoj (RÒKER PROMOCION, l'Estudiò Zerò, *le Courrier*, Massilia Chourmo) kontakteblas ĉe sama adreso :

Ròker Promocion
(nomo de la koncerna fako)
6 boulevard Bouès
FR 13003 MARSEILLE
Okcitanio, Francio
Tel : +33 4 91 957 500 / 600
faks :+33 4 91 957 980
http ://lia.imtmrs.fr/cybercafe /Massilia.html

Huchal de EV ĉe DECLIC COMMUNICATION, distrib. VIRGIN (1996). La bretonfinna bando aperigas sian 3an KDalbumon. **EV** forlasis LOLA LABEL por pli granda diskeldonejo mondmuzika pli faka en etna muziko kaj kun pli granda distribuado. La bando, kiu kantis la espotitolon "Knabin' de Sarre" en *Vinilkosmo-Kompil'* Vol. 1, prezentas en tiu ĉi nova albumo 12 titolojn en la bretona, finna, kaj unu en la franca. La stilo de **EV** konservas daŭre sian vojon en roko kun influoj el la tradicibretona muziko ("etnokeltrokpopo", ili mem tiel difinas sian muzikon). *Huchal* signifas "krii" en la bretona. Post *Distruj* kaj *Reuz*, tiu ĉi albumo estas fidela logika sekvo de la antaŭaj, iom pli milda kaj melodia. Ĝi ne seniluziigos tiujn kiuj ŝate aprezis ilin.... Kontakto :

EV
p/a Declic Communication Bretagne
Patricia TEGLIA
51 boulevard de l'Égalité
FR 44100 NANTES / NAONED
Francio
Tel : +33 02 40 46 60 64
Faks :+33 02 40 58 52 84

Peuh! de **Lofofora** ĉe HOSTILE LABEL, distrib. Virgin.

La pariza fuzrepa bando furoregas en tuta Francio, kaj apenaŭ jaron poste aperigis novan albumon kun ĉiam tre bonaj tekstoj pri aktualaĵoj kontraŭ rasismo, maljusteco, mizero, militoj, ktp... la listo estas tro longa. En sia muziko **Lofofora** radikala, kaj perfortagresema perfortecon de la ŝtata povo precipe kontraŭ la marĝenulojn, senhejmulojn, kaj *Peuh!* estas ribela krio por en la direkton pli hardkoran *Peuh!* estas vere tre prema ĝis freneziĝo intensaĵn momen-14 titoloj en la franca kiuj la lasta 16,06minutdaŭra laŭ etoso sukcesas kvietigi kaj disko por tiuj kiuj ŝatas fortajn ne timas kruelan veron . fariĝas pli akra, respegulante tiel la kontraŭ la socion, senlaborulojn, alihaŭtkolorulojn. timiĝi, kaj tio iras kiun ili nun sekvas. albumo kiu puŝas tojn tre alttensiajn. bategas vin, tamen psikedela hinda malstreĉigi. Bona emociojn kaj kiuj Kontakto :

Lofofora
p/a Sriracha Sauce
2 rue Carpeaux
FR 75018 PARIS
Francio
Tel/faks : +33 1 44 85 00 67

Mág de **Milan Dočekal** ĉe JUMBO RECORDS (1996). **Milan Dočekal**, klavaristo kaj kantisto de **Team'** el Slovakio, komencis sian solokarieron same kiel faris **Pavol Habera**, **Bob Kantor**, kaj eĉ **Dušan Antalík** (ĉiuj membroj de **Team'**). **Milan** estas la kantisto de la titolo de **Team'** en la 2a volumo de *Vinilkosmo-Kompil'*, " Kapon redonu ". Tiu ĉi soloalbumo laŭstile estas tre proksima al la albumoj de **Team'**, kun sono iom pli milda. En *Mág* (Magisto), baladmuzikŝatantoj plene ĝuos titolojn kiajn

" Pani v Čiernom " aŭ " Sára ". Tamen ĝi restas en melodiroka stilo kun metalaj pintoj " Len kvôli nám ", " Biely kôň ", " Hej Život ! ". Jes, vere oni sentas ke **Milan** havis/as grandan influon en **Team'** : " Kúp si Disneyland ", " Bol raz muž ". 11 titoloj, ĉiuj en la slovaka, tre kvalite produktitaj. Sajnas ke la KD estas distribuata nur en Slovakio kaj Ĉeĥio. Informojn kaj eventualajn mendojn printraktos la manaĝisto :

Stano MARČEK
Zvolenská 15
SK 03601 MARTIN
Slovakio
Tel/faks : +42 842 37 145

Prophètes et nains de jardin

de **Ludwig Von 88**
ĉe PIAS FRANCE (1996).
Ĉe la ektaĝiĝo de la 3a jarmilo, kaj spite al krizo kaj estontaj revolucioj kiuj nin gvatas, estas tempo por festi kaj malami kelkajn homojn kaj virinojn kiuj iel sukcesis tremigi homamasojn pro entuziasmo kaj rabia kolerego dum tiu ĉi tumulta jarcento. Jen ĉe jarfino 96 nova produkto de **Ludwig Von 88**, kiun antaŭanoncis kvartitola KDisko aperinta komence de 96. Ĝi ahvenis oportune kaj certe furoros pli ol la ŝlagra " Makarena " ! *Prophètes et nains de jardin* (Profetoj kaj ĝardennanoj) enhavas 22 titolojn relative mallongajn po ĉirkaŭ 2min. (tiel ofte estas por la rapidegaj muzikaĵoj), ofertas satiran kritikon karikaturan de famaj homoj de nia jarcento, inter alie **Maria Calas**, **Placido Domingo**, **Ceausescu**, **Ayrton Senna**, **Haroun Tazieff**, **Eddie Van Halen**, **Arlette Laguiller**, **Pocahontas**, **Jim Jones**, **Jacques Chirac**, **Jodie Foster**, **Beethoven**, **Ludwig von 88**, unu el la malpostpunkaj jaroj 80aj en ĉiam egale je si mem, restas sante titolojn postpunkrokajn ĉe limoj de regeo kaj franca aŭ io simila. La bando rokspektaklojn tre dum preskaŭ jardeko spektancertoj. **Ludwig Von 88** forlasis por la nuna diskeldonejo :

Pias France
11 rue de Clichy
FR 75009 PARIS
Francio
Tel : +33 1 44 53 71 33
faks : +33 1 44 63 01 83

Pagaille Générale

de **Les Sheriff** ĉe À DONF ' /PIAS FRANCE.
Pagaille Générale (ĝenerala malordegaĉo) estas dumkoncerta10titola KD kun plej sukcesaj titoloj de la legenda bando **Les Sheriff** de Montpellier (sudfranca urbo, kongresurbo de UK 98 !). **Les Sheriff** pruvas ke rokenrolo ne estas malsano, sed vera alternativo al alternativo mem. Ili estas pure rokenrolo ! Ili naskiĝis hazarde samtempe kiel la tajdo de la franca punko en 1984. En 1987 aperis ilia unua albumo *Pan !*, kaj dek jarojn poste tiu ĉi viva ĝenerala malordegaĉo, jen la 7a.

La neeskapebla dutakta roko fajrigas la scenejon frenezigante ŝatantojn kaj fanojn de **The Ramones** (famega postpunka usona rokbando). Ĉiuj tekstoj en la franca, tre krudaj frapas oscilante inter alarmiga humuro kaj efika ĝisosta simpleco, preferante entombigi falsaĵn poetojn kaj verajn demagogojn. Jen mordaj titoloj survoltitaj kaj densaj, saturitaj per simpatiaj melodioj kaj plenkorpaj gitaroj. Kiel la ses antaŭaj albumoj, tiu ĉi lasta montras ke *Les Sheriff* estas vere roka kvinopo. Unuvorte, puruloj ! Diskografio de la bando haveblas ĉe :

À Donf ' /Pias France
11 rue de Clichy
FR 75009 PARIS
Francio



Les Enfants du Silence

Les Enfants du Silence (La infanoj de silento) estas fanzineto plenplena je informoj pri la franca alternativa rok-kaj-popscenejo. Zorgas pri ĝi **Erik BONNET**. Krome, antaŭnelonge LES ENFANTS DU SILENCE fariĝis diskeldonejo kun la eldono de sia unua produkto. Temas pri 5titola KD kaj kasedo titolita *Secret Garden E.P.* de **Erik Bonnet** mem kun lia bando konsistanta el : **Erik Bonnet** (voĉo, gitaro ADD) ; **Chris Batis** (klavaroj, programado, aranĝoj) ; **Alex Dubessy** (gitaro, basgitaro) ; **Roland Herhuit** (drumo) ; **Jean Pascal Boffo** (sonreĝisoro). La fanzino *Les Enfants du Silence* prezentas tiun KDon tiel ĉi : *" Insida kaj luna popo franceca el kiu ŝvitas la versoj de* **Scott-Fitzgerald**. *La vortoj kaj la gitaroj kune fluas en saman riveron, sen barajo, nek ĉirkaŭiro, al sama oceano... mileloken....* " Jes, falte temas pri sufiĉe molŝveba popo kun amkaresteneraj tekstoj dediĉitaj al knabinoj. La kvin titoloj sin sekvas jene : " Je prie " (Mi preĝas), en la franca kaj angla ; " Secret Garden ", en la angla, dediĉita al **Isabelle**, la plej malrapida de la KD ; " Reviens à moi " (Revenu al mi), en la franca ; " Le miel " (Mielo), la plej elstara ; " Colors " (Koloroj), titolo en la angla sed kantoteksto en la franca. La KD estis ellaborita en Studio AMPER, sama studio en kiu surbendigis plurfoje la bando **Tutti Futti** . KD, kasedo, kaj fanzino mendeblas ĉe :

Les Enfants du Silence
p/a Erik BONNET
75 rue du Haut de la Marche
FR 57535 MARANGE-SILVANGE
Tel : +33 3 82 53 47 87
E-mail : pierro@ easynet.fr



Kraŝ-Disk' subgrundas

CRASH DISQUES estas alternativa diskeldonejo kreita de **Marsu**, famkonata en la alternativa subgrunda franca scenejo – legu pri li en ***ROK-gazet'*** n-ro 4. **Marsu** forlasis BONDAGES PRODUCTIONS por starigi propran diskeldonejon helpe de **Katerina** – tiel li daŭrigas per CRASH DISQUES la pasiegan laboron kiun li de ĉiam faras : tio estas, subteni la alternativajn subgrundajn bandojn kiuj havas sociprotestan mesaĝon por transdoni. La diskeldonejo kreiĝis en 1993 kaj jam produktis multajn albumojn, inter ili **Les Gnomes**, **l'Infraktion**, **Sergent Garcia**, **Babylon Fighters**, **Shout**, **Yo Pizza Jump**, laŭ stiloj punko, regeo, repo, kaj hardkoro.
CRASH DISQUES produktis ankaŭ plurajn kompilaĵojn. Antaŭnelonge estis eldonita la kompilaĵo *Tchatche Attack*. Temas pri kompilaĵo kun 16 bandoj de la hiphopmovado, kiuj sturmas la sistemon. La KD titoliĝas *La ofensivo*, kompilo de bandoj repragamufinkoraj kun interalie **Kabal**, radikala repo ; **La Casa del Phonky**, histera repo hardkora kantita mikse hispane kaj france ; **Spicy Box** ; **Bouducon Production**, okcitana repo ; **Sergent Garcia Salsa**, ragamufino en la hispana ; **E=2MC**, repo kun titolo en la latina lingvo ; **Timide et Sans Complexe** ; **Jendah Menga + Papa Loco** ; **Hipnotik Gang** el Marsejlo. trubadurmufinaj amikoj de **Masilia Sound System** – ili troviĝas ankaŭ en la kompilaĵo *Raggu Balèri* produktita de ROKER PROMOCION, ktp. Tiu kompilaĵo estas vera pamfleto kontraŭ la institucioj kaj la politikaj paroladoj, kun granda muzika malfermiĝo de rephardkoro ĝis latina ragamufino trairante triphopon. La tekstoj estas radikalegaj kaj sen koncedoj ; pure aŭtenta subgrundaĵo aktuala.
Sed CRASH DISQUES ne pensas endormiĝi post tiu ĉi sukceso – ĝi daŭre strebas kaj eĉ antaŭanoncas novaperontan kompilaĵon kontraŭnuklean kunproduktotan kun ON A FAIM !, anarkidiskeldonejo, kaj PIAS. Tiu nova kompilaĵo titoliĝos *Méfiez-vous des champignons* (Estu singarda pri fungoj). La tekstoj de bandoj kiaj **Ludwig von 88**, **Burning Heads**, **UN Dolor**, **Original Disease**, **Les Thugs**, **Portobello Bones**, **Lagony** (el Tuluzo), **Negu Gorriak** (Eŭskio), **100.000**, ktp., akre mallaŭdegos kaj fekumos kontraŭ la nerespondecon de sciencistoj, la senkonsciencecon ĝeneraligitan flanke de registaroj, kaj la kombinaĉojn militistajn-industriistajn. 'Stos vera bombo kiu pensigos pri atomenergiindustrio *Superphénix*, La Hague, Ĉernobil, ktp. Ĝi estos plurlingva tamen ne espo). Produktoj haveblaj ĉe :

Crash Disques
(Katerina, Marsu)
21 ter rue Voltaire
FR 75011 PARIS
Francio
Tel : +33 1 43 72 71 60
Faks : +33 1 43 72 71 61



Malkovrindaĵo

Unuvoĉe raportas Luit STAGHOUWER

Unu voĉ' tutmonda

Rob DE NIJS naskiĝis en orienta Amsterdamo la 26an de decembro 1942. Jam kiel juna knabo Rob malkovris ke plaĉas al li troviĝi en la centro de interesiĝo. Kiam li estis okjara, liaj gepatroj donacis al li akordionon ĉar ili opiniis lin muzikema. En la lernejo okaze de lernejaj festoj Rob ludis akordionon kaj aperis en teatraĵoj. En la unua klaso de altlernejo, Rob diligente studis kaj bone progresis. Denove li estis sukcesoplena en la jara teatraĵvespero. Recenzo en ĵurnalo aparte menciis la bone luditan rolon de **Rob DE NIJS**. Rob fiere legis kaj centfoje relegis la recenzon.

La muziko pli kaj pli okupis gravan lokon en la vivo de juna Rob. Precipe la muziko de **Little Richard** kaj **Jerry Lee Lewis** grave impresis lin. Anserhaŭton tiu muziko kaŭzis! Pri la ĉiutagaj seriozaj lecionoj en la lernejo Rob ne same interesiĝis kiel pri muziko kaj teatro. Ne estis mirige ke en la dua jaro li ne plu havis kontentigajn rezultojn. Rob preterlasis instruhorojn kaj akiris tro da nesufiĉaj notoj. Koncize dirite : la problemoj abundis. Post teda insistado, Rob ricevis sian dezirajon. Liaj gepatroj interkonsentis ke li forlasu la lernejon por ke li povu vizitadi teatran lernejon.

Almenaŭ se li estus bonvena! Montriĝis ke oni volonte bonvenigus lin, sed nur post la kvinjara lernejinstruado. La avino de Rob konsilis lin provi alian eblecon : kabaretlernejo. Kabareto, kombinaĵo de teatro kaj muziko. Kian bonan ideon avinjo havis!

La kabaretlernejo estis vespera lernejo. Dumtage la gelernantoj devis perlabori monon por vivteni sin. Najbarfiloj de Rob intertempe fondis rokenrolan bandon, **Apron Strings**. Kvankam Rob tute ne intencis fariĝi kantisto sed kabaretisto, li tamen akceptis ilian proponon. Kune ili gajnis multajn " talentmalkovrojn ". La repertuaro konsistis ĉefe el kantoj de **Cliff Richard and The Shadows**. La pli juna frato de Rob ludis en alia bando, **The Lords**. Ankaŭ ili sin enskribis por talentmalkovro, sed ne havis kantiston. Ili interkonsentis ke unufoje Rob estu la kantisto. Ili superis en la regiona konkurso kaj penetris en la tutlandan finalon en la Amsterdama Koncertejo. Estis la 23a de junio 1962. Ili gajnis la unuan premion! La ĉefpremio estis diskokontrakto por tri disketoj.

De liefste die ik ken " (La plej kara kiun mi konas), traduko de *Point of No Return* " (Senrevena punkto) de **Carole King** kaj **Gerry Goffin**, estis la unua disko de Rob. Rob tiam estis unu el la dancistoj en televida programo. En ĝi oni liberigis kelkajn minutojn por la kantisto **Rob DE NIJS**. Estis lia unua vera televidprezento! Vendiĝis 900 ekzemploroj de la unua disketo de **Rob DE NIJS**. De la dua disko la publiko aĉetis eĉ malpli da ekzemploroj. La tria disko estis traduko de la usona sukceso " *Rythm of the Rain* ": " Ritme van de regen " (Pluva ritmo). Ne malpli ol 98.000 ekzemploroj vendiĝis. La publiko pli kaj pli interesiĝis pri **Rob DE NIJS**. Ĉiu volis ĉeesti prezentadon de **Rob DE NIJS** kaj **The Lords**.

Sekvis preskaŭ senfina vico de festvesperoj, dancvesperoj, prezentoj por dekkelkjaruloj, ktp. Somere de 1963 Rob estis unu el la kantistoj de la nederlanda skipo por la famkonata kantfestivalo de Knokke, Belgio. En junio 1963 stariĝis la klubo de admirantoj de **Rob de Nijs & The Lords** kaj ili fariĝis konstantaj kunlaborantoj de muzikprogramo. La televido sekvis en junio 1964. Estis granda sukceso. Oni elsendis ok **Rob DE NIJS**-televidprezentojn.

La 13an de novembro finiĝis la kunlaboro de **Rob DE NIJS** kaj **The Lords**. La **Jumping Jewels** estis la nova akompananta bando de Rob. Ĉis tiam ĉi tiun bandon oni menciis en unu spiro kun la nomo de alia fama nederlanda populara kantisto, **Johnny Lion**. Pro neceso la bando ek de tiam nomiĝis **The Jays Jays**. Sed grandaj sukcesoj forrestis kaj la diskokontrakto ne estis daŭrigita.

Sekvis kelkaj malfacilaj jaroj. La repertuaro de la nederlandlingvaj facile kunkanteblaj kantoj estis tute forpremita de la nova sono el Britio : la sono de **Beatles** kaj **The Rolling Stones**. Klopodoj de Rob kaj **The Jays Jays** akiri sukceson en Germanio fiaskis. Post tio, kaj **Rob DE NIJS** kaj **Johnny Lion** akceptis proponon de **Toni Boltini** aperi en lia cirko dum sep monatoj (en 1966). Proksimume 330 prezentoj en homplena cirkotendo alportis multajn spertojn sed nur malmulte da mono. Kaj post tio, ĉio subite finiĝis.

Denove **Rob DE NIJS** travivis ege malfacilan periodon. Li fariĝis trinkejestro kaj nur kelkfoje li povis perlabori iom da mono kiel kantisto. Sed tamen oni ne tute forgesis lin. Per rolo en la muzikteatraĵo *Sajjuns Fiksjun* (la " nederlandlingva " nomo) en 1969 kaj poste ankaŭ, per rolo en la nederlanda versio de la usona muzikteatraĵo *Salvation*, li regajnis la atenton de la publiko. Kaj ankaŭ la televidaj serioj *Oebele* kaj *Hamelen* (1971) denove alportis sukceson.

Rob estis invitita kiel kunludanto en kabareta programo en la malgranda teatro Tingel Tangel, teatro por engaĝita (limigita) publiko. Rob trovis sian tiel deziratan scenejon. Samtempe Rob kune kun fama nederlanda verkista paro **Lennaert** kaj **Astrid Nijgh** preparis novan repertuaron. Ĉar la nova materialo estis tute alia ol la antaŭaj sukcesoj, ili nur post granda peno sukcesis interesigi diskokompanion pri ĉi tiuj kantoj. Longludan diskon (LP) oni opiniis tro granda risko. Ŝajnis ke la devizo de la kompanio estis " vidi kien kuras la leporo ". Sed la unua kanto, titolita " Jan Klaassen ", fariĝis sukceso. Alia fama nederlanda kantisto de la seskaj sepdekaj jaroj, **Boudewijn de Groot**, produktis la diskon. En majo 1973 " Jan Klaassen " atingis la 33an lokon de la plej ŝatata kvardeko en Nederlando. Ĉi tiu kanto estis la unua furorkanto de **Rob DE NIJS** depost " Anna Pauwlona " (laŭ " *Guantanamera* ") en 1966. En septembro 1973 sekvis alia furorkanto, " Zuster Ursula " (Fratino Ursula), kiu atingis la trian lokon. Diskego ne plu estis problemo. La publiko elektis la 31jaran **Rob DE NIJS** kiel la plej promesplena kantisto por 1974.

La renovigita **Rob DE NIJS** denove furoris per vere matura repertuaro, per kiu nova kaj juna publiko estis atingita. Sed la kombinado kabareto-artisto ne plu estis daŭrigebla. Rob tial adiaŭis la teatron Tingel Tangel. En 1976 Rob fariĝis la plej populara nederlanda kantisto en Nederlando. Du grandaj sukcesoj en 1975 (" Malle Babbe ") kaj 1976 (" Zet een kaars voor je raam ", traduko de " *Can I Get There by Candlelight* ") kaŭzis tiun popularecon. Diskego de Rob atingis la unuan lokon en la nederlanda listo de sukcesaĵoj.

Fine de 1980 Rob ricevis el la manoj de **Cliff Richard** kaj oran kaj platenan diskojn por la diskego *Met je ogen dicht* (Per fermitaj okuloj). Ankaŭ je la fino de 1980 Rob renkontis sian postan edzinon **Belinda Meuldijk**. Belinda fariĝis ege grava faktoro en la vivo de Rob – ŝi verkis multajn bonegajn tekstojn por li. En 1982 post dudek jaroj Rob sukcesis havi sian propran teatroprogramon kun perfektaj sono kaj lumo kaj bonega grupo de muzikistoj. De la programo oni produktis diskegon kaj vidbendon. Estis la unua vidbendo de nederlanda artisto. Proksimume 62.500 adorantoj vizitis la 65an Springlevend-koncertojn. Pro la teatroprogramo *Vrije Val* (Libera falo) de 1986-1987 Rob estis honorigita per sia tria Edisono (grava muzikpremio en Nederlando). Unuan Edisonon li jam ricevis en 1965 kaj duan en 1986. Ĉar la diskego *Roman* (Romano) bonege vendiĝis, Rob denove estis premiita per ora disko.

En 1987 Rob festis sian 25an jubileon. La libro *Zilver* (Arĝento) rakontas pri la kariero de **Rob DE NIJS**. En 1989 li denove gajnis gravan nederlandan muzikpremion. En 1990, post 27 jaroj de nederlandlingvaj furorkantoj, Rob faris surprizan movon prezentante la anglalingvan diskon *Stranger in Your Land* (Fremdulo en via lando). La tridek jarojn (1992) li festis per speciala teatra programo *Vallen en Opstaan* (Fali kaj stariĝi). En 1994 Rob dufoje koncertis por kristnasko en granda foirhalo. La koncertojn ĉeestis 12.000 personoj.

Rob ankoraŭ daŭre evoluas kaj kompilas repertuaron de konstanta kvalito. Precipe dank' al la sentemaj tekstoj de lia edzino kaj lia plej grava tekstverkistino **Belinda Meuldijk**, liaj kantoj havas profundecon. Preskaŭ por ĉiuj albumoj Rob ricevis oran aŭ platenan diskon. En sia repertuaro Rob havas pli ol 500 titolojn.

Liaj pasioj estas la muziko kaj sia Harley Davidson. Je malicplezuro de la skandalfranda gazetaro, plaĉas al li vestiĝi okulfrape. Nuntempe la muzikistoj de Rob nomiĝas **Pur Sang Bando**. Ĉiujare Rob prezentiĝas dum teatra turneo (en Nederlando kaj Belgio) kaj en decembro 1995 estis ses specialaj kristnaskaj koncertoj en lia programo. La teatra turneo por 1996 nomiĝas *Rob DE NIJS : la kantisto, la bando, kaj la knabineto*. Regule aperas novaj diskoj. En 1995 inter alie aperis anglalingva dueto kun **Demis Roussos**, " On My Own ".

Unu voĉ' tutmonda

Je unu flanko la novaĵoj, kiuj ĉiutage prezentas al ni mondon plenan de konfuziĝo, timo, milito, kaj malsato. Je la alia flanko la infano tute senkulpa kaj malpacience esplori tiun saman mondon. Unu voĉo por tiu ĉi mondo, unu lingvo por ni ĉiuj, kaj eble en la estonteco paco por ĉiuj. Tro idealisma ? Eble, sed ĉu ne estas pli bone almenaŭ nutri la esperon ?

Kial esperanta versio de " Wereldwijd één stem " ? **Rob DE NIJS** ne estas espisto, sed lia motivo estis lia simpatio por la idealista flanko de la espomovado. Liaopinie tiu idealo bone harmonias kun la pacama teksto de la poemo. **Rob DE NIJS** tial petis sinjorinon **A. J. Middelkoop**, kompilinto de vortaro *Nederlands-esperanto-nederlands* ĉe PRISMA, traduki la poemon de lia edzino, kaj li telefone diktis la tekston al ŝi. Poste Rob surbendigis la voĉegadon de la espa teksto de s-ino Middlekoop. Krome li ricevis de ŝi la prononce adaptitan tekston por la virina ĥoreto. Ĉar la teksto estis diktita, s-ino Middlekoop havis neniun ideon pri la melodio aŭ la ritmo. Post du tagoj montriĝis ke la finaj vortoj de la traduko ne estis bone kanteblaj, sed tuja akceptebla solvo ne estis trovita. Ili tial lasis la aferon. Poste, kiam la kompaktdisko estis preta, montriĝis ke *the problem* solviĝis per la uzo de *some* anglaj *wordoj*.

"Unu voĉ' tutmonda " estas la nura esplingva kanto de unu el la plej bonaj kaj plej ŝatataj nederlandaj artistoj, **Rob DE NIJS** :

Ek sileato de l' despeko
kodiĝoj ek seal'.
La bildaĵ de agreso
Proklamas datoń wi.
Mia ĝil' tuŝatoila domaĝs,
Sea preĝo pri malic'.
Ek ła komenc' de l' ĝiro
Sezeaos ła ĝeliĉ'.

Unu voĉ' tutmonda.
Mi vidas tuŝoja, bowboja
brilkoŭtoja ek ła sun'
kaj pacoa kaŝkufotoa
ek wegatua'.
Oriente, okcidente
vołkoas wia ła wok'
kaj ek ifia saĝo
ła pac' estas wia sok'.

Unu voĉ' tutmonda.
Mi ĝojegsetas soldatoj
kun ĝiraĝoj sua ła tea'
kun okulaj nekredenaj,
estis D' ja ifia pastea'.
Pacoigas wi l' malkamon,
espiriĝas kondoleac'
kaj tao wołłoste, tadie,
paokoas ła konsticac'.

Unu voĉ' tutmonda.
Vespere ĝoje neŭos
wi pri ĝutuŭa tag'
de ĉies liberiĝo
el bowbwaaca ptag'.
Mi iaas al mia ĝiło
kaj jes, ek fia ĝiraĝ'
łoiste domaŭtą, tuoiiĝas
ła de wi sopiaata pac'.

Unu voĉ' tutmonda.



Fan Club Pur Sang
Postbus 3002
NL 1780 GA DEN HELDER
Nederlando
tel. +32 223 63 30 56

Kontakto ĉe la fanklubo (skribu nederlande aŭ angle) :

Diskaro

KDoj Referencoj

1980	Met je ogen dicht	EMI CDP 746251 2
1981	De regen voorbij	EMI CDP 746250 2
1983	Roman	EMI CDP 746245 2
	Grootste Hits	Philips 824442 2
	'80-'82	EMI CDP 127160 2
1985	Pur Sang	EMI CDP 127191 2
	De mooiste liedjes van	EMI CDP 747650 2
1986	Vrije val	EMI CDP 746353 2
	Rock and Romance	EMI CDP 746235 2
1987	Zilver	EMI CDP 748309 2
1988	Springlevend (duobla KD)	EMI CEM 791468 2
	In de uren van de middag	Philips 834362-2
	Kijken hoe het morgen wordt	Philips 834912-2
	Rob de Nijs	Philips 822598-2
	Tussen zomer en winter	Philips 832320-2
1989	Compleet deel 1	EMI CDP 793538 2
	De reiziger	EMI CDP 792253 2
1990	Compleet deel 2	EMI 795586 2
	Stranger in Your Land	EMI 794577 2
1991	Favorieten van toen – Rob de Nijs	Mercury 848985 2
	Hartslag	EMI 797888 2
1992	Vallen en opstaan 30 jaar hits (duobla KD)	EMI 780305 2
1993	Tussen jou en mij	EMI 827480 2
	15 jaar hits f962-1977 (duobla KD)	Mercury 514574 2
1994	Kijken hoe het morgen wordt	Mercury 522107 2
1994	Iets van een wonder	EMI 8311312 7

KDetoj (po du aŭ tri titoloj)

1988	Wereldwijd één stem	
	Oude mensen – Unu voĉ' tutm-da (espa versio)	(CDR 1274752)
1989	Duet (Ik hou van jou)– Duet – Drempels weg	(CDR 1274882)
	Rendez-vous – Bla, bla – Ik heb je lief (live)	(CDR 1274942)
	Toerist in paradijs – De nutteloze van de nacht	(CDR 1275023)
1990	Girl for Sale – On My Own – Bo	(1275392)
	Birds – Still in My Dream	(CD 1275532)
1991	Huis in de zon – Cirkel – Huis in de zon (remix)	(CDSI 1275812)
	Liefste – Voorbij – Zeven dagen	(CDSI 1275862)
1992	Iim (single mix) – Niemandsland	(CDSI 1275942)
	De wereld – Zeven dagen	(CDS 87200524)
	Verleiding in blue jeans – Open einde (live)	(CD 87201323)
1993	Water en vuur – Jongen van 10	(87203327)
1994	Lied van de walvis –Vreemdeling (live)	(7203921)
	Iets van een wonder – Natte Kerst	(724387206120)
1995	Ze rook naar rozen – Rozemarijn	(87206823)
	Waarheen je ook gaat – De jas die jij toen droeg (remix)	(87208520)
	On My Own (duet met Demis Roussos – Zonder jou (live)	(8721032 5)

Diskoj disponeblaj ĉe (skribu nederlande aŭ angle) :
EMI
t.a.v. Willem van Starrenburg
Postbus 206
NL 1200 AE HILVERSUM
Nederlando

Freneze malkovras Flo !

Tutti Futti freneze multlingvas rokmuzike

Tutti Futtin vi verŝajne bone konas, ĉar tiu bando partoprenis en la unua volumo de *Vinilkosmo-Kompil'* per sia " Transeŭrokekspres' ". Eblas ankaŭ legi pri ĝi en la 6a ***ROK-gazet'***. La bando daŭrigas ĉiam en tiu plurlingva direkto kaj eĉ plifirmiĝis. Grava projekto ekstartis per la apero de 5titola KD kiu antaŭanoncas ontan albumon kaj eŭropan turneon, la tuta projekto titoliĝas *Je donne ma langue au cheval fou* (Mi donas mian lingvon al la freneza ĉevalo) daŭre per la helpo de **3R** Réseau Rock & Régions (RokReto & Regionoj). La 5titola KD, *Bilingue Dingue* (Freneza dulingvulo) konfirmas la miksiĝon de lingvoj, kulturoj, rasoj, kaj muzikoj.

Ekzemplo plena estas la unua muzikaĵo, " Tribal Babel Trip ", en kiu mirige franca, ŝajnas germana, kaj muzikoj repo, roko, kaj ĵazroko kunfandiĝas por rezultigi tian freŝan kaj vivantecan alojon **Tutti-Futti**an. La dua titolo estas en la francika lingvo kaj temas pri muziko de la bretona bando **EV** aperinta en ilia albumo *Reuz* en la finna. La adaptiĝo de **Jo Nousse** (kantisto, komponisto, kaj verkisto de **Tutti Futti**) estas pli rokmetala. Sekvas " Bilingue Dingue ", vera muzika miksado de influoj rokaj, ĵazrokaj, progresivaj, funkaj, eĉ repaj kun kanto franca kaj francika (*platt*-a lingvo, luksemburga). La posta titolo estas de **Alan Stivell**, fama folktradicia bretona kantisto. **Tutti Futti** sukcese adaptis roke la tre popularan *"Brezhoneg' raok "*, kiun ili kantas en la bretona lingvo. La kvina kaj lasta titolo " Le temps " (Tempo) denove intermiksas muzikstilojn pli popajn kaj folkajn sed kun ĉiam rok- kaj ĵazrokaj spuroj.

La produktado de tiu ĉi 5titola KD estas bonega kaj reliefigas la imageman kreemon de la tuta bando kiu fariĝis kvinopo kun la alveno de pakistanano el Germanio (Sarrebrücken, urbo apud franca landlimo) kiu perkutinstrumentas. La projekto Mi Donas mian Lingvon al Freneza Ĉevalo ŝajnas survoja kaj promesas esti tre interesa kaj kvalita. Estu atentaj ĉar povus esti ke ankaŭ en ĝi estos kanto(j) en espo.

Per sia muziko, **Tutti Futti** faligas la barilojn unu post al aliaj : tiuj de la lingvoj, muzikoj, landoj, rasoj, ktp. Jen la antaŭvenintoj de estonta eŭropa multkulturo ! La tuta projekto subtenindas per viaj kontribuoj al :

Tutti Futti
p/a Réseau Rock & Régions
17 rue de la Perdrix
FR 57100 THIONVILLE
Tel/faks : +33 3 82 54 43 95

Mitas Miquela CATLLA :

Mythia, hinda simfonio

Mythia estas simfonio laŭ la vera signifo de la vorto : ludi kune. Ĝi kunigas amatorojn ĉirkaŭ kanto kiu estas komunikado kaj profesiulojn ĉirkaŭ muzikilo de hinda kaj okcidenta kulturoj. Nur la unua kaj la lasta kanto de la albumo estas en sanskrita lingvo. Ĉiuj aliaj muzikaĵoj de tiu simfonio estas kantataj per silaboj respondantaj al enkorplokigo de la sonoj, do en universala lingvo (muzika). Tiu silaba prilaboro ebligas aliron al si mem kaj sekve al la aliaj. Por krei ĉi tiun simfonion, **Ravi Prasad**, sudhinddevena kantisto, sukcesis renkontigi hindan tradician muzikon kaj iujn tutmondajn muzikspecojn (ĵazon, flamenkon, klasikan muzikon), ĉerpante el la tradicio sian potencan modernecon. Ĉi tiu simfonio estis ludita en Parizo ĉe Unesko-domo en januaro 96 kaj en Olympia en januaro 1997. Tiu ĉi KDalbumo



mirige emociplena estis surbendigita vive en la koncertejo Odyssud de Blagnac (tuluza antaŭurbo), kunproduktita de Mikeli Music kaj Archipel, eldonita de Celluloïd kaj distribuata de Mélodie.

Informpetojn kaj mendojn sendu al :

Archipel
4 rue du square Carpeaux
FR 75018 PARIS
Francio
Tel : +33 1 42 29 36 03
faks : +33 1 42 29 36 97

Malkovras por ni Ionel ONET

Adiemus, kanta rifuĝejo

Mi havas konon pri almenaŭ tri kompaktdiskoj *[nun eĉ pli – ndlr]* portantaj la titolon *Esperanto*, kaj pri unu kun eĉ pli arkaika, **Volapük**. Jam antaŭe, mi ekkonis la muzikon de la franca grupo **Magma**, kiu kantas en lingvo inventita de la grupanoj mem, la *" kobaja "*. Sed la rilatoj inter artefaritaj lingvoj kaj muziko estas eĉ pli malnovj (eble ekde **Hildegard von Bingen**, 1098-1179, kiu mem inventis lingvon kaj ankaŭ komponis muzikon), kaj ŝajnas resti vivaj kaj laŭmodaj.



Lastatempe altiris mian atenton nova KD kiu certagrade trafus en la saman kategorion de muzikigitaj artefaritaj lingvoj ; nur certagrade, ĉar sur la koncerna disko oni ne kantas en iu lingvo. Tamen, por la homa orelo, ĉiuj *Song of Sanctuary* sonas home en, ni diru, iu nekonata afrika lingvo. La ĉisupran titolon mi intence ne tradukis, kaj tio pro la fakto ke en la angla lingvo la vorto *sanctuary* havas plurajn sencojn : " sanktejo ", " rifuĝejo ", " rezervejo por bestoj ". La aŭtoroj de la disko pensis precipe pri la dua kaj, eventuale, unua sencoj de la vorto. Ilia muziko ja estas rifuĝejo. Rifuĝejo en la tutmondan, aŭ almenaŭ mondan, muzikon.

La strukturo de la kantoj estas bazita sur klasikaj (eŭropaj) formo kaj tradicio. Tamen, la voĉaj sonoj estas kolekto de silaboj brile aranĝitaj por doni la senton de tekstoj, kiuj en la tradicia klasika muziko ludas gravan rolon. Foje la teksto kreas la impreson de afrika lingvo, alifoje la sono estas karibeca, aŭ eĉ amerindiana. La uzo de filharmonia orkestro (**The London Philharmonic**) kreas la impreson ke temas pri vere klasika muziko, dum uzo de kelkaj perkutinstrumentoj memorigas pri modernigita sovaĝa muziko. La aŭskultanto estas iom konfuzita nesciante kien klasifi tian muzikon (la saman senton povas havi aŭskultanto de **Depp Forest**), despli ke la lingvo de la muzikaĵoj sonas same nekutima, kiel la nia por neesperantistoj. La plej taŭga klasifo ŝajnas esti " noverea " muziko (*New Age*).

La tri ĉefaj protagonistoj de la kantoj estas : **Karl Jenkins** (komponisto, orkestristo, kaj dirigento) ; **Mike Ratledge** (perkutadaranĝisto) ; kaj **Miriam Stockley** (ĉefkantistino). La triopo kaj ĝiaj kunlaborantoj nomis sin, kaj sian diskon, **Adiemus**. La disko aperis ĉe Caroline Records, Inc., sub la kopirajto de Virgin Records, Ltd., en 1995.

Volapük - Tigrofajro

De nia spiono en Usono ni ricevis informon pri apero de KD de muzikgrupo **Volapük** el Francio. Kompreneble ni tuj lanĉis enketon por trovi kiu kulpas. La vojo por malkovri la veron estis malfacila kaj tuj legante la sekvon vi komprenos la kialon.

Volapük estas franca triopo kreita en 1993 de famaj francaj muzikistoj :

- **Guigou Chenevier** (drumisto, voĉo, komponisto), estis drumisto de 1974 ĝis 1986 de la famkonata bando **Etron Fou Leloublan** (ses diskegoj). Post 1986 li ludis en multaj muzikgrupoj, kreis plurajn muzikaĵojn por teatraĵoj kaj diversspecaj spektakloj.

- **Guillaume Saurel** (violonĉelisto), lernis en klasika konservatorio en Avignon, Francio, dum naŭ jaroj kaj komencis muziki por spektakloj de la danctrupo **Maguy Marin**. En 1991 li kreis la bandon **Rien**.

- **Michel Mandel** (basklarnetisto, klavaristo, kaj komponisto), de 1980 ludis en deko da ĵazbandoj kaj partoprenis diversajn spektaklojn kun danctrupoj, plastikistino, kaj kantistino.



Post starigo de repertuaro, ekde 1994 **Volapük** turneis en la jazkaj ĵazroka reto en tuta Eŭropo (Francio, Nederlando, Svisio, Italio, Germanio). En aprilo-majo1995 la triopo surbendigis 15 titolojn en svisa sonstudio, kiuj aperis en KD albumo ĉe la usona diskeldonejo Cuneiform Records, distribuata de la franca distribuejo Kirhêstra International. Post apero de ĉi tiu unua albumo, **Volapük** faris pliajn koncertojn, realigis muzikkreon por la danctrupo **Magy Marin**, kaj faris muzikaĵon por movdesegnofilmo. **Volapük** farigis ano de la kolektivo Les Innommables. *Le Feu du Tigre* (Tigrofajro) estas la titolo de la albumo de **Volapük** kaj la unua muzikaĵo de la KD.

Volapük ne kantas en la internacia lingvo de **Johan Martin Schleyer**. Fakte plejmultaj titoloj estas instrumentaj, nur du entenas voĉojn en la angla – ni bedaŭras ĉar ni pensis ke finfine estintus ebla aŭdi volapukon almenaŭ unufoje en nia vivo. La muziko de **Volapük** estas paradokso. Muziko kiu ĝenas la ideojn kiujn ni havas pri muziko. Ĝi situas nenie sed tamen ni povas difini ĝin kiel eksperimenta ĵazo. En ĝi estas kunigitaj tri muzikmondoj distingeblaj : ĵazo (klarneto), klasika muziko (violonĉelo), kaj roko (drumo). Jes, ni diru speco de ĵazo ĉe la limoj de roko. Ritmoj strangegaj, sonoj halucinaj, muzikaranĝoj nekutimaj. Laŭdire la lingvo volapük estis iom tia, kaj certe la triopo ne maltrafis sian nomon. Tra tiu ĉi albumo ni malkovris unikaĵon, originalan instrumentadon vere fascinan el kiu oni iel povas pasiiĝi malgraŭ ĝia bizareco. *Tigrofajro* mendeblas ĉe :

Orkhêstra International
25 impasse Barracan
FR 13890 Mouries
Francio
Tel : +33 4 90 47 61 76
faks : +33 4 90 47 62 84
• **Volapük** kontakteblas ĉe :
Inouï Productions Maison IV de chiffre
26 rue des Teinturiers
FR 84000 AVIGNON
Francio
Tel : +33 4 90 86 64 59 +33 4 76 44 31 97

Gigante raportas Flo ! :

La Gnomoj ne etulaĉas

Les Gnomes (La gnomoj) estas pli ol 10jara muzikbando (ĝi naskiĝis en 1983) el pariza regiono en Francio. Do fakte unu el la plej malnovaj bandoj hardkoraj, kiu lerte boardas inter ĉiuj stiloj, miksante tiel kun fervoro hardkoron, ĵazon, postpunkon, kaj metalon, evitante zorgeme la strukturojn de klasika rokmuziko. La muziko de la **Gnomoj** konsistas el nervaj kaj potencaj ritmoj, taktoj frenezegaj, harmonioj inventemaj, kaj disonacoj neatenditaj, kiuj kombiniĝas al trafa voĉo arda. Tiun strangecon emfazas la uzado de mistera lingvo. **Plex**, la kantisto, pasiiĝis pri tiu lingvo kiu konsistas el miksaĵo de la du branĉoj de *malnovkelta* : tio estas *gaela, britona,* kaj eroj de *ogamo.* Por simpligi , **Plex** nomas ĝin "*ogamo* ". Ogamo origine estas skribaĵoj sorĉalvokaj de druidoj grifelitaj sur lignon aŭ ŝtonon por citaĵoj funebraj aŭ *geis* (devoj aŭ malbenoj). Ogamo havas kiel patro *Ogmeon* (kelta dio) kaj kiel patrino la manon aŭ klingon de Ogmeo. Por la tiamaj prauloj, skribaĵoj estis magiaj, ilia kulturo estis parola. La magio de la skribo kuŝas en tio ke ĝi fiksas porĉiame la ŝelon de la vorto, dum la escenco mem de la vorto forlasos la ŝelon kun la tempo. Per parola kulturo tio ne okazas. Ekzemple ni prenu la francan vorton *énervé* " ekscitita ", kaj en la frazo : " Madaleno ekscitiĝis pro Rikardo ". Se tiu sama frazo estus skribita antaŭ 300 jaroj, tio signifus en la franca ke " Rikardo sennervigis Madalenon ". Tiel, simpla para kvereleto farigas vera tortura sceno, ĉu ne ? Jen kial por la prauloj la kulturo estis parola ; eĉ se la vorto ŝanĝiĝas por adaptiĝi al la epokoj, la idea kaj baza koncepto daŭre samas.

La tekstoj kiujn kantas **Plex** estas konstruitaj en tri cirkloj. La unua por la kelta mitologio kaj por rakonti epopeojn de ĝiaj herooj kaj dioj. La dua por transponi la esencon de la unua kaj alporti ĝin al nia epoko. La tria, esenco de la du aliaj, paŭsita de la historio de lia klano-bando. **Plex** vere penetris la filozofion de la prauloj reage al monstraĵoj kiujn la nunaj homoj abomene naskas (nukleaj ruboj, poluado de la Tero, transgenumo, ktp.). Pro tio la tekstoj estas konsternaj kaj komplete deliraj, rakontantaj legendojn kaj epopeajn aventurojn kiuj ebligas aliron al altaj ŝtupoj de la subgrunda universo.

La **Gnomoj** multe koncertis en Francio kaj eksterlande kun la plej famaj de la hardkora kaj de la franca rokscenejo (**All**, **Scream**, **Gorilla Biscuit**, **Naked Raygun**, **Silverfish**, **Cadavres**, **Wampas**, **Parabellum**, **Berurier Noir**, ktp.). Ili eldonis plurajn albumojn pere de sia propra diskeldonejo La Voix des Gnomes. Plejparto de ĉiuj tiuj vinilaj albumoj komplete elĉerpiĝis, kaj interkonsente, la alternativa diskeldonejo Crash Disques eldonis kolekton duvoluman kompilante ĉiujn plej elstarajn titolojn aperintajn en la diversaj albumoj kaj kompilaĵoj. Post 12 jaroj da intensa vivo la bando disiĝis en 1996. Nun la drumisto, la basgitaristo, kaj la ĥoristo starigis traŝbandon. **Plex**, la kantisto, planas prilabori pli tradician muzikon keltan per sinteziloj, sekvencilojn, komputilojn, kaj tradiciaj instrumentoj por miksi teknoon kaj tradicion. Li serĉas muzikistojn kiuj ŝatus labori en tiun direkton. Kaj kiel li diras : " *Y gwir yn urbid y bid !* " La KD- kaj kasedkolekto *Collection # 1* kaj *Collection # 2* ankoraŭ disponeblas ĉe :



Crash Disques (Katerina/Marsu)
21 ter rue Voltaire
FR 75011 PARIS
Francio
Tel : +33 1 43 72 71 60
Faks : +33 1 43 72 71 61

Diskografio de **Les Gnomes**
Les Gnomes (maksidisko)1984 ĉe La Voix des Gnomes.
Les Gnomes (diskego)1985 ĉe La Voix des Gnomes.
Compil kun 4 bandoj (diskego) ĉe La Voix des Gnomes.
Histoire de Glûmz (diskego)1988 ĉe Jungle Hop International.
Dem Redwrn (KD)1992 ĉe Smash It Up.
Collection # 1 (KD, KS)1994 ĉe Crash Disques.
Collection # 2 (KD, KS)1994 ĉe Crash Disques.

Dosiero KEF 96

Raportas Rafa: 5a KEF

KEF pligrandiĝas ĉiufoje, kaj mi ne certas pri la sekreta kialo kie kuŝas la sukceso de tiu ĉi klasikiĝanta festivalo somera. La skandinavaj urboj ĉarmas (des pli Kopenhago), la programo allogas la atenton de la vojaĝema espistaro, la etoso varmas, la organizado enordas sen troa perfekteco....

Kio plej nin ravas ? KEF 96 konfirmis la iompostioman kresketon de la espokulturo, la viglan stabiliĝon de kelkaj nomoj (**Kajto**, **Persone**, **Jerzy Fornal**, **Flávio Fonseca**), kaj ekaperon de aliaj (**Jomo kaj la Mamutoj**, **Afrika Espero**). Sen timi erari, oni povas aserti ke ni ne ĉeestis kvalitan antaŭpaŝegon, sed same oni povas orgojle paroli pri digna kulturproduktado kaj merita surscenigado, kelkakaze tre modestece, kelkakaze senpompe talenta, sed ĉiam entuziasmiga.

La publiko ja pridisponis sufiĉajn erojn por ĝui la programon : matena biodanco, kafoprelegoj, internacia ĥoro, folko, rokenrolo, teatro, gufejnoktoj.... Kaj se la kulturkerno ŝtopis la cerbojn de la KEFanoj, tenta Kopenhago pretis mildigi kapstrečojn montrante sian majestajn angulojn.

Ŝatantoj de alternativaj veturiloj certe ĝuis la KEFejon. Se tiu de 93 okazis en " Pulvobarelo ", iama armea ĉevalejo ĉarme reciklita al kulturejo, ĉifoje stacidomdeponejo konsistigis manĝo- kaj restoĉambron, bufedon kaj scenejon ; vagonparo kafejetose gastigis prezentojn de verkistoj kaj la akustikan koncerton de **Ĵak Le Puil**, kaj eĉ normale neuzata trajno aliĝis al tiu unika evento veturigante de stacidomo al stacidomo kulturkaruselon. Tiu trajna eco vere karakterizis KEFon 96, des pli en urbo kies ĉefstacidomŝildoj liveras informojn en espo. La komplico inter la verda lingvo kaj la fervoja medio daŭre fruktodonas.

Foto Toni Gayot

Kompare al tiu antaŭa en " Pulvobarelo ", mi trovis ĉi-KEFon pli amasa sed iomete malpli familietosa – eble tio estas la prezo pagenda kiam esporenkontiĝo akceptas pli kaj pli da homoj kaj situacioj. Ĉiuokaze ŝvebas en mia interno tiu agrabla impreso de la varmaj vesperaj koncertoj ĉefe tiu de **Jomo kaj la Mamutoj** kaj de **Flávio Fonseca**) kaj la pritrajna memorajo daŭre ĉeestante la festivalon.

La trajno... kien kaj kiusencen ĝi veturigos KEFon venontfoje ? Plejcerte en Stokholmon kaj espereble kun novaj ideoj, allogaj programeroj, kaj skandinava vigleco.

Afrika Espero

Bonegan ekzemplon de la plivastiĝo (stila, muzika, kaj kontinenta) de la espa diskografio ni spektis dank' al la koncertoj mal- kaj akustikaj de **Afrika Espero**. La unuan vesperon la voĉoj kaj tamburoj ĉefe rolis en pli etna prezento ; la aĝustigo de la espotekstoj al tipa afrika sono ne ŝajnis facila, sed niaj eŭropaj oreloj iomete alkutimiĝis post tiu aŭskulta prezento.

La elektrika koncerto alportis dancemon, ĝojon, kaj koloron al la ĉeestantaro, kiu ekkonis ke regeo, ragamufino, kaj pli puraj afrikaj stiloj havas lokon en espomuziko. Ili kantas al la hommaŝino, al sia popolo, al pli bona estonteco de Afriko – temas pri rektaj tekstoj kiuj esprimas la plej urĝajn bezonojn de la homoj de ilia kontinento. *" Se infanoj petegas panon, donu al ili iom da pano.... Kial lasi la infanojn suferi en la mondo ? "* Longa kaj kreiva vivo al **Afrika Espero** !

Raportas Duncan Thomson :

Kultura Espo-Festivalo jam sufiĉe aĝas en Espujo – antaŭ dek jaroj okazis la unua KEF, en la jaro 1986 en Uppsala en Svedio. Ĉijare jam okazis la kvina KEF, do ĝi nuntempe estas sufiĉe konata en Espujo. Mi, male, estas kompare novbakita en Espujo, do ĉisomere mi havis la unuan ŝancon partopreni KEFon – feston de la originala kulturo de espo.

Jam de kelkaj jaroj mi interesiĝas pri muziko en espo, kaj tamen la ĉijara KEF estis ankaŭ la unua ebleco por mi koniĝi kun la muzika kulturo de espo en " vera vivo ", anstataŭ per sonbendoj aŭ diskoj.

Do al KEF mi alvenis kaj frue kaj malfrue – frue, ĉar mi alvenis je la tago antaŭ la vera komenciĝo de la festivalo, kaj malfrue, ĉar mi vojaĝis en komuna espaŭtobuso de la ĵus okazinta Internacia Junulara Kongreso en Germanio, kiu alvenis en Kopenhagon nur malfruvespere. Post trovo de la amasloĝejo, ni iom vagis en la urbocentro antaŭ ol endormiĝi amase.

Je mardo matene (nu, efektive tagmeze) mi ellitiĝis, manĝajon aĉetis, festivalejon trovis, kaj aliĝis.

La ĉefa festivalejo estis laŭ mia gusto ege taŭga ejo – sufiĉe alternativa etoso en malkosta gastejo kiu troviĝis en malnova stacidomo – kelkaj homoj eĉ en trajnvagonoj dormis.... Gastis en la ejo ankaŭ

kelkaj neespistoj – kelkaj el kiuj bonege rilatis kun la samtempa festivalo, kelkaj el kiuj ne tiom bone interrilatis.... Krom la ĉefa ejo, kie okazis la koncertoj kaj manĝoj, festivalerojn gastigis kelkaj ĉambroj en apuda fabrikejo (kie estis ankaŭ amasloĝejo), kie okazis la teatraj partoj de la programo, kaj kafejo fora je kelkdek minutoj, kie okazis kelkaj literaturaj partoj de la programo. Foje okazis ankaŭ malfrunokte dancado en diversaj lokoj.
Verdire la muzikajn programerojn mi trafis plej ofte, tamen tiuj aliaj programeroj kiujn mi vizitis, simile ĝueblaj estis. La literaturan kafejon mi trafis unufoje (kun **Spomenka Štimec**), kaj du teatrajojn spektis – unu pri la historio de espoteatro (**Jerzy Fornal**), kaj alian de itala trupo ("Genepoj de Cindrulino"). La nemuzika programero kiun mi plej ĝuis estis la biodanco, kiun gvidis **Mauro Tauzzi** – se vi hazarde havos ŝancon partopreni tion en alia aranĝo, nepre kaptu la okazon.
La muzika programo estis sufiĉe diversa. Kelkajn el la programeroj mi tre ĝuis, kelkajn ne tiom. **Kajto** ludis, tamen en KEF mi ne spektis anstataŭe mi elektis viziti "Tivoli"-n, por kiu ĉiu partoprenanto ricevis senpagan enirbileton. Tamen en IJK mi ilian muzikon jam ĝuis, kie ili krome instruis popoldancojn. Ŝajnis al mi ke multis nova materialo – eble novan kompakdiskon ni baldaŭ atendu. **Kajto** disvendis kantolibrojn, unu grandan kun plejmultaj kantoj el la jamaj tri espaj diskoj, kaj malplilongan kun kanonoj.
La muziko de **Familio Berce** ne plaĉis al mi, tamen eble al kelkaj, do mi ne tro kritiku. Du grupoj, kun nomoj **Afrika Espero** kaj **Nigra Espero**, ludis afrikstilan muzikon – ili ŝajne estis plimalpli la sama grupo, sed unu pli akustika kaj unu pli laŭta kaj muzikiste multopa. La dua laŭ mia gusto pli plaĉis al mi. Tiustila muziko maloftas en Espujo – espereble ne plu mankos.
Jomo kaj la Mamutoj, naskiĝinta el la cindroj de la **Rozmariaj Beboj**, ludis (kiel ankaŭ en IJK) bonan muzikon, inkluzivante kantojn el pluraj landoj. **Flávio Fonseca** dufoje ludis – unufoje kun pli da malrapidaj kantoj, alifoje kun pli da rapidaj , kaj tamen ambaŭfoje la sudamerika ritmo kaj dancigis kaj ĝuigis la aŭskultantaron.
Je la fina vespero ludis **Persone**, longan koncerton kun pluraj akustikaj kantoj komence, kiujn mi aparte ĝuis. Mi nepre volas aŭdi pli da tia muziko. Se vi jam aŭdis la muzikon de **Persone** en kasedoj aŭ en la nova k-disko, sed ankoraŭ ne trafis ilin vive, nepre iam trafu – ili tre profesie kaj etosige ludas.
Je la fina mateno ludis kelkaj eks**Amplifiki**uloj la fame konatajn **amplifiki**ajn kantojn, inkluzive de la preskaŭhimno de la junulara movado "Sola".
Eksterprograme multo fareblis ĉar Kopenhago estis ĉijare la eŭropa kultururbo, ne mankis kulturajoj ĉeestindaj. Kelkaj homoj tamen preferis aĉetumi en la kvartalo Christiania por poste dividfumi kelkajn rulajojn en la agrabla espetoso....
Sume, la festivalo estas nepre ĉeestinda por trafi espomuzikon – en neniu alia aranĝo vi havos eblecon spekti tiom multajn kaj diversajn muzikajojn espajn samsemajne kaj samloke. La ejo taŭgis, tamen eble pli bone estus se ĉio okazus en sama ejo. Ankaŭ la etoso ne atingis la saman nivelon kiel en la ĉefaj junularaj aranĝoj – eble ĉar partoprenis malpli da homoj, eble ĉar la festivalejo estis iom disa, eble ĉar sufiĉe granda ono de la ĉeestantoj venis por trafi nur unu flankon de espokulturo, ekzemple teatron. Mi tamen ne diras, ke la etoso ne bonis – male. Sed post la IJK, la komparan mankon oni povis rimarki.
Ĉiukaze la sesan KEFon (laŭplane en Stokholmo en 1998) mi jam antaŭĝojas ĉeesti, kaj finfine tio estas la plej fidinda mezuro pri indeco de kiu ajn aranĝo, ĉu ne?



Intervjuis Flo, transskribis Tony :

Familio Berce

Foto Axel Beinfonte

ROK-gazet' : En KEF 5, ni renkontis la **Familion Berce** kiu koncertis ĝuste hieraŭ kaj havis certan sukceson. Ĉu vi povas prezenti vin ?

Natalja : Ni estas kantanta familio : **Nata** kaj **Andreo BERCE**. Ĉifoje ni venis kun ĉiuj tri infanoj el Svedio, kie ni loĝas jam de kvin jaroj. Devene ni estas rusoj kaj kantas ni en espo.

Rg : Ĉu vi povas klarigi de kiam vi kantas ?

Andreo : Pri espo en 1983. Mi estis tiam kantisto kaj muzikisto, do mi daŭrigis tion per espo.

Rg : Ĉu en la tiama Sovet-Unio ?

Andreo : Jes, ĝuste.

Rg : Kion vi faris en tiu periodo ?

Natalja : Mi komencis okupiĝi pri espo antaŭ 20 jaroj. Mia unua esporenkontiĝo estis iom stranga, ĉar mi tiam ne bone regis la lingvon, sed mi parolis france. En la tendaro, mi sidis ĉe la fajro kaj kantis francajn kantojn tiam. Kompreneble, mi rapide lernis ĉiujn espokantojn. Kun **Andreo** mi konatiĝis eble sep jarojn poste, kiam mi jam estis sufiĉe konata en sovetuniaj tendaroj.

Rg : Kaj Andreo, vi partoprenis projektojn kun **Vladimir SOROKA**, ĉu ne ?

Andreo : Jes. Ne estas facile rakonti tion, ĉar estas sufiĉe longa kaj tre interesa historio. La unua disko en espo kiu aperis en Sovet-Unio estis de **Soroka**. Mi jam kunlaboris kun **Soroka** tiutempe. Mi multe komponis por tiu disko kaj multe miksis, ktp.

Rg : Ĉu tiu disko ankoraŭ troveblas ie ? Ĉar multaj homoj ne konas ĝin.

Andreo : Oni ne multe vendas ĝin pro la fakto ke ne plu estas multaj vinildiskaparatoj. Sed mi aŭdis ke ekzistas ankaŭ kased-kopio kiun oni povas aĉeti.

Rg : Vi iris al Svedio pro ekonomiaj kialoj, ĉu ne ?

Natalja : Ni iris al Svedio antaŭ proksimume kvin jaroj post la disfalo de Sovet-Unio. Mi povas diri ke ni ne forlasis espon – eĉ dum la malfacilaj etapoj ni havis firmajn ligojn kun espistoj en Karlskoga. Kaj poste kiam ni translokiĝis de Karlskoga al Stokholmo, ni aperadas tie en diversaj lokoj. Ni koncertis ankaŭ en Norvegio. Estas sufiĉe vigla espovivo.

Rg : Mi aŭdis ke de Svedio vi faris turneon en Francio.

Natalja : Jes, ni faris turneon, sed tio estis dum la soveta periodo. Ni vizitis kelkajn francajn urbojn, inter kiuj la plej grandaj estis Parizo kompreneble, Marseille, kaj Lyon. Estas mirindaj rememoroj pri tiu turneo, ĉar estis tre varma akcepto, tre varma vetero, kaj tiom da vidindaĵoj, ke ĝenerale Francio allogas niajn korojn.

Rg : Kion vi planas ? Ĉar fakte nenio aperis de **Familio Berce**. Kiel oni povas difini vian muzikon ?

Andreo : Por ni mem estas malfacile difini ion. Por iomete direkti opinion, mi hieraŭ diris sur la scenejo : " Ni ne estas rokgrupo, ne atendu tion ! " Sed pli konkrete mi ne scias.

Natalja : Ni kantas diversajn kantojn, inter ili estas popolaj kantoj, tradukitaj kantoj, kantoj de sovetiaj espistoj, ankaŭ niaj propraj kantoj. Mi ne povas diri. Se estas bela rokkanto, ni povas ĝin preni. Estas diversstilaj kantoj.

Rg : Ĉu vi ne planas aperi en iu eldonaĵo ? Estis jam projekto por la kompilaĵo de VINILKOSMO, sed neniam aperis io de vi.

Andreo : Ekzistas kelkaj kasedoj. Ili ne vendiĝis tiel centrale kiel pere de UEA ekzemple, sed dum renkontiĝoj ili vendiĝas. Sed pri aliaj planoj, estas malfacile ĉar ni ne havas iun avinjon aŭ iun personon kiu povas prizorgi niajn infanojn. Pro tio estas malfacile labori en studio.

Rg : Povas esti trovita produktisto kiu povus produkti albumon de vi.

Andreo : Oni paroletas pri tio. Oni ĉiam demandas ĉu estas preta muzikmaterialo. Sed mi diras : " Ne, estas tuta nebulo kaj mi eĉ ne kuraĝas pensi pri tio. "

Rg : Ĉu vi ne pretus preni tempon por labori kaj finpretigi ion ?

Natalja : Mi volas diri ke mi estas iom pli optimisma ol Andreo. Li estas tiel singarda kaj neniam promesas. Li preferas fari kaj poste pretigi jam ĉion. Nun ni havas pli multe da tempo kaj pli multe da deziro. Mi esperas ke io nova nepre aperos.

Rg : Ĉu ni diru post unu jaro ? *[ridoj]*

Natalja : Eble post unu jaro, mi kredas tion.

Rg : Kion vi povas diri por konkludi ? Ĉar via muziko povas kontribui al pliriĉigo de la espokulturo, ĉu ne ?

Andreo : Jes, ĝuste al tio ni strebas. Kiam ni vidas bonan pecon kiu indas por havi en Espujo, mi kaptas ĝin.

Natalja : Ni estas feliĉaj ke ni venis ĉi tien ĉar estas tiom da grupoj kaj tiom da homoj pri kiuj ni ofte aŭdis. Ekzemple **Kajto**. Kompreneble ni aŭdis multe pri ili. Estas tiom feliĉe ke ni finfine renkontiĝis, konatiĝis, parolis.

Intervjuis Flo, transskribis Tony :

Kajto

Foto Axel Beinfonte

ROK-gazet' : Dum KEF ni renkontis **Kajton**, ĉar ili estis programitaj kaj ludis marde vespere por la malfermo. Unue **Nanne** prezentos sin kaj poste la mikrofono ĉirkaŭiros.

Ĉiuj, unu post la alia : Mi estas **Nanne**. Mi estas **Ankie**. Mi estas **Marita**. Kaj **Marian**.

Rg : Vi koncertis hieraŭ. Kiel estis por vi la koncerto ?

Ankie : Estis bone. Estis ankaŭ iomete strečite ĉar por ni estis precipe nova repertuaro kaj oni devas ĉiam alkutimiĝi al tio kaj ankoraŭ ne estas aŭtomate. Poste estos aŭtomate. Sed por la cetero, jes ni estas kontentaj.

Rg : Vi havas plurajn novajn kantojn. Do kiom estas en la repertuaro, plimalpli ?

Nanne : Jes, ok. Sed ni ludis ankaŭ kelkajn kantojn kiuj ne estas surbendigitaj, do fakte dek.

Rg : Tiuj novaj kantoj havas specialajn temojn.

Marita : Jes, kelkaj temas pri trajnoj. Estas ideo de **Nanne**, kaj **Marcelo Redoulez** el Francio faris multajn tekstojn pri tio.

Rg : Kaj kial ideo pri trajnoj ? Ĉu estas io speciala dirinda pri trajnoj ?

Nanne : Jes, la ideo kreskis en mia kapo, ĉar iam kiel infano mi volis ferii en mia propra trajno, kaj mia propra trajno povis iri sur ĉiuj reloj en la mondo. Sed tiam mi ne havis la monon por fari tion, do mi devis fari tion kontraŭleĝe. Kiam la rapidtrajno venis, mi devis trovi alian relon por kuŝi. Tiam mi komencis pripensi ĉiujn aliajn aferojn pri trajnoj. Do tiam mi akiris la ideon fari ciklon pri la afero.

Rg : Kaj aliaj tekstoj estis verkitaj de **Sabine Trenner**, mi aŭdis. Sufiĉe amuzaj. *[Ridoj]* Kiel tiu kunlaboro povis okazi ?

Ankie : Ni renkontis ŝin dum unu el niaj vojaĝoj. Ŝi loĝas en Berlino kaj organizis turneeton tie. Ni tranoktis ĉe ŝi kaj ni multe parolis. Poste ŝi sendis al ni leterojn kun poemetoj. Ni supozis ke la

tekstoj estas interesaj por ni, sed la skribo estas iomete malfacila. Do ŝi tajpis, kaj trafe estis belaj tekstoj, kiujn ni povas uzi. Sed estas laŭ ŝiaj propraj ideoj.

Rg : Ĉu per tiuj novaj tekstoj okazos surbendigo de nova albumo estonte ?

Nanne : Ĉimomente ni ankoraŭ ne scias kiam ni povos fari novan albumon. Ni ne havas sufiĉe da kantoj nun. Eble dum la venonta jaro ni povos trovi momenton por surbendigi.

Rg : Ŝajnas ke estos kiel por *Procesio multkolora*, estos ciklo kaj la temo estos trajnoj, ĉu ne ?

Ĉiuj : *[ridante]* Jes !

Rg : Tion mi suspektis ! *[ridoj]* Kaj la kunlaboro ankaŭ kun **Marcel Redoulez**, kiel startis tio ? Ĉar li estas en Francio, ne en Nederlando.

Nanne : Jes, sed ankaŭ li iam sendis al ni kelkajn tekstojn. Kiam mi havis la ideon pri la trajnoj, mi pensis ke eble li ŝatus fari tiujn tekstojn, kaj tiam ni demandis lin kaj li tre ŝatis la ideon.

Rg : Do nova albumo post du jaroj aŭ unu jaro, io tia. Kion vi faris depost *Tohuwabohuo*, la lasta albumo – ĉu vi multe koncertis ?

Marita : Ni ne nur ludas la espan repertuaron. Kiam ni estas en Nederlando ni kantas ankaŭ en la nederlanda kaj frisa lingvoj. Do por mi, muziki estas la ĉefa aktivado, ne nur ni kvarope, sed ankaŭ **Marian** kaj mi duope. Kaj ni havas ankaŭ infanprogramon kaj programon en iomete mezepoka stilo.

Rg : Sed, **Kajto** mem, ĉu vi multe koncertis post la apero de la tria albumo ?

Nanne : Jes, ni turneis en Italio kaj en Francio denove, kaj en Finnlando. Sed ne nur per la espa repertuaro. Ekzemple, lastjare ni estis en Finnlando por la UK, sed ni tie ludis ankaŭ en aliaj festivaloj. Ofte okazas ke la espokoncerto estas kialo por fari turneon. Kaj dum la turneo ni ludas ankaŭ kiel **Kat yn 't Seil**.

Rg : Kaj ankaŭ **Kat yn 't Seil** havas propran diskaron.

Nanne : Jes. Post *Tohuwabohuo* ni faris KDon kun **Kat yn 't Seil**, kaj lastjare ni surbendigis malnovajn kantojn en la **Batavia**.

Rg : Do projektoj abundas fakte ! Kaj estontaj planoj, ĉu en Espujo estas pliaj projektoj de turneoj kaj de koncertoj ?

Ankie : Jes, estas. Ekzemple antaŭ kelkaj tagoj ni koncertis en Güntersberge kaj tie ni denove renkontis usonan amikon **Mike Sloper**. Li intencas organizi turneon por ni en Usono, ne nur esplingve, sed alilingve.

Marita : Kaj hodiaŭ **Enrico** el Italio diris al ni ke li pensas pri turneo por ni en Italio por venonta printempo, kaj IJK en Assisi. Kaj eble ankaŭ en la UK en Aŭstralio. Okazas ankaŭ ke espistoj okazigas koncertojn por ni kaj tiam ne nur espistoj venas, sed la koncerto estas malfermita por ĉiuj. Tiam ni faras miksitan programon kun kantoj en espo, frisa, kaj nederlanda lingvoj. Estas tre bele por ni fari miksitan programon.

Rg : Do fakte estas interŝanĝo de kulturo.

Marian : Estas grava afero ke ankaŭ aliaj personoj povu aŭdi espon kaj esti interesitaj pri tio.

Rg : Kaj kutime, en preskaŭ ĉiuj koncertoj vi ankaŭ dancigas homojn pere de frisa muziko. Grava afero, mi konstatis ke vi faris ankaŭ lulkanton hieraŭ vespere. Mi trovis tion tre interesa ĉar estas vere malmultaj bonaj lulkantoj en espo, kaj tio mankas por infanoj. Do ĉu vi planas fari ion en tiu direkto ?

Nanne : Jes, ni tre ŝatus fari ion. Sed mankas tempo por fari ĉion. *[Ridoj]* Ni volas fari novan **Kajto**-KDon, sed ni ankaŭ tre ŝatus fari infan-KDon. Sed ni nun estas ankoraŭ okupitaj pri projekto kun dek personoj kiuj ludas konkojn. Estas tre interesa por ni, sed postulas multe da tempo.

Rg : Temporaba.

Ĉiuj : *[ridante]* Jes !

Rg : Eble sur la venonta albumo kiun vi faros estos lulkanto.

Nanne : Jes, certe la lulkanto kiun ni kantis hieraŭ.

Rg : Do, unu post la alia, eble ni povas kolekti. Kion vi deziras al la legantoj de ***ROK-gazet'*** ?

[Paŭzeto]

Rg : Kruela demando !

Nanne : Mi tre ĝojas ke la grupo **Akordo** kaj **Persone** havas KDon nun. Mi esperas ke ili povos vendi sufiĉe por fari alian. Ankaŭ la dua volumo de VINILKOSMO. Mi estas tre kontenta ke pli da KDoj aperis.

Rg : Eble venos unu de **Jacques Yvart**, espereble.

Nanne : Jes mi trę ŝatus ke **Jacques** povu fari KDon.

Rg : Multan dankon kaj sukceson por koncertoj kaj klopodoj. Ĝis la !

Ĉiuj : Dankon al vi !

Intervjuis Flo, transskribis Tony :

Flávio Fonseca

Flávio Kristina

Foto Flo |

ROK-gazet' : Dum KEF, ni renkontis **Flávion Fonseca** kaj lian grupon. Ni intervjuas **Flávion** kaj **Kristinan**, kiu okupiĝas pri la bando.

Flávio, ĉu vi povas prezenti vin por tiuj kiuj ne konas vin ? Ĉar multaj ankoraŭ ne malkovris vin, bedaŭrinde.

Flávio Fonseca : Saluton. Mi estas brazila komponisto, aranĝisto, kaj mi vivtenas min per muziko. Ekde longe mi malkovris espon, mi ekamis ĝin kaj ekuzis ĝin en mia muziko. Mi komponas en espo, kaj ankaŭ faras versiojn de famaj brazilaj kantoj.

Rg : De kiam vi fakte muzikas ?

Flávio : Mi muzikas profesie de 17, 18 jaroj. Mi ekstudis espon antaŭ 12 jaroj.

Rg : Vi enkondukis espon en viajn kantojn. Kio estis via celo tra tio ?

Flávio : Mi espistiĝis pro du kialoj. Unue ĉar mi opinias la lingvon tre belsona, tre taŭga por muziko. Due estas la ŝanco kiun la lingvo donas al ni artistoj atingi publikon ekster la limoj de nia lando.

Rg : Vi produktis plurajn albumojn. Ĉu vi povas ilin nomi ?

Flávio : Mia unua disko estis lanĉita en 82, ĝi estas vinila disketo en la portugala. Post kelkaj jaroj, mi lanĉis la diskon *Flávio Fonseca en Esperanto*, tio estis la unua en espo. Estis tre bona reago al tiu disketo, mi vendis 3.000 diskojn en 6 monatoj. Poste mi lanĉis vinilan diskon en la portugala kun unu kanto en espo. Poste ĝi estis tradukita entute en espon kaj aperis sur kasedo *Aerlumo*. Poste oni lanĉis albumon kun senvoĉa muziko, verkita por teatro. Kaj antaŭ du monatoj estis lanĉita en Brazilo mia kompaktadisko portugallingva kun denove unu kanto en espo.

Rg : Tiam, vi ankaŭ certe multe koncertis, ĉu ne ?

Flávio : De longe mi koncertas, ĉefe en la portugala ; ekde la komenco de la 80aj jaroj mi enmetis espajn kantojn en la koncertojn. Tamen koncertoj tute en espo, kiel mi faras ĉi tie, estas pli maloftaj. Do mi ludis dum kelkaj brazilaj naciaj kongresoj, ankaŭ dum UK en Kubo, kaj ĉi tie en Prago, kaj nun KEF.

Rg : Kia estas la reago de la portugallingva publiko kiam ili aŭdas espon ?

Flávio : Kutime post koncerto, homoj tute ne konataj de mi demandas al mi kio estas tio, kie ili povas lerni tion. Neniam mi ricevis malbonan reagon.

Rg : Plejparte de la koncertoj, vi faras sola aŭ kun muzikistoj ?

Flávio : Plejparte kun muzikistoj. Ĝenerale muzikistoj dungitaj por la okazo. Tiu grupo kiu ludas kun mi en KEF, jam de unu jaro kaj duono akompanas min. Ni fariĝis vere amikoj.

Rubens Holzmann

Foto Flo |

Rg : Ili partoprenis ankaŭ en la nova albumo, ĉu ne ?
Flávio : Jes.
Rg : Kion vi planas ?
Flávio : Eble mi daŭre metos espajn kantojn en miajn albumojn kaj koncertojn. Mi tre ŝatas la ideon eldoni tute espan albumon, tamen mi ne scias ĉu tio eblos baldaŭ ĉar estas tre malfacila afero. Mi konstatas ke la merkato en Espujo estas ankoraŭ tre malgranda.
Rg : **Kristina**, pri kio vi zorgas en la bando **Flávio Fonseca** ?
Kristina : Pri ĉio : pri la manĝado, pri la gastigado, pri la vojaĝkostoj....
Rg : Do fakte vi kunordigas la turneon ĉi tie. Ĉu ankaŭ en Brazilo ?
Kristina : En Brazilo, mi havas firmaon kaj personojn kiuj laboras kun mi. Do en Brazilo estas pli facila ol en turneoj eksterlandaj.
Rg : Do vi havas firmaon kiu estas arta agentejo, ĉu ?
Kristina : Jes, arta agentejo, sed ni laboras ĉefe por muzikajoj. Ni produktas KDojn, kasedojn.
Rg : Ĉu de aliaj artistoj ol **Flávio Fonseca** ?
Kristina : Ni nun zorgas pri artistoj nekonataj.
Rg : Ĉu aliaj de tiuj artistoj konas **Flávion Fonseca** kaj vidas kiel li enkondukis espokantojn kaj volus fari same ?
Kristina : Ili diris : " Ho, estas tre bele ! " Sed neniu ankoraŭ faris kiel **Flávio**.
Rg : Ĉu **Luanda Cosetti** estis unu el tiuj ?
Flávio : Ni neniam eldonis albumojn ŝiajn, nur organizis koncertojn por ŝi.
Rg : Kiom ofte vi organizas koncertojn ?
Kristina : Ni havas problemojn ĉar ni devas longe antaŭe rezervi la lokon. Pro tio la koncertoj ne estas tiom oftaj.

Intervjuis Flo, transskribis Tony :

Persone

Foto Axel Belinforte

ROK-gazet' : Dum KEF ni renkontis **Persone**, kiu ankoraŭ ne ludis, ĉar ili ludos nur sabate. Mi volis demandi al ili kio okazis en la grupo depost la lasta KEF. Ĉar ŝajnas ke estas kelkaj ŝanĝoj kaj aldonoj.
Bertilo : Estas tri jaroj kiuj pasis. Estis laŭ mi sufiĉe granda evoluo en la grupo. La stilo iomete ŝanĝiĝis, ĉu ne, **Martin** ?
Martin : Jes, en du diversaj direktoj fakte. La ĉefa repertuaro fariĝis iomete pli peza kaj pli danciga.
Bertilo : Kaj samtempe iom pli popa.
Martin : Jes, jes. Eble pli komprenebla, aŭ tuj kaptebla. Samtempe evoluis alia repertuaro kun akustikaj gitaroj kaj multe pli trankvila, kiun ni malofte prezentis antaŭ publiko. Sed, ni faros tion ĉi tie sabate.
Bertilo : Oni prezentis en Stokholmo dufoje tiun akustikan repertuaron. Estis sufiĉe granda sukceso, sed tio estis tiel granda diferenco disde la ordinara repertuaro ke oni preskaŭ povus diri ke estas alia bando.
Rg : Do kial daŭrigi en tiu nomo **Persone** tiam ?
Martin : Simple ĉar estas ni. Estas la samaj personoj.
Rg : Ekzemple, ĉu tio sonas kiel la titolo **kiun** vi faris por la dua
Martin : Jes, iomete. Sed plej multaj estas ege trankvilaj kaj iomete melankoliaj.
Rg : Sed vi faros ankaŭ rokkoncerton, la elektran repertuaron dum KEF. Kiel tio okazos ?
Bertilo : Ni faros kombinitan koncerton. Ni komencos akustike kaj tiam interalie faros tiun pecon kiu aperis en la dua volumo. Ni faros ĝin akustike kaj eble ankaŭ elektre. Ĉar post la enkondukaj akustikaj pecoj estos plene elektra koncerto.
Rg : Kiujn travivaĵojn vi havis de tri jaroj, depost la lasta KEF ? Krom la ŝanĝo de stiloj.
Martin : Estas malmultaj, sed eble gravaj. Ni faris du koncertojn en Rusio, kaj tio estis sufiĉe grava afero por ni ĉar ni neniam koncertis tie antaŭe. Kaj antaŭ du jaroj ni estis en Peterburgo dum espa kultura aranĝo kaj ludis en rokklubo tie. Estis ege amuze. Kaj venis sufiĉe multe da homoj el la urbo kiuj ne estis espistoj.
Rg : Kaj la reago de tiuj neespistoj fronte al espomuziko ?
Martin : Entuziasma.
Bertilo : La espistoj mem en Rusio alkutimiĝis al tre trankvila akustika muziko. Ili ŝatis nian muzikon sed tamen mi pensas ke tio estis iomete ŝoka por ili.
Rg : Kaj por la rusoj neespistaj, la muziko estis pli kutima ?
Martin : Jes, estis homoj kiuj venis al rokklubo, do ili kutimis al roko.
Rg : Kaj krom tio en Rusio ?
Bertilo : Antaŭ unu jaro, se mi ne miskalkulas, en la IJK en Peterburgo.
Martin : Apud. Sufiĉe apudege !
Bertilo : Kaj tio estis, mi pensas, nia plej bona koncerto iam ajn.
Martin : Almenaŭ la plej amuza kaj vigla. Eble ni klopodos superi tion ĉisabate.
Bertilo : Se eblas entute ! *[Ridoj]*
Rg : Laŭ la produktoj, estis pluraj partoprenoj en kompilajoj sed ankaŭ aliaj novajoj, ĉu ne ?
Bertilo : La plej grava novaĵo : ni ĝuste nun eldonas KDon. Estas nia tria albumo, sed unuafojo kiel KD. Ni estas tre kontentaj pri tio.
Rg : Vi surbendigis ĝin en Stokholmo, ĉu ?
Martin : Jes, sed tamen ne en PIGO-STUDIO, pri kio ni parolis pasintintervjue.
Rg : Ĉu vi povas iom rakonti kio okazis al tiu PIGO-STUDIO ? Estis iom konfuza afero por ĉiuj, mi pensas.
Martin : Jes, estas konfuza afero. Mi ne scias ĉu mi kapablas klarigi ĝuste kio okazis. Mi pensas ke parte estas pro elreviĝo de **Vladimir Soroka**. Ĉar fakte malmultaj espistoj venis por surbendigi. Kelkaj kiuj venis montriĝis papagoj. Li finfine vendis la studion kaj la ekipaĵon. Por scii kio okazis, vi devas paroli kun li mem.
Rg : Finfine ĝi ne plu funkcias por espistoj kaj ĝi ne plu povas altiri eventualajn uzantojn, ĉu ne ?
Bertilo : Ĝi simple ne estas studio plu. Troviĝas iom da aparatoj, sed ĝi ne estas kompleta studio.
Rg : La grupoj kiuj surbendiĝis tie estis vi, **Amplifiki**, kaj **Jomart**.
Bertilo : Jes. Venis iu rusa grupo, sed ili montriĝis papagoj kaj tio tute fiaskis.
Rg : Ĉu vi povas paroli pri la surbendigo kaj enhavo de via KD ?
Martin : Ni havas amikon kiu posedas parton de 16kanala studio kiun ni povis uzi. Ni surbendiĝis iom post iom, ne la tuton sinsekve. Eble tio daŭris sufiĉe longe. Ni surbendiĝis dum duona jaro.
Martin : Kaj poste miksis dum sufiĉe longa tempo.
Rg : Miksado estas plej grava, eble eĉ pli ol la surbendigo mem.
Bertilo : Kaj plej cerbumiga parto. Ĉar oni povas tute ŝanĝi la sonon kaj la senton de la kanto.
Martin : Ni fakte eĉ remiksis la tuton.
Bertilo : Jes, ni havis tute pretan mikson de ĉio kaj refaris ĝin komplete.
Martin : La studio kie ni surbendigis ne estas profesia studio kaj ankaŭ pro tio estis multe da laboro. Se oni ne havas sufiĉe da sperto, oni devas uzi des pli tempon por atingi la saman nivelon.
Rg : Ĉefe miksado kiam ekzemple ne estas aŭtomataj aparatoj kaj komputilo, ĉu ne ?
Bertilo : Ho jes, se oni tiam povus miksi per komputila miksotablo, tio estus mirinda.
Martin : Tamen nia celo estis krei plej eble koncertecan etoson kaj pro tio ni ne multe zorgis pri perfekta sono aŭ perfekta nivelŝanĝo. La ĉefa celo estas ke la disko sonu vigla kaj energia kiel dum koncertoj.

Bertilo : Jes, la bazan aferon ni registris ĉiuj kune : drumo, basgitaro, kaj elektra gitaro.

Rg : Kiel vive.

Bertilo : Jes, tute vive ! Kaj nur aldonis poste kantadon. Ni ne faris kiel oni ofte faras en studio : unuope registri la sonon. Tiam la sono fariĝas iomete malviva.

Martin : Sed por tio oni devas ankaŭ pagi. Ekzemple estis malfacile krei perfektan sonon de la rultamburo ĉar la sono de la rultamburo eniras mikrofonon ankaŭ de la basgitaro kaj gitaro, ktp. Sed mi pensas ke la rezulto tamen estas tute kontentiga.

Rg : La titolo ?

Bertilo : *Povus esti simple.* Estas ankaŭ la unua kanto de la disko.

Rg : Kaj pri la ĝenerala enhavo de la disko. Pri kio temas ?

Martin : Sufiĉe diversaj temoj, kiel kutime. Plejparte estas kutimaj temoj pri amo, pri malfacilaĵoj de la vivo.

Bertilo : Nur la kanto " Ili venos " havas iom nekutiman temon. Ĉu ni diru pri kio temas ? Fakte homoj komprenu mem.

Rg : Vi konsilas kompreneble al la homoj akiri tuj tiun diskon.

Bertilo : Mi mem aĉetis ĝin. *[Ridoj]* Ĝi vere estas la unua rokmuzika KD en espo. Nur la kompilaĵoj estas kompareblaj, sed tie estas sufiĉe miksita.

Rg : Do vi parolis pri kompilaĵoj. Estas la titolo kiu aperis en la unua volumo, tiu " Reĝoj de cindro ". Ĉu vi povas iom paroli pri tio ?

Martin : Ni fakte komponis ĝin speciale por la kompilaĵo. Estas jam klarigita iomete en la kajero. Estas kontraŭmilita kanto, ne pri iu aparta milito sed....

Bertilo : Tamen ĝuste kiam ni verkis, la milito en Bosnio estis ĉefe en niaj kapoj.

Martin : Jes.

Bertilo : Bonŝance ĝi ne plu estas tiom milita, pro tio ni vere ĝojas.

Martin : Sed la teksto estas tute bone transmetebla al kiu ajn alia milito.

Rg : Kaj sur la dua volumo estas vi mem kiu surbendigis la kanton hejme. Ĉu vi povas paroli iomete pri tio ? Ŝajnas ke estis fulme farita, ĉu ne ?

Martin : Jes fakte. Mi tutsimple pensis ke estus domaĝe se venas dua kompilaĵo sen mi. Mi volas ĉiam partopreni ĉion. *[Ridoj]* Kaj mi pensis : " Damne, kion fari ? mi ne havas studion, ktp. " Sed mi havas 4kanalan portostudion por originalaj kasedoj, kaj kelkajn mikrofonojn mi havas. Mi dum unu vespero faris la muzikon kaj sekvontvespere mi faris la tekston kaj eksurbendigis kaj intertempe aĉetis tamburinon. Mi estas tre kontenta pri tio fakte. Kelkfoje estas avantaĝo se oni povas fari ion tre rapide, kaj iomete surprizis min mem la kantoj kiam mi aŭskultis la surbendigon.

Rg : La rezulto estas tute bona. Mi pensas ke tiu kanto plaĉos. Vi ankoraŭ ne aŭskultis la kompilaĵon, ĉu ?

Bertilo : Hieraŭ en la diskoteko oni ludigis. Eĉ du, kiuj estis laŭ mi tre tre bonaj.

Martin : Mi volas aldoni ke tiu kanto " Vivo duras sed vi molas " estas dediĉita al mia amikino.

Rg : Ni iom suspektis tion ! *[Ridoj]* Kaj pri **Persone**, kio estonte ? Tiu ĉi nova albumo kiu ĵus aperis alportos veršajne ion novan al vi.

Martin : Sed tamen, ĝuste nun la estonteco aspektas iomete nigra ĉar la IJK okazos venontjare en Italio, kio estas sufiĉe longe for.

Foto Flo I

Martin

Bertilo : Oni invitis nin, sed ĉu tio sukcesos ?

Martin : Mi ne scias, ĉu ni sukcesos iel malaltigi la vojaĝkostojn. Mi tre esperas. Pri IS, mi ankaŭ tre esperas, sed neniu ankoraŭ scias.

Bertilo : Ni ne scias kiam venontfoje ni povos ludi, krom sabate.

Martin : Ĉu ne estos festivalo en Francio ? Kiam ĝi okazos ?

Rg : Estas " Festo ", kiu okazos venontsomere, kaj poste estos alia ebleco : estas por venonta UK. UK '98 okazos en suda Francio.

Martin : Eble ni devas pripensi la eblecon ludi por neespa publiko.

Bertilo : La espa mondo tamen estas sufiĉe malgranda. Ni restas amatora hobia bando kiu ludas kelkajn fojojn jare. Estas tiel.

Rg : Ne, tamen kiel profesiuloj kiam vi ludas sur scenejo.

Bertilo : Tion, aliaj juĝu ! Se ni vendas sufiĉe da tiu ĉi disko, eble ni povas fari sufiĉe baldaŭ novan diskon.

Rg : Kaj kun disko tia, eblos trovi aliajn aranĝojn, ĉu ne ? Eble neespaj ĝuste.

Martin : Jes, ĝi povus pli bone efiki kiel reklamo ol la antaŭaj kasedoj.

Bertilo : Mi havas provizoran inviton al Usono por la IJK en la jaro 2000. *[Ridoj]*

Rg : Eble ni povos starigi reton por organizi turneon tra espo-kluboj.

Bertilo : Tre tre bona ideo.

Rg : Por konkludi, kion vi ŝatus diri por la legantoj de ***ROK-gazet'*** ?

Ambaŭ : Aĉetu la diskon ! *[Ridoj]*.

Intervjuis Flo, transskribis Tony :

Akordo

ROK-gazet' : Dum KEF ni renkontis membrojn de **Akordo**. Estas tute nova kompaktdisko kiu ĵus aperis. **Danny** kaj **Saskia**, ĉu vi povas prezenti vin ?

Danny : Mi estas **Danny TEN HAAF**, mi estas nun la prezidanto de TEJO. Mi antaŭe estis estrarano de la Nederlanda Esp-Junularo, kaj estis tie ke mi renkontis la aliajn anojn de **Akordo**.

Saskia : Mi estas **Saskia IDZERDA**, mi estas estrarano de TEJO.

Rg : Kiam naskiĝis tiu grupo ?

Saskia : En 1989, oni preparis la IJKon en Nederlando. Por havi sufiĉe da muziko, oni pensis fari mem. Tamen oni trovis sufiĉe da homoj dum la kongreso. Nur poste, kiam ni havis pli da tempo, oni komencis mem plu labori sur tiu kampo. **Danny** aliĝis poste.

Danny : Estis en la Paska Renkontiĝo de NEJ kiam mi aŭskultis ilin, kaj sonis tute bele. Mi ĉiam ŝatis kanti, sed neniam havis vere okazon. Do mi decidis aliri ilin kaj demandi ĉu eblas kunkanti, kaj eblis.

Rg : Krom tiu aranĝo en Nederlando, ĉu estis aliaj okazoj kanti por **Akordo** ?

Saskia : Oni kantis plurfoje en Nederlando, ekzemple dum la plenkreskula kongreso, Zamenhoftago, ktp.

Rg : Kaj dum IJK aŭ aliaj internaciaj festoj ?

Saskia : Ĝis nun, neniam dum IJK. Unue ni kantis en IS en Cuxhaven jam antaŭ kvar-kvin jaroj, kaj lastjare en Eŭropa

Espo-Kongreso en Parizo kaj en la UK en Prago, kaj tie estis kvazaŭ la pinto por ni.

Rg: Rakontu iomete pri tio.

Danny: Estis kiam ni kantis en Parizo antaŭ unu jaro ke homoj eksciis pri nia ekzisto, kaj venis sufiĉe bonaj reagoj al tio. Pro tio en Roterdamo oni interesiĝis pri ebla koncerto de ni en la plena kongreso de UK. Oni finfine kantis por ĉirkaŭ 500 homoj.

Rg: Ĉu kion vi faris estis bone akceptita?

Saskia: Mi pensis ke vere homoj ŝatis. Vere multaj aplaŭdis. Finfine ni faris du aldonajn kantojn.

Rg: Mi scias ke vi ĵus aperigis diskon. Ĉu vi povus iom rakonti pri la farado de tiu disko?

Danny: Jam de pluraj koncertoj, homoj ekdemandis " Ĉu vi havas kasedon? ", kaj ni ĉiam devis bedaŭrinde nei tion. Kiam ni havis la ŝancon koncerti en UK, ni decidis ke se ni volas iam fari diskon aŭ kasedon, nun estas la ĝusta tempo, kaj antaŭ duona jaro plimalpli ni fine decidis fari tion, kaj ekpreparis ĝin. Ni ricevis iom da helpo ekzemple de **Nanne Kalma** de la grupo **Kajto**, kiu venis al niaj ekzercadoj, donis al ni bonajn konsilojn pri kiel ni povus fari kantojn plej bone. Finfine ni iris al studio kaj tute private pretigis tiun diskon.

Saskia: Estis vere tre granda projekto por ni. Ni povas diri ke dum duona jaro ni laboradis pri tio. Ni ekzemple dividis la kantojn en du grupojn, kaj la duonon ni surbendigis en februaro kaj la alian duonon en majo. Kaj krome estis la laboro pri la tekstoj, libreto, ktp.

Rg: Ĉu la laboro en studio alportis ion al vi?

Danny: Denove tie ni havis multan helpon de **Nanne Kalma**, kiu ja spertas pri surbendigo de muziko. Li antaŭe jam priparolis kun ni kion oni devas bone prepari, kaj li ĉeestis la unuan sesion en la studio por helpi al ni. La tuta pretigado de la bendo en la studio estis sufiĉe agrabla sperto por ni.

Rg: Kiam vi finproduktis ĝin?

Danny: Kelkajn semajnojn antaŭ la UK.

Rg: Kio estas la titolo kaj la ĝenerala temo? Estas pri pluvo aŭ io tia, ĉu ne?

Saskia: Jes, estas ŝerco. Por diri la veron, kiam ni faris foton por la disko, ekpluvis kaj do ni prenis pluvombrelojn. De la grafikisto **Rolfo** venis la ideo uzi pluvombrelon kiel simbolon kiu revenas en la grafika materialo de la disko. Ni havis noktan sesion por diskuti pri la nomo de la disko, kaj finfine " pluvo " estis elektita.

Rg: Kiom da kantoj estas en ĝi?

Danny: Estas 23 titoloj, kaj unu el la titoloj konsistas el tri kantoj. Do entute estas 25.

Rg: Kaj samtempe vi surbendigis la muzikaĵon kiu aperas en la dua volumo de *Vinilkosmo-Kompil'*. Ĉu ĝi aperas ankaŭ en via disko?

Saskia: Ne, ĝi ne aperas sur nia disko. Kiam oni ordigis la kantojn, oni ne trovis lokon kie ĝi plej bone sidus. Pro tio estis iel sufiĉe evidenta konkludo ke estus tre bona ideo doni tiun kanton por la VINILKOSMO-disko.

Rg: Kiom da KDoj vi eldonis?

Danny: Ni eldonis ĝin en 500 ekzempleroj, kaj ni decidis ne fari kasedon el ĝi ĉar oni nuntempe vendas pli da diskoj ol da kasedoj.

Rg: Kiuj estas la estontaj planoj por **Akordo**?

Danny: Ni kompreneble daŭre muzikos kaj kantos. Ni planas iom pli bone prilabori nian repertuaron. Ni jam havas kelkajn koncertojn planitajn dum la venonta dua jaro.

Saskia: Mi speciale ŝatus ke ni denove eklernu kelkajn novajn kantojn.

Rg: Por konkludi, kion vi deziras al la legantoj de ***ROK-gazet'***?

Saskia: Por mi estas klare ke tiu muziko kiun ni faras ne estas rokmuziko. Estas klasika, popola muziko. Laŭ mi tio povas tamen plaĉi al multaj homoj. Mi ŝategas ankaŭ la diskon de **Persone**, sed mi ŝatas ankaŭ tiun ĉi muzikon. Tiuj du aferoj tute ne ekskluzivigas unu la alian.

Intervjuis Flo ! :

Jomo



Foto Flo

ROK-gazet': Saluton **Jomo**!

Jomo: Saluton!

Rg: Post KEF-festivalo en Kopenhago, ni retrovas nin en Tuluzo. Mi volas fari unuan demandon: prezentu vin.

Jomo: Mi nomiĝas **Jomo**. Mia vera nomo estas **Jean-Marc LECLERCQ**, sed **Jomo** estas mia internacia nomo. Mi ludas gitaron, mi komponas miajn kantojn, kaj mi ludas kun grupo kiu nomiĝas la **Mamutoj**.

Rg: Tio estas la aktuala afero. Sed vi ludis antaŭe en pluraj muzikgrupoj, interalie kun la **Rozmariaj Beboj**. De kiam vi muzikas fakte?

Jomo: Mi muzikas delonge. Mi komencis en 77, mi pensas.

Rg: En kiuj famaj grupoj vi ludis?

Jomo: La plej fama estas la **Rozmariaj Beboj**, ĉar ni faris du kompaktdiskojn. Sed krom tio mi ludis en aliaj grupoj kiuj estis tute nefamaj.

Rg: Kiam vi espiĝis?

Jomo: En 88. Mi komencis muzikumi en 77, espumi en 88, mi ne scias kion mi komencos en 99.

Rg: Ekde kiam vi espiĝis, vi kantas en espo.

Jomo: Jes, antaŭ neespa publiko mi kantas ĉefe en la franca, sed mi kantas ankaŭ en espo. Kaj kiam mi ludas antaŭ espa publiko, mi tradukas kelkajn kantojn.

Rg: Ĉu estas tekstoj kiujn vi mem komponas?

Jomo: Jes, mi tradukas mem ĉion. Sed mi ludas ankaŭ nepersonajn kantojn, ĉefe popolajn kantojn el diversaj folkloroj.

Rg: La **Rozmariaj Beboj** estis tamen sufiĉe rokmuzika grupo, kaj nun la **Mamutoj**....

Jomo: ...estas pli akustika bando. Sed unu el la **Mamutoj** ludas sufiĉe laŭte.

Rg: Ĉisomere vi faris turneon.

Jomo: Jes, grandan turneon. Ni ludis en Prago por la junulara programo de la UK, poste ni ludis en neespa klubo en Pollando. Poste ni iris en Güntersberge por la IJK, kaj ni finis la turneon en Kopenhago por la KEF.

Rg: De kiam la grupo stariĝis?

Jomo: La **Rozmariaj Beboj** disiĝis ĉar mi forfuĝis al Pollando. Mi vivis tie ses monatojn kun mia edzino kaj mia filino.

Rg: Kial vi iris al Pollando?

Jomo: Ĉar mia edzino estas pola.

Rg: Kie vi renkontis ŝin?

Jomo: Mi renkontis ŝin en IJK en 89. Do post ses monatoj en Pollando, kie mi instruis la francan, ni revenis ĉiuj tri al Tuluzo, kaj mi serĉis muzikantojn kaj trovis sufiĉe rapide. Ni komencis provludi la 11an de januaro 96 kaj faris la unuan koncerton la saman monaton.

Rg: Ĉu vi surbendigis kelkajn aferojn?

Jomo: Jes, ni surbendigis. Eĉ ni aperis sur la kompilaĵo de VINILKOSMO.

Rg: Kiuj estas viaj venontaj planoj? Ĉu vi planas aperigi albumon en espo?

Jomo: Jes, ni pensas produkti kompaktdiskon. Ni ne scias kiam. Ni pensas ke estos almenaŭ unu kanto en espo.

Rg: Mi revenas al la **Mamutoj**. Kial tiu nomo?

Jomo: Estas sufiĉe komplika afero. Oni bedaŭrinde devas esti franca por kompreni. Mia familia nomo estas **Leclercq**, kaj " Leclerc " estas nomo de granda supervendejo en Francio, kaj ankaŭ " Mammouth ".

Rg: Ĉu ankaŭ la **Mamutoj** espiĝis?

Jomo: Unu el la **Mamutoj** estis unu el miaj lernantoj kiam mi instruis espon en 95. Kaj li espumas, sed la aliaj du ankoraŭ ne.

Rg: Klarigu kiel vi sukcesis espiĝi?

Jomo: Mi kunlaboris en radio kiu nomiĝas FMR kaj estis konkurso ; la demando estis trovi la nomon de la persono kiu inventis espon. Mi respondis kaj mi gajnis lernolibron. Kaj mi lernis espon per tiu libro.

Rg: Vi partoprenis en la unua produkto de VINILKOSMO. Estis disketo. Ĉu vi povas klarigi iomete pri tio?

Jomo: Estis disketo kun kvar kantoj. Sur unu flanko oni povis aŭdi du kantojn de **Amplifiki** kaj sur la alia flanko estis du kantoj de la **Rozmariaj Beboj**.

Rg: Kaj mi povas certigi ke restas kelkaj ekzempleroj, kiuj disponeblas. Disketoj nuntempe ne plu multe aĉeteblas ĉar homoj forlasas tiun sistemon. Bone, do kion vi povas deziri al la legantoj de ***ROK-gazet'***?

Jomo: Por konkludi mi povas diri ke mi atendas invitaĵojn por ludi kie ajn en Eŭropo. Ni estas ĉiam pretaj por vojaĝi.

(Vidu recenzon pri lia lasta disko en ***" Kritikloj "***.)

Intervjuis Flo, transskribis kaj elfrancigis Tony :

Max Bale

ROK-gazet': Post nia reveno el Kopenhago, ni vizitis **Max BALE** en lia studio en Tuluzo. Ni petas al li sin prezenti.

Max Bale: Saluton, mi nomiĝas **Max Bale** kaj laboras en Tuluzo en STANSY-Studio. Mi partoprenis en grupo kiu nomiĝis **Maria Et**. Post laboro en diversaj diskeldonejoj, mi komencas organizi mian propran studion. Ĉisomere mi renkontiĝis kun la espomovado. Mi turneis kun **Jomo** dum unu monato. Tio ebligis al mi malkovri tiun mondon. Mi volis scii kial oni donis al tiuj renkontiĝoj iom eksmodan aspekton. Kaj mi ja trovis ke fakte ili bezonas interesigi aliajn tavolojn de la popolo por igi la movadon pli malfermita. Mi kunportis mian muzikon, kiu celas esti iom pli aktuala, eble.

Rg: Se mi bone komprenas, vi ne povis multe ludi pro diversaj fuŝoj. Ĉu vi povas klarigi tion?

Max: Mi normale devis esti sonteknikisto por **Jomo** kaj la **Mamutoj**. Mi tion provis fari en ĉiuj datoj. La problemo estas ke kiam vi venas de eksterlando, homoj ne tro volas pruntedoni sian materialon al vi. Pri **Bombaj-Dob'**, mia grupo, mi povis ludi nur dufoje por la dek datoj. Ni estu honestaj : la organizado ne estis tiom bona. Tio estas iom bedaŭrinda ĉar ni tion longe preparis kaj multe laboris pri tio. Sed, do, ni faros tion alian fojon. Por mi, la ideo interesas min. Ĉiuj homkunvenoj interesas min. Kiam estas homoj kiuj volas ion malkovri, tio interesas min.

Rg: Vi partoprenis en la *Vinilkosmo-Kompil'*. Ĉu vi povas rakonti pri tio?

Max: Estas simple. **Jomo** venis por surbendigi en STANSY-Studio, tuj antaŭ **Fabulous Trobadors**, se mi bone memoras. Mi diskutis kun li kaj li klarigis al mi pri la kompilaĵo. Mi diris al li ke estas bedaŭrinde ke ne estas iu titolo pli aktuala sur ĝi. Duonserĉante, li diris " Parolu al **Flo**, eble li povos fari ion. " Kaj jen. Estis rapide, sed ni ĉiuj estas kontentaj.

Rg: Ni parolu pri viaj someraj travivaĵoj. Vi vidis UKon, IJKon, kaj KEFon. Kio estas via impreso pri tio. Ĉar vi estas ekster la movado, sed vi ĝin vidis de interne.

Max: Jes, mi estis privilegiulo. Mi estis tie kiel membro de la organizado, ĉar mi okupiĝis pri grupo kaj mem ludis. Sed ĉar mi ne parolas espon – almenaŭ ankoraŭ ne, mi vidis tion kiel spektanto. La sola negativa punkto kiun mi vidis estas ke kelkaj personoj estas fermitaj. Estis foje malfacile komuniki ĉar mi ne parolis espon, kvankam mi povis paroli angle aŭ france. Mi volis alporti aktualan muzikon, sed ne ĉiam eblis. Tio pliboniĝis en Kopenhago pro bonaj rilatoj kun la organizantoj. Nun mi intencas lerni espon.

Rg: Kion vi opiniis pri la spektakloj?

Max: Mi vidis bonajn aferojn, mi vidis aferojn ankaŭ vere ne bonajn. Sed kiam temas pri gustoj.... La publiko ne tiom ŝatis grupojn kiuj ludis pli aktualan muzikon. Ili preferis folkloron. Tio estas iom bedaŭrinda. Devus esti pli da novaj sonoj, ekzemple teknoo aŭ dobo.

Rg: Ĉu vi havas proponojn pri tio?

Max: Mi estas malfermita. La baza ideo plaĉis al mi, ankaŭ vojaĝi plaĉas al mi. Se la organizado povas esti prizorgita de pli profesiaj homoj. Se tiaj etaj problemoj povas esti solvitaj, mi estas preta.

Intervjuis Flo, transskribis Tony :

Afrika Espero

Foto: Flo

Rok-gazet' : Ni renkontis grupon kiu ludis dum du vesperoj. Temas pri **Afrika Espero**. Ĉu vi povas vin prezenti?

Louison: Mi estas el Zairo. Mi nomiĝas **Louison Yambouka RAMAZANI**. Mi espiĝis jam antaŭ kelkaj jaroj, ekde 1988, kaj post tiam mi komencis ludi muzikon, ne profesie sed amuze kun mia amiko **Denis Rock TAMBA**, ankaŭ el Zairo, ankaŭ kiu estas espisto.

Rg: **Denis**, prezentu vin iomete.

Denis: Mi estas **Denis Rock** kaj mi estas el Zairo. Mi lernis espon en la jaro 1988 kun nia amiko **Zhou Mack**. Ni faris antaŭe muzikon en nia lingvo kaj en la angla, sed li volis ke ni faru muzikon ankaŭ en espo.

Rg: Kio estas la celo fari muzikon en espo? Kion tio alportas al vi?

Denis: Mi pensas ke la ideo de espo estas tre bona : kunigi la homaron. Pro tio mi volis tre multe propagandi por espo pere de muziko.

Rg: Espo estas sufiĉe nova afero en Afriko, ĉu ne?

Louison: Ne tute, ĉar ni jam aŭdis pri espo en la jaro 1963, post la koloniisma tempo. Do estas generacio de espistoj kiuj jam praktikis la lingvon, kaj ni apartenas al la dua generacio kiu lernis de tiuj malnovaj espistoj.

Rg: En Zairo vi starigis grupon kun **Zhou Mack** kaj aliaj muzikistoj. Ĉu vi sukcesis koncerti tie?

Denis: Tiam ni estis studentoj kaj ni faris koncertojn nur en la lernejo. Ni ne sukcesis fari koncerton kiel ni faris ĉi tie.

Louison: Ĉar tiam la espasocio ne havis sufiĉe bonajn strukturojn, oni ne organizis esparanĝojn. Ni do tutsimple ludis dum studentaj aranĝoj aŭ dum kulturaj aranĝoj en la urbo, en Kinŝasa kaj Lukala.

Rg: Kio okazis por ke vi elmigru el via lando?

Louison: Estas sufiĉe bone konate ke Zairo travivas politikajn problemojn. Ni havas diktatoran politikan sistemon. Studentoj fakte kontraŭstaras tiujn misfarojn fare de la registaro, kaj estinte studentoj, ni agadis en politika medio. Okazis ke ni protestis ankaŭ kun la amaso de tempo al tempo. Malbonŝance oni arestis nin. Kiu volis savi sian vivon tutsimple devis forlasi la landon. Estas la kaŭzo de nia fuĝo ĉi tien.

Rg: Ĉu vi trovis solvon ĉi tie por loĝi?

Denis: Ne, mi ne trovis solvon. Mi atendas respondon pri mia restado.

Louison : Mi loĝas en Germanio jam de tri jaroj kiel rifuĝinto. Mi travivis malfacilajojn dum multaj monatoj, kaj okazis antaŭ nelonge ke mi finfine fariĝis agnoskita kiel plenrajta rifuĝinto kaj mia situacio aranĝiĝis por mia restado, kaj mi povas vivi pli sekure kaj daŭrigi miajn planojn, ĉefe pri la studado.

Rg : Estante en Danio por **Denis** kaj en Germanio por **Louison**, kiel vi sukcesas muziki ?

Louison : Ni hazarde denove renkontiĝis en Eŭropo kaj kreis kune **Afrikan Esperon**. Okazis poste ke **Denis** translokiĝis de Germanio al Danio. Do estas malfacile por ekzerci, kaj ni tutsimple ekzercas individue. Ni interkonsentas kiam okazas esparanĝojn. Mi veturas de Germanio al Danio kie mi renkontiĝas kun la cetera parto de la grupo. Ni konstatas ke kvankam tio ne estas tre praktika, ĝi tamen funkcias.

Rg : Vi jam faris surbendigajon, ĉar aperis titolo sur *Vinilkosmo-Kompil'*. Ĉu vi povas paroli pri tio ?

Denis : Jes, ni komencis surbendigi muzikon, sed ni havis kelkajn problemojn, ĉar ni devis aĉeti novan materialon. Kaj pro tio ni devas atendi.

Louison : Se ni havus sufiĉe da financaj rimedoj, antaŭe ni povus kompreneble surbendigi ion. Por la surbendigo por *Vinilkosmo-Kompil'* ni ricevis helpon de privatulo kiu ne estas espisto. Ni nun ĝojas ke oni povas aŭskulti nian muzikon sur KD. Antaŭ la fino de tiu ĉi jaro ni planas aperigi ĉu KDon, ĉu kasedon.

Rg : Kio estis via impreso pri la koncerto ĉi tie ?

Louison : Unue, la publiko estis malvarma. Ni havis la impreson ke la publiko ne kompreni nian muzikstilon kaj bezonis sufiĉe da tempo, ĉar estas stilo kiun oni ne trovis en Espujo. Sed kiam ni koncertis por la dua fojo, ni konstatis ke plejparto de la publiko alkutimiĝis al nia stilo kaj ili dancis. Ni nun havas la impreson ke la muziko plaĉas al ili.

Rg : Por konkludi, kion vi deziras al la legantoj de ***ROK-gazet'*** ?

Louison : Ni deziras bonan ĝuadon de nia muziko ĉe niaj aŭskultantoj. Ni pretas plibonigi ĉion depende de ilia gusto. Ni esperas ke ni progresos kaj ke ni povos oferti al nia publiko kion ili bezonas.

Denis : Mi povas diri same.

Intervjuis Flo, transskribis Tony :

La organizintoj

ROK-gazet' : Ĝis nun ni intervjuis multe da artistoj dum KEF 5, sed ne la plej gravan aferon – temas pri la organizantoj. Ĉar sen ili, KEF ne ekzistus. Estas kvin personoj, kiuj sin prezentos.

Jimmy : Mi estas **Jimmy Stryhn MEYER**, kaj mi okupiĝis pri la amaskomunikiloj.

Helle : Mi estas **Helle Eble JACOBSEN** kaj mi ĉefe devis aranĝi la koruson, sed mi faris multajn aliajn aferojn.

Jacob : Mi estas **Jacob NORDFALK**. Mi okupiĝis pri la partoprenantoj kaj la ekonomio rilate al ili. Mi zorgis ankaŭ pri reklamado pri la aranĝo.

Kim : Mi estas **Kimo**, mi estas **Kimo**, mi estas **Kimo** [*ridoj de ĉiuj*], kaj mi okupiĝis pri artistoj kaj amaskomunikiloj kaj ankaŭ pri la KEFejo.

Lisbeth : Mi estas **Lisbeth WAHL**, kaj mi respondecis pri la laborbrigado kun alia knabino.

Rg : Ĉu vi povas paroli pri la organizado de ĉijare, ĉar gravas prezenti iomete kia estis tiu laboro.

Kim : Ni ĉiam estis malfruaj. Mi opinias ke ni devas venontfoje komenci unu tagon pli frue. [*Ridoj*]

Jacob : Mi opinias ke la fina rezulto estas sufiĉe bona. Krom la Internet-kafejo, kiu tre malbone funkciis. Kaj **Kim** kaj mi tre malfacile donas sufiĉe klarajn taskojn al la homoj kaj eble la organizado suferis pro tio.

Rg : Ĉu ne estis kunordiganto super ĉiuj ?

Helle : **Kim**, **Jacob**, kaj **Line** estis la ĉefa grupo dum la jaro. Kelkaj el ni kiuj partoprenis la organizadon de la lasta KEFo, ne partoprenis ĉijare pro diversaj kialoj.

Rg : Fakte mankas fortoj por disdividi la taskojn.

Jacob : Laŭ mi, mankis la povo eluzi la fortojn.

Rg : Kaj kompare al la lasta KEF, kio estas pli bone kaj kio estas malpli bone ?

Jacob : La kvalito de la artista prezento estas bonega ĉifoje, vere, mi aŭdis tion de la partoprenantoj.

Kim : Estas du diversaj ejoj, du diversaj kvartaloj de Kopenhago. Lastfoje estis la bela parto de Kopenhago, kaj ĉi tiu loko estas por dorsosakuloj. En tiu ĉi kvartalo ne loĝas kreemaj homoj.

Rg : Ĉifoje estas diversaj lokoj, kaj ankaŭ tio disigas la homojn. Mi renkontis multajn homojn serĉante aliajn kaj netrovante ilin.

Kim : Ni volis montri nian kulturon al la ekstera mondo. Kaj tio estas malfacile farebla.

Rg : Ĉu vi havas reagon de neespistoj kiuj ĉeestis ?

Jacob : Mi opinias ke tio venos poste. Ni povos legi poste en la gazetaro.

Rg : Kiajn problemojn por starigi tiun festivalon vi renkontis ? Mi scias ke vi havis problemojn pri ejo kaj tio fuŝis multajn aferojn.

Kim, Jacob, Helle, Jymy & Flo! intervjuas

Foto Tony Guyot

Jacob : Por la antaŭa KEF ni estis en loko kie estas kutime koncertoj, teatraĵoj, ktp. Tian lokon ni ne elektis ĉifoje. En la ĉifoja loko, ili ne unue komprenis ke ni volis fari festivalon. Tio donis al ni problemojn.

Helle : La homoj kiuj respondecas pri tiu ĉi loko estis bonaj kun ni, sed ili dungas kelkajn homojn kun kiuj estis malfacile kunlabori, kaj tio estas la problemo laŭ mi.

Rg : Mi aŭdis ke vi venigis neesperantistojn en laborbrigadon. Ĉu vi povas iom paroli pri tio ?

Lisbeth : Tio estis laboro inter KEF kaj SCI (Servo Civila Internacia) kiu organizas laborbrigadojn internacie. Ni havis kvin esperantistojn kaj kvin neesperantistojn. Tio estis vere belega eksperimento ĉar interesiĝis amaso da homoj. Ni elektis ĉiujn de diversaj landoj.

Jacob : Mi fakte forte rekomendas uzi laborbrigadojn dum aliaj aranĝoj, ĉar de la neesperanta movado estas interesego partopreni.

Rg : Alia demando : temas pri la amasloĝejo, ĉar mi multe aŭdis pri ĝi ĉiutage. Ĉu vi povas klarigi pri tio ?

Jacob : La originalaj planoj estis trovi la amasloĝejon sufiĉe malfrue ĉar ni pensis ke ne eblas malmultekoste lui la lokon se oni petas jam duonan jaron antaŭe. Ni do planis peti la lokon unu monaton antaŭe.

Rg : Ĉu estas alia por diri pri la organizado ?

Jimmy : Eta rekomendo al organizantoj : temas pri tio ke mi translokiĝis al Luksemburgo, kaj se oni havas tiajn eksterlandajn organizantojn, oni estu iom pli atentemaj pri la komplikajoj kiuj povas esti kaŭzitaj de tiu situacio.

Rg : Ĉu vi volas ankoraŭ diri ion antaŭ ol konkludi ?

Jacob : Dum KEF ni faris eksperimenton : ni havis literaturan kafejon kie ni invitis verkistojn por paroli kun la spektantoj. Laŭdire estis vere granda sukceso. Eble tion oni uzu plu.

Rg : Cetere, kiom da partoprenantoj estis ?

Jacob : Partoprenis 213 el 34 landoj.

Rg : Kaj finance, kiel tio sukcesos ? Ĉu vi sukcesis trafi subvenciojn ?

Jacob : Ni tute ne ricevis subvencojn de neesperantista fondaĵo. Tio estis eble nia plej granda malsukceso. La financa rezulto devas esti proksime al nulo : ni nek gajnas nek malgajnas, sed ni ankoraŭ ne finkalkulis.

Rg : Do, konkludo : ĉu alia KEF ?

Jacob : Ĝis revido en Stokholmo en 1998.

Helle : Aŭ Norvegio aŭ iu alia lando, ĝis!

La nova gitaro

Bertrando ALBAULT

Gitarojn, mi jam havis ja tunojn da! *Fender, Gibson*, kaj *Ibañez* jam aris en mia gitarsalono flanke de malpli famaj markoj kiel *Martin, Ovation, Paul Beuscher, Valley & Blues, Baldwin*, aŭ *LAG*. Ankaŭ MIDI-gitarojn ĉiam kolektas mi; inter ĉilastaj, tronas ankoraŭ la fama olda *Roland*-gitaro G-707 kun ĝia gitarsintezilo GR-700. Rarega pretervivaĵo de pasinta jarcento! Eĉ jam posedis mi rarajn ekzemplerojn de fame nekonataj markoj kaj unikajn ekzemplerojn speciale kreitajn por famuloj aŭ eĉ por mi mem. Cetere mi estis ĵus ricevinta pakaĵon de ĉe Ŝanterel, la plej fama gitarfaristo de tiu ĉi fino de la dudek-unua jarcento.

Povis esti nur tiu gitaro kiun mi estis mendinta de li antaŭ jam pli ol unu jaro. Ŝanterel tre amas sian laboron kaj faras ĝin plej zorge kun plej atente sekigitaj lignoj el plej noblaj specoj. Cetere liaj prezoj jam tiam vere spegulis lian laboron....

" Mi vidu tion tuj!" pensis mi. Kiam oni mendas gitaron ĉe Ŝanterel, li neniam donas eĉ tre proksimuman prezon! Kiam oni mendas gitaron ĉe Ŝanterel, oni estas certe sufiĉe riĉa por ne malkvietiĝi pri tiom sordida detaleto....

Fakte, ŝirinte la fakturon el la koverto, mi konstatis ke mi estus tamen devinta iom pli prizorgi tiun detalon: mi devus konserti en la *Spaca Palaco* dum tuta monato por ĝin pagi! Kvin milionoj da terstelo! Guste tiom kiom gajniĝis al mi la vendo de miaj tri lastaj albumoj!

Kompreneble, ĝi ne estis tute ordinara gitaro. Ĝi estis verŝajne la plej bela kaj plej kosta kiun Ŝanterel iam faris.

" Mi tuj malpaku ĝin!" pensis mi tiam.

Aĥ! Mi eble forgesis prezenti min: John Mack J. Santameola. Jes! Mi estis la plej fama rokgitaristo de tiu ĉi dudek-unua jarcento. Mi naskiĝis en la jaro 2053 kaj jus festis mian tridek-unuan datrevenon. Kaj mi estis leganta sciencfikcian romanon, *2084* de tiu fama Erik Blair, laŭdire pordfiko de iu George Orwell, kiam ekalvenis la pakaĵo.

Jen finfine aperis la premreguligita kaj kontraŭfajra kesto en kiu Ŝanterel ĉiam liveras siajn fabrikaĵojn. Ŝlosita per speciala seruro kun kodo kiun mi tuj ricevis post ĝiro al la konto de Ŝanterel. Dank' al mia voĉa minitelo tio fariĝis en tridek sekundoj, kaj mi finfine povis malfermi la ujon.

Kia beleco, kia eleganteco, kia animo! Jes certe, tiu gitaro ne plu estis simpla objekto: ĝi havis jam animon! Apenaŭ mi tuŝis ĝin, mi sentis ŝin vibri, mi sentis ŝin vivi! Kiel mi petis, ĝi estis ekipita per la famaj aŭtomataj agordmekanismoj kaj de la perfekta Gitar-MIDI-sistemo, sed ne tio donis al ŝi animon.

Ŝia vivo venis de la raraj lignoj kaj de la amo mem per kiu Ŝanterel vivigis ŝin. Interalie mi estis petinta ke la tenilo enhavu laŭ ĝia tuta longo stangeton bone rektan de iu rara korifaco (*Corylus Metallica Contorta*), kiun oni fakte ne trovas sur Tero. La stangeto kiun Ŝanterel sukcesis trovi estis apenaŭ kvindek kvar centimetrojn longa kaj ok milimetrojn diametra, sed tamen kostis la bagatelon de sepcent mil terstelojn. Transportokostoj ne enkalkultaj! Efektive ĝi devenis de Elva Centaŭri! Sed, ĉefe, necesas substreki ke trovi tiom longe rektan branĉon de tiu tre aparta speco de korifaco iĝis unu el la plej temporabaj okupoj tra la universo.... Kvazaŭ plenigi la danaidinan barelon!

Por memoro, Fender tiam ankoraŭ vendis siajn famajn *Stratocaster* po ducent ĝis kvarcent terstelojn, laŭ procentaĵo de enlandaj impostoj.

Elva Centaŭri estas termorfa* planedo kie disvolviĝis kaj daŭre evoluadas civilizacio de humanoidoj* tre fajnaj kun longaj pintaj oreloj. Tra malsamaj vojoj ili atingis sciencan staton altnivelan kiu permesis malkovri antigraviton kaj, dank' al ĝi, ekonomie vojaĝi tra la spaco. Dum niaj spacoŝipoj bezonas ankoraŭ nun plurajn jarojn por atingi la centaŭrian stelsistemon, iliaj vojaĝoj ĝis Tero daŭras apenaŭ kelkajn monatojn.

Mi elprenis la gitaron de la ujo kaj ekkonsciis ke fakte tiu elektra gitaro nur nun komencis ekvivi kaj ŝuldis tion al mia sentemo pli ol al iu ajn speco de vivformo. Nur mi konektu ĝin al amplifilo kaj ŝi povos kanti por mi.

Miaj fingroj ekkuris sur la kordoj, kaj muziknotoj tuj glate elfluis tra la amplifilo. Verdire mi neniam ankoraŭ tuŝis tiom glatan kaj precizan gitartenilon. Mi ne sentis ĝin sub miaj fingroj, nur la notojn kiuj flue eliris el la gitaro ekzakte kiel mi elpensis ilin. Neniam mi atingis tian travideblecon per iu ajn gitaro! Fantaste! Mi miris ke tiu gitaro povu esti tiom mirinda! Ĉu miraklo? Ĉu sorĉo? Aŭ ĉu nur la sola scifaro de Ŝanterel sufiĉis por ĉiam eksterordinara rezulto? Kaj la diversaj sonnuancoj kiuj vibris al miaj oreloj laŭ la diversaj mikrofonkombinaĵoj donis al ŝi grandegan riĉecon. Vere mi certe ne bedaŭros mian monon! Plie! Bone trafis ke mi ricevis ĝin hodiaŭ: ĉivespere mi koncertos antaŭ pli ol dek kvin mil personoj. Eble dudek mil. Sed jam pli ol dek kvin mil enirbiletoj vendiĝis! Do mi devis tuj provi la MIDI-sistemon tiel ke mi ne havu surprizon surscenje. Tio estus malagrabla!

Tiu Gitar-MIDI-sistemo vere estis perfekta! Malgraŭ kion oni opiniis ankoraŭ ĉe la komenco de tiu ĉi dudek-unua jarcento, elektronikistoj sukcesis realigi la matematike neeblan laŭritman transdonon de la plej basaj notoj de la gitaro. Kiel ili sukcesis, al mi ne demandu! Mi estas nur muzikisto, ne teknikisto.... Mi eĉ ne sukcesis kompreni kial tio teorie ne devis ebli! Sed ili sukcesis kaj ilia tute lastdata sistemo kiun instalis Ŝanterel kapablis transdoni ĉiujn manuaĵojn de gitarludado. Necesis nur ke la konektita sintezilo kapablu interpreti la senditajn mesaĝojn.

La miaj jam estis reguligitaj por tion fari, almenaŭ laŭ la eblecoj de mia lasta MIDI-gitaro.... Kaj jam tiel la aparataro fantaste kaj akurate reagis, perfekte!

Post unuhora provludado, mi ekkonsciis ke bona asekuro necesas por tiu juvelo! Ree voĉmiriteladO, sed surprize la ĉefasekuristo prenis la linion kaj 3D-telefone alparolis min. Li volis ĉion vidi! Fakturojn kompreneble, sed ankaŭ la gitaron mem. Kaj la protektan ujon. Kontentigita li finfine konsentis ĝin kovri kontraŭ ŝtelo, fajro, akvo, kaj akcidentoj, hejme, survoje, kaj eĉ surscenje.... Sed ne por nenio! Por tiu prezo li eĉ konsentis damaĝojn pri malprofito....

Finfine jam alvenis la horo por la koncerto. Rapide mi finpretiĝis! Dum tiu tempo en la vastega salono mi aŭdis la milojn da spektontoj bruaĉi, petoli, fajfadi, ekkanti, kaj bleki. Nun mi estis preta grimpi surscenejen kiam pedelo alportis rekte al mi oficialan mesaĝon!

Bone! Mi prenis ĝin! Mi malfermis ĝin! Mi eklegis ĝin kaj ekmiris! Nekredeble: speciala oficiala ambasadoreca delegacio ĵus surtereriĝanta alvenis de Elva Centaŭri speciale por vidi kaj aŭdi min. Kaj oficialaj instancoj petis min bonvoli atendi ilian ĉeeston por ekkomenci mian spektaklon! Spektaklon!? Ili taŭzis min, tiuj oficialulo! Estus nur por ili mi estus tuj ekkomencinta mian koncerton kaj eĉ ŝen bremsiloj!

Sed por tiuj elvanoj kiuj faris tiom longan vojon, nur por min vidi kaj aŭskulti, mi povis fari escepton kaj malfruigi la koncerton! Tamen mi grimpis surscenejen. Post tiomsaj aplaŭdoj tuj ĉesantaj kiam publiko ekkomprenis ke mi ne intencis tuj ekludi sed nur alparoli ilin, mi anoncis la porunuaĵojn okazaĵon: efektive ĝis nun neniam iu ajn eksterterano estis veninta teren nur por spekti koncerton. Kaj la publiko ekis hurli kaj fajfi aplaŭdegante tian eksterordinaran novaĵon.

Finfine la elvanoj alvenis; ili estis tridek-kelkaj, kaj iliaj futurecaj vestoj brilis pro eleganteco propra al ilia raso. Ilia veno certe estis antaŭvidita ĉar ŝajne lokoj estis rezervitaj; vera honorloko, juĝinte laŭ la luksaj foteloj tie instalitaj! Mi lasis al ili la tempon instaliĝi kaj grimpigis miajn akompanantajn muzikistojn sur la bretojn. Ili ekprenis siajn muzikilojn kaj tuj ekrimis peza alvoka reludaĵo. La publiko varmiĝis kaj ekskevis krie kaj manfrape, alvoke al sia rokstelo.

Mi ankoraŭ atendis iomete ke la spektantoj kvazaŭ kovru la muzikon kaj finfine ekfurziĝis surscenejen kiel diablo el infero. Publiko aplaŭdegis kovrante la miaŭadon kiun mi vigle eltiris de mia nova gitaro. Samtempe kaj unuanime ĉiuj elvanoj stariĝis! Ĉiu sidanta spektanto imitis ilin sinsekve kaj ondoj ŝajnis ŝvebi tra la vasta homamaso!

Pli ol dudek kvin mil personoj estis ĉeestontaj la koncerton dum la pli ol tri horoj kiujn mi daŭrigis ĝin.... Tio ankoraŭ neniam okazis al mi, sed ĉion tion mi ankoraŭ ne sciis! Ne pli ol kio reale estis okazonta!

Tiam mi sentis kvazaŭ novajn fortojn invadi miajn korpon kaj menson. Ritme elfluis ravaj raraj notoj tra mia nova gitaro. Senpene, ili elspruĉis kiel pura brila akvofonto, ŝvebis tra la aero kiel irizitaj akvogutetoj por fine kuniĝi en magiajn ariojn kaj strebajn rekantaĵojn kiel akvospruĉo nature finiĝas en gajan rivereton. Kaj kiel riveretoj kuniĝas por fine pleniĝi marojn kaj oceanojn, arioj kaj rekantaĵoj edziĝis flue por ĉarme submergi orelojn avidajn je rokmuziko.

Ondoj da kontentiĝo jam trakuris la vastegan salonon. Akraj rokemuloj freneze dancis tra la starlokoj kie homamasa denseco tion ankoraŭ permesis. La elvanoj ja forte aprezis mian muzikon. Kvankam ili ĉeestis nur trideko, mi trasentis ilian streĉitan atenton de melomanoj tiom potenca kiel tiu de la tera homamasa ĉeestantaro. Iliaj tridek paroj da pintaj oreloj sekvis min kiel radaroj, kaj iliaj tridek paroj da vastaj amandaj okuloj* ŝajnis senĉese celi min. Mi ne devis lasi min emocii far tiom impresa trasentaĵo. Potencaj fortoj nun bolis tra miaj vejnoj. Mi flue ludis, muzike komuniante kun mia rokgrupo, preskaŭ komunikante kvazaŭ telepatie. Eĉ ŝajnus ke mi transdonis parton de tiu eksterordinara energio al miaj kunludantoj. De temp' al temp' kaptis mi miran scivoleman okulumon: do io estis vere okazanta, ne temis nur pri propra iluzia impreso.

Iom poste, mi ekatakis pli viglan rokmuzikpecon. Drumoj drumegis, gitaroj gitaregis, basgitaro ritme kuris, sintezila MIDI-bachzofono* zofonis responde al mia akuta blekgitarkantado. Fakte mi kantis imitante mian gitarludadon kaj gitarludis similante mian blekadon. Kaj, ĉivespere, eble, tio pli bone sukcesis ol kutime: kvankam plej ofte tiu speciala ludmaniero estis ŝajninta perfekta, ĉifoje ĝi estis eĉ pli ol tia!

Mi komencis, ek de tiam, antaŭsenti ke tiu ĉi koncerto partoprenos la grandan historion de rokmuziko. Certe ĝi devos eniri analojn de roko.

Sed mi tiam ankoraŭ nepre ne povis antaŭsciĝi ĝis kiu grado....

Svinge svavis sturmaj strangaj bizare bazaraj MIDI-sonaj notoj el mia nova gitaro. Akurate ĝuis ili akutan ĉeeston precizecon. La fajne fajra ario intime forflugis en la atmosferon super la homamaso. La notoj, akre sentemaj, ŝajnis disiĝi kaj rekuniĝi, ŝvebante tra peza, solida aero. Etoso same pezis. Iu nedefinita lo streĉe strebis al konscio. Mi subite kaj abrupte konkretigis Ĝin. Fulmotondre potencega akordo eksplodis el mia gitaro. Ampleksigita je seka tempo far la tutplena orkestro. Drumtremado enterigis rikter-skalon! La tuta salono terure vibris. Vigle potencaj ritmo eksekvis kaj iliaj mistere sturmaj notoj gvatis al publikorelojl el de mia nova gitaro. Jen aproksimiĝis la superkoruso de tiu majstra muzikpeco.

Ŝajnis al mi ke ŝi konas ĝin. Mi volas diri ke ŝi konas ĝin. Pli precize ke mia nova gitaro jam ŝajnis koni la koruson kavazaŭ ŝi estus verkinta ĝin. Preskaŭ aperis al mi ke ŝi altiris miajn proprajn fingrojn sur ŝia tenilo sur la tute ĝustan lokon por akurate ludi la taŭgan noton je la plej taŭga maniero. Preskaŭ taŭza, ĉe la limo! Se mia gitaro mem scipovas ludi, kion mi iĝu, mi?

Sed mia profesiismo reprenis la regon de la situacio. Necesis ke mi ne lasu min forporti pere de miaj emocioj. Ke mi konservu piedojn surtere....

Trafe! Ĵus mi ekhavis la impreson ekflugi... kaj daŭre havis ĝin. Mi sentis min tiom flua, tiom malpeza kiom tiuj notoj forflugantaj kiel vespoj el mia gitaro. Eŭforio frapis la ĉeestantaron. Ondoj da pura plezuro vagis tien kaj reen mergante la salonon en beatan stuporon.

Samaj ondoj mergis min same en tiom stuporan beatecon. Miaj fingroj kuris solaĵ sur la gitartenilo, mem pinĉis kordojn pli taŭge kaj akurate ol mi iam kapablis, kvankam mi estis plej fame brila gitarstelo, plej kapabla muzikisto.

Ne! Dankon! Mi ne bezonas... stretan kaskedon! Mi jam posedis plurajn, kaj, dank' al Mio, ili ĉiam taŭgas.... Publiko ĝuis mian muzikon kiel paradizan Nirvanon. Mi mem ne plu priatentis ke mi estis ludanta rokon.... Eĉ ne plu tion konsciis. Ĉu nur mi ankoraŭ ekzistis aŭ ĉu restis mi nur pura muziko. Fluaĵoj eteraj. Ondoj vagantaj. Vigle varmaj vibroj, vibrantaj vibracioj ĝintaj vivantaj vibrajoj. Finfine, post pli ol tri plenaj horoj da muzikĝuado, post multnombraj realvokoj kaj tondraj stormaplaŭdaroj, la koncerto efektive ĉesis. Salono subite silentiĝis en beatfeliĉe regula haoso plenpotence tradukanta la ĉeestantan ĝojteruran kontentiĝon.

Mi elĉerpiĝis.

Plenplene elĉerpiĝis!

Mi estus vigle sveninta surloke! Se mia nova gitaro ne tenus min stare kaj ne puŝus min tra kulisoj ĝis mia loĝio.

" Kiel vi ja do realigis tiun efekton? " - mire aldemandis min la reĝisoro.

" Dankon, dankon! " - apenaŭ sukcesis mi flustri, kvazaŭ li estus ĵus gratulinta min!

Ĉiukaze pli ne estus mi povinta diri. Eĉ ne pripensi; mi tro lacis, lacegis.... Mi pensis nur plu pri lito kaj pri dormo. Pene, mi tamen sukcesis atingi mian loĝion.

Apenaŭ enprofundiĝis mi en la milde dolĉa fotelo ke frapis ĉe la pordo.

Mi ne respondis.

Pordo insistis.

" Envenu. " - flustris mi neaŭdeble.

La pordo malfermiĝis. Eniris iu. Malantaŭ li mi sentis multnombran ĉeeston. Tamen spiro da freŝa aero ŝajnis esti enveninta. Ĝi agrablis al miaj pulmoj.

La pordo jam estis refermiĝinta. La enveninto apenaŭ diveniĝis en la ripoza mallumo. Ekparolis li. Mildvoĉe kvazaŭ respektante mian ripozon! Kvazaŭ iu sur tiu ĉi Tero ankoraŭ havus animon por zorgi pri ripozo de rokstelo elĉerpita post glora koncerto! Ha, tiuj aĉegaj ĵurnalistoj! Ah! Senkompatemuloj, fi!

Mi ankoraŭ tenis la novan gitaron, kiun mi ne estis kuraĝinta demeti en sian ujon, livmane je kolo, pendanta je mia brusto pere de orplektita bandoliero.

Fakte la enveninto tiom mildvoĉe parolis ke mi kvazaŭ ne priatentis. Mi flustris kiel mortinta blovo.

" Pardonu. Kion deziras vi? "

" Pardonu nin vi mem. " - mildvoĉis la flua silueto. " Mi ne volis geni vin. Sed mi nepre devas tuj paroli al vi. "

" Do intervjuu! Mia nomo estas Bond.... , James Bond, kaj mi estas sek.... "

" ...reta agento de Ŝia Gracia Moŝto.... Ni konas niajn klasikaĵojn pri terkino, ankaŭ ni.... Cetere ĉiam daŭre tre ege amuzegas nin filmoj de Nul-nulsep!"

Mi daŭre ne povis vidi al kio ajn similus mia interflustranto. Iom da lumo bonvenus sed mi ne kuraĝis kapti la ŝaltilon de la apuda lampo.

" Sed tute alia estas jeno. " daŭrigis li mildvoĉe. " Mi tute ne estas ĵurnalisto nek iu ajn reportero kia via stranga humoro lasus min kredi ke vi pensas min. Tute ne intencas mi vin intervjui nek taŭzi en iu ajn maniero. "

" Feliĉega tion priscii! Certe! Sed se tio verus, vi jam forestus! "

" Efektive, kaj se tio estus ebla, mi estus atendinta morgaŭ matene por alparoli vin. Sed urĝas, nepre urĝegas. "

" Lasu min trankvila, mi petas! Nur urĝas ke mi dormu. Ke mi refaru al mi fortan sanon. Absolute necesas ke mi ripozu pace. "

" Tio certe tre rapide povus okazi. Definitive! Se vi ne konsentas aŭskulti kion mi devas diri. Kion vi nepre devas tuj scii! "

" Ho! Ĉu temus pri minacoj? " - moke klaĉis mi al tiu nedefinita ombro flue moviĝanta en mia loĝio.

" Certe ne. Faru iom da lumo. Vi tuj vidos ke mi ne estas armita. Kaj ankaŭ ke la afero kiu okupas nin estas tute serioza.... Temas pri via gitaro.... Sed... faru do lumon! "

" Faru mem! Faru do! "

" Mi estus preferinta eviti tion, sed se vi insistas.... Ĉu vi vere certas ke vi ne volas mem lumigi tiun ĉambron dank' al normalaj kutimaj rimedoj? "

" ...? "

" Jes, vi certe pli bone priscias ol mi kiel oni faru lumon en tiu ĉi loko.... Motivo: vi bone konas ĝin! "

" Ĉu tio okazas al vi ofte spiti senpagajn vortludojn? "

" ...!? "

Ĉifoje estiĝis senvoĉa la lume sombra fama nekonato, silenta alparolinto. La etoso ĝis peza, sed daŭre nebula. Tamen sentis mi ion strangan en la aermallumo.... Iu flava fon', seka, ŝvebis kiel marsa mevo ĉe luna marstrando... en mia loĝio!

Ĉu tiu nebululo volis por mi novan ĉerkon ĉceti? Aĉe! Kiaj nigraj pensoj trafis min do! Kial do mi ne kapablis lumigi nek loĝion, nek situacion, eĉ nek vizaĝon de enirinto. Kial ne kapablis mi pli ankoraŭ fari el li elironton, lin forpuŝi el mia ejo, lin forpeli kaj eksteren elĵeti. Mi provis elkalkuli energie formalan formulon por ĉilasta celo.

" Mi ne venis tien ĉi por perdi tempon en vanaj ludoj iuajn specaj. " finfine elflustris li antaŭ ol mi mem ĝis preta paroli, kaj ĉe por iu ajn hezita priparolado aŭ hipokrite gentila klaĉado. " Mi faru do lumon. "

" ...! "

" Ke lumo estu! " fanfaronis li el granda vapora gesto. Kaj lumo estis!

Mia buŝo gape falmalfermiĝis. Miaj okuloj helikis. Mia cerbo prioniĝis: certe mi tro manĝis da frenezaj kokovinoj*. Mi estis halucinanta....

Eble ne! Fakte, rekta antaŭ mi elstaris supera elvano, kun siaj grandegaj okuloj, siaj grandaj pintaj oreloj kaj verdaj longaj haroj plenaj je brilaj verdaj steletoj.

Tamen, la lumo strangis. Ĝi verdis kvazaŭ la ejo fosforeskus. Ĝi donis hororfilman etoson kaj malkvietigan mienon al la elvano. Li ree ekparolis, tute serene kaj serioze.

" Mi estas elvano.... La respondeculo, laŭ teana koncepto, de nia delegacio. Fakte ni ne venis nur por ĝui vian koncerton. Necesas ke vi tuj akompanu nin ĝis Elva. Ne plu tempas por priparolad'. Urĝas. Urĝegas kaj vi mem devus tion senti. Fakte ŝajnas ke vi ja tion sentas, eĉ sentegas, sed vi ne konscias. "

" Kion vi rakontaĉas al mi? " penege eldiris mi. " Vi simple provas min forrabi! "

" Tute ne! Temas pri via gitaro. Tre bela kaj tre bona instrumento inter spertaj manoj.... Sed kun tre malsperta cerbo... rilate iun aranĝon specialan je ĝia tenilo.... "

" ...? "

Neniu sciis, krom Ŝanterel kaj mi, pri la enhavo de mia gitartenilo. Ĉu ili tamen kapablis tion ekscii, kaj kiel?

" Vi eble opinias ke rekta stango tiom longa de tiom rara korilaco estas tiom ofta varo sur Elva ke neniu prizorgas pri kio ili farigas? Precipe kiam eksterelvano orpreze priaĉetis ĝin. "

" Sed.... "

" Timu nenion. Ni ne intencas detrui vian gitaron nek ĝin forpreni.... Vi tre taŭge farigis ĝin! Nur maltaŭgas ke vi ne konas ĝian veran potencon! "

" Ofi...!? "

" Ĉu vi nur vere konsciis pri eksteroordinaraj okazajoj dum la koncerto? "

" Ĉu vi nur vere konsciis pri eksteroordinaraj okazajoj dum la koncerto? "

" Mi ĝisfine tiom facile ludebla, tiom senpere ĝusonis, ke mi fantaste muzikis kun terure emfaza impreso deliri.... "

" Vi eĉ ne konsciis ke dum via giganta superkoruso meze de la koncerto, vi forflugis ĝis dek metrojn alte, mezvoje al la plafono? "

" Mi efektive sentis min multe malpeza.... "

" Ĉu vi scias ke, dek centimetrojn longa, tia stangeto estas jam terura cerbumamplifilo se vi scipovas ĝin korekte uzi.... Sed fia detruamplifikilo se vi malscias! "

" Kion signifas? "

" Antaŭ longe, ankaŭ sur Tero ekzistis tiu rarega aparta speco de korilaco. La lastaj specimenoj estis stulte detruitaj kaj forbrulitaj dum via tenebra Mez-Epoko. Same kiel oni forbrulis sorĉistinojn! Pro nescio kaj timego de nekonatajoj. Tiu metalaspekta kuntordita korilaco posedas neordinarajn proprecojn. Teranoj nomis tion magio. Ni nomas ĝin cerbologio. Tre malfacilaj studoj, ege longaj. Sed necesaj por vi se vi deziras daŭre muziki kun via nova gitaro. Aŭ eĉ nur ĝin daŭre posedi! Sed mi vetus ke ekde ĉivespere vi ne povos akceptí forlasi tiun mirinde perfektan instrumenton.... "

" Ne! Malfacilis tion diveni! Ĉu vi eĉ nur scias kiom ĝi kostis al mi? "

" Tute ne gravas por ni tiu speco de detaloj! Se ne, laŭ vi, kiom kostus la simpla veno de tridek elvanoj Teren? "

" Vi pravas! Sed mi lacegas kaj volas dormi.... "

" Ĝuste! Nur lasu min iom teni la gitaron, kaj vi tuj sentos etan pliboniĝon. Sed eĉ se vi akceptus forlasi la gitaron, vi jam tro longe tenis ĝin por ne bezoni esti ekzamenita de niaj sanigistoj. Permesu ke mi enirigu ilin. Timu nenion: ni ŝategas vian muzikon. Admiregas vin kaj plenĝuis vian koncerton. Ni esperegas ke vi ankoraŭ koncertos, eble eĉ sur Elva mem. "

Mi estus ŝatinta respondi iun taŭgan dankan aprezon, sed mi vere sentis min pli kaj pli elĉerpita.

Finfine tiu longa foresto kaj eĉ la vojaĝoj mem estis vere agrablaj. Elvana kompanio rimarkinde amika senlace sentigis min necesa.

Longaj jaroj da studaj kursoj, krom necesa scio, alportis animan konon de senpera tre malsama kaj multe pli justa civilizacio, kie hipokriteco kaj profitemo flegiĝas kiel teruraj malsanoj.

Kaj nun mi revenas por denove koncerti sur Tero, kaj alporti senperan ammesaĝon. Se tiu profitama socio ne jam forgesis min kaj mian rokmuzikon profite al iu komerca muzikaĵo.

Terminaro

termorfa planedo : planedo kies morfologio rivelas vivkondiĉojn tre similajn al tiuj de nia kara planedo Tero.

humanoido : ulo apartenanta al (principe) ekstertera raso de intelligentaj estaĵoj kiuj, pli-malpli aŭ eĉ nur proksimume, similas homajn rasojn.

amandaj okuloj : ŝajnis al mi ke en tiu ĉi kazo, " migdalaj okuloj " taŭgas nur por teranaj okuloj. Elvanoj havas tiom grandajn ke eĉ amando ŝajnas al mi esti tro eta priskribo!

bachzofono [bak-] : muzikinstrumento (ĉu vere!) de la la XXIa jarcento. La **~o** estis inventita en 2069 de iu obskura **Joy Sergej BachĤluss** [bakĥus]. Ek de la 70aj jaroj **~oj** estis pli kaj pli uzataj por moderna rokmuziko. **~I** (aŭ **zofoni**) : ludi muzikon per de **~o**.

kokovo : farmuzinbesto industrie produktita en moderna farmuzinoj ekde la jaro 2049, kiam nobelpremiita eminenta profesoro **Ĵako B. Krosfeld** definitive fiksis la novajn genojn de ĝiaj kromosomoj. **~o**, **~ino**, estas paro de memreproduktela hibrido de koko, bovo, ŝafo, meleagro, kaj struto, rezulto profitoplena de genetiko. Viando de **~ino** estas uzata plejofte de rapidmanĝejoj, sed ankaŭ en granda kulinarto kun kalifornia ĉampana bordozo en la fama **~ino je vino**.

Pop- kaj Rokbandoj

Konsumigas nin Flo !

Haltu financa integrismo!

Bernardo, Dudu, Johan-Petro

Finfine alvenis **Mondo Nova**, nova rokbando el franca urbo Château-Renault, 30 km de Ambuazo (Amboise) ĉe Luaro (Loire). Starigis la bandon la gitarinstruisto espisto **Johan-Petro Poulin** (legu pri li en " *Haste-Klaĉe* ", ***Rg*** n-ro 7), kiu agadas ankaŭ en medio de Distribua Ekonomio (aŭ Disdona Ekonomio). **Mondo Nova** ĵus aperigis 5titolan KDon, kiu bedaŭrinde direktiĝas nur al francparolantoj, ĉar el ĝi nur la nomo de la bando estas en espo, ĉiuj tekstoj estas en la franca. Nefrancparolantaj espistoj devos atendi aperontan albumon por ĝui espotitolojn : tion anoncis Johan-Petro – espereble li baldaŭ plenumos la promeson ! Ekde nun espaj francparolantoj povas malkovri interesajn ideojn en tiu KD pri alternativa ekonomisistemo, donante konkretajn solvojn al la grava ekonomia krizo en kiu ni ĉiuj estas (senlaboreco meze de tioma produktiveco, pligrandiĝanta profito de la bankoj, mizero kreskanta meze de tioma abundeco, ktp.).

Mondo Nova konsistas el **Bernardo Poulin** (basgitaro, korusoj) **Dudu** (**Didier Daguemel** kantisto, korusoj, gitaroj, perkutilaroj), **Johan-Petro Poulin** : (kanto, korusoj, gitaroj). Gastis por la kvintitola KD **Marko** (**Jean-Marc Poulin** drumoj), **Piero** (**Brigitte Nordet** de la bando **Miss Understood** korusoj), **Bath** (**Isabelle Bataille** grafismoj de la KD, kovrilo kaj disko).

Laŭ trankvila rokstilko, la unua titolo " Consommez ! " (Konsumu !) estas parodia kritiko pri la nuna ekonomi-socipolitika situacio en kiu la registaroj praktikas rigoran ekonomipolitikon blokante la salajrojn, plialtigas kaj pagigas kromajn impostojn (en Francio : TVA, CSG, RDS,...), ktp., kaj aliflanke instigas la popolojn konsumadi por relanĉi ekonomion de siaj landoj.

Laŭ pli vigla rokstilo (iom laŭ la stilo de **La alburnoj** [**Les Ablettes**]), la dua titolo " On veut des sous " (Ni volas monon) klarigas jenon : En la rekantaĵo :

Ni volas monon, ni volas monon,
sed, ho ne ! laboron....
En la teksto :
Hej, ne plu estas laboro ?
Des pli bone !
La mašino anstataŭas la Homon ĉar ĝi estis koncipita por tio, sed ni ne forgesu ke mašino ne anstataŭos la Homon por konsumi.
Moralo : Ni volas monon por aĉeti la frukton de la laboro de la mašinoj.
Ĉiuj volas krei dungofertojn, sed antaŭ ol krei dungofertojn, estus necese krei monon, ĉar ni ne havas intencon labori senpage ; krom se ĉio estus senpaga. Ni havas la teknikrimedojn, ni havas la krudmaterialon, ni havas la rimedojn por ŝanĝi....

La kvara titolo estas 12 minuta interparolado inter **Jean-Pierre Mon** kaj **Marie-Louise Duboin** pri praktika Distribua Ekonomio. Distribua Ekonomio estas transira aranĝo al vera liberecana socio kiam mono malaperos ! Kiel transiro, Distribua Ekonomio pinte analizas la monsistemon kaj monkreadon. Rilate al tio, ĝi proponas originalan solvon : " Konsumonon " (mono inventita de **Ballamy** en la jaro 1888 [similecoj al espo de **Zamenhof**, ĉu ne ?], kiu ne vere estas mono !) interŝanĝe de civitana servo. Internaciskale reto de tiaj alternativuloj strukturiĝas, kaj kiam en ĝi estos sufiĉe multenombraj partoprenantoj eblos malstabiligi kapitalismon per pag-striko tutmonda !

Mondo Nova celas diskonigi Distribuan Ekonomion per sia rokmuziko ĉar nun estas favora kriza periodo por tutmonde diskonigi ideojn, konstrui tutmondan reton, verki kaj traduki informilojn kaj broŝurojn (nacilingve-espe kaj espe-nacilingve). Interesa iniciato kiun vi povas subteni informiĝante kaj mendante la KDon kontraŭ 35 FRF, 7 IRK, aŭ 7 USD. Laŭdire la KD elĉerpiĝis, sed en nia redaktejo restas kelkaj malmultaj ekzempleroj.

Mondo Nova
p/a Jean Pierre POULIN
7 rue Jules Ferry
FR 37110 CHÂTEAU-RENAULT
Francio
tel. +33 2 47 29 53 90

Araukana subgrunde en Brazilo



De meldkstre : León, Douglas, Julio, Leandro.

De meldkstre : Douglas, Pablo, Julio, Tatiana, Zé Guilherme.

Julio ludas basgitaron en du bandoj : **Araukana** (punk/hardkoro) kaj **Parental Advisory** (grinco). La du bandoj eldonis unuan komunan demokasedon. **Parental Advisory** estas triopo kaj kantas en la angla kaj portugala. **Araukana**, starigita en 1995, estis komence triopo kun **Julio** (basgitaro, korusoj) ; **Pablo** (gitaro) ; **Ze Guilherme** (drumo, voĉo). Post unu jaro **Ze Guilherme** ĉesis kanti ĉar li malbone kantis fremdajn lingvojn (anglan, espon, kaj hispanan). Tiam eniris la bandon **Tatiana** (amikino de **Julio**) kaj **Douglas** por kanti. **Julio** ĉesis koruskanti, kiun ekplenumis **Guilherme**. Nun **Araukana** kantas en la portugala kaj espo.

La kvinopo pli bone prilaboras la novajn muzikajojn kaj la stilo diversiĝis : ne nur simpla punkroko, sed ankaŭ skao, hardkoro, repo, ktp. La bando estas anarkiismema kaj provas pere de siaj tekstoj transdoni siajn opiniojn. De la naskiĝo **Araukana** multe koncertas en la subgrunda scenejo brazila. En la bando la nura persono kiu fakte estas espisto estas **Julio**, sed li iomete instruis ĝin al **Douglas** kaj **Tatiana**, kiuj nun kapalas legi kaj kanti, baldaŭ ili parolos. **Julio** lernis espon en la komenco de 1995. Kelkajn monatojn poste li komencis verki espotekstojn por kantoj. **Julio** kaj **Tatiana** planas eldoni " zineton " (fanmagazineton) portugal- kaj esplingvan. La ideo kaj ideologio de espo estas tre ŝatata de ili kaj pro tio ili disvastigas ĝin en tiom oportuna medio pere de la koncertoj kaj de gazetoj. Nun multaj rokbandoj en Brazilo interesiĝas pri la internacia lingvo, kaj baldaŭ ekfloros novaj espobandoj, kiuj petas helpon ĉe **Julio** por lerni espon kaj espigi tekstojn. **Julio** disvendadas en la subgrunda scenejo aŭtodidaktajn espolernolibrojn. Baldaŭ vi povos legi pri bandoj kiel **Stomachal Corrosion**, **Revolução Social**, **Democratic Disorder**, **Parental Advisory**, ktp.

Araukana kaj **Parental Advisory** surbendigos komence de 1997 novajn kantojn kaj resurbendigos pli bone la plej elstarajn malnovaj titolojn cele al eldonado de dua albumkasedo kun espomuzikoj. **Araukana** evoluas ĉefe en subgrundaj sferoj de Brazilo kaj esperas iel tutmondiĝi en la alternativa scenejo. Ni atendu senpacience tiun anoncitan kasedon. Pliaj informoj pri **Araukana** haveblas ĉe :

Julio CALEGARI
CP 60084
BR 05096-970 SÃO PAULO SP
Brazilo
e-mail : turismo.asterix.anhembi.br (kun indiko : " Letero al Julio ")

Rimarko : legu lian artikolon " La brazila subgrunda scenejo " en la rubriko *" Muzikmovado "* en tiu ĉi n-ro de ***ROK-gazet'***..

Kaj Do?

Jen nova espobando el Italio kiu unuafoje prezentiĝis sur scenejo dum la 20a IJF (Internacia Junulara Festo en Italio). La ideo fondi muzikgrupon venis al **Giuseppe** dum la pasinta IJF, kie ludis **La Kompanoj** el Bordozo, Francio (kvalita amatora spektaklo pri la franca kanzonisto **Georges Brassens**, starigita de **Marcelo Redoulez**, helpe de ĉirkaŭ 20 kantaktoroj). Tiu spektaklo inspiris kaj instigis lin ion fari tiel... sed rokstile.

Giuseppe proponis al geamikoj la ideon, kaj la aventuro ekstartis.

Kaj Do ? konsistas el : **Giuseppe Castelli** (elektra gitaro), **Luca Giovanelli** (basgitaro), **Daniela Porcari** (voĉo, akustika gitaro), kaj **Gian Luca Porcari** (drumo la frato de **Daniela**). **Daniela** estas 27jara kaj la aliaj 26jaraj, kaj ĉiuj loĝas en Piacenza (apudurbo de Milano, Italio). Pro multaj profesiaj okupoj de la muzikistoj, la bando ekzercas maloftege kaj pro tio restas tute amatoreca kaj bezonas perfektiĝi. La sola ĝisnuna koncerto estis tiu en IJF, parte pro tempomanko, parte pro somera gorĝmalsano de **Daniela**, kiu ankoraŭ ne sukcesis kuraciĝi. La estonto de la bando kuŝas tie, sed ankaŭ laŭ la instigo de espogrupoj kaj aranĝoj por koncertigi **Kaj Do ?-n.**

De la bando nur **Giuseppe** estas espisto – li verkas, tradukas, kaj adaptas tekstojn. Duono de la kantoj estas en espo kaj duono nacilingve. Kompreneble **Daniela** kantas papage. **Kaj Do ?** ludas diversstilan rokmuzikon, plejparte estas muzikpecoj de famkonataj bandoj, adaptitaj al espo. Tiel estis adaptitaj kantoj kiaj *" Should I Stay or Should I Go ? "* de **The Clash**, kiu iĝis " Ĉu mi restu tie ĉi ? " ; aliaj kantoj de **U2** ; **Simple Minds** *" Don 't You Forget about Me "* fariĝis " Ne plu forgesu pri mi " ; **Mike Oldfield** kun " Lunluma ombro " ; **The Cranberries** *" In Your Head, Zombie "* iĝis " En via kapo, Zombi' " ; **Spin Doctors** " Du Princoj " ; **Green Day**, **Litfiba**, ktp.

Kvankam **Giuseppe** ŝatas ankaŭ pli malfacilan muzikon kia **Dire Straits**, **Pat Metheny**, **Zuch & Patty**..., pro manko de tekniko li ankoraŭ ne kuraĝis provi.... Dum IJF **Kaj Do ?** ludis " Hej vi " de **Massimo Manca** aperinta en *Vinilkosmo-Kompil'* Vol. 2, kaj **Massimo** mem kunkantis ĝin surscenejo kun ili. **Kaj Do ?** interesiĝas pri ĉiaj kantoj ritmaj, etosigaj kaj dancigaj specife por esparanĝoj. La kvalito ne estas profesia nek tre alta, sed la bando daŭrigos post resaniĝo de **Daniela** kaj notindaj progresoj efektiviĝos – tion promesas **Giuseppe**. Tamen intertempe kuraĝigoj, koncertproponoj, kaj eĉ surbendiginvito ĝojigos ilin ĉiujn kaj instigos ilin pli ofte labori kaj komponi proprajn originalajn kantojn.

Kontaktadreso :

Giuseppe CASTELLI
Via grandi 16
IT 29100 PIACENZA
Italio
tel : 39 523 59 29 08
e-mail : 9c412712@ silab.dsi.unimi.it



Tonalte raportas Glebo Malcev :

Piĉismo-reviĝiĝo

Halucino.... Tiel taksas **Piĉismo** la duan parton de 1995. El klasika anaro restis nur mi kun **Malthus**. Tuj aperis nova drumisto **Gena** (**Obitelb**, **Hurry-Scurry**, **Creepy Creak**, **Coca Cola**, k.a.). Ĉi-triunuo iĝis nova skeleto del' bando. Kvazaŭ celante konfirmi faman proverbon el muzikista folkloro : " basistoj 'stas homoj la plej malfidindaj ", basgitaro kiel stafeta bastoneto migris manon al mano. Dum mallonga periodo en la bando basludis eĉ tri personoj : **Ruslan** (**Obitelb**), **Snop** (**Strafaction**), kaj **Loor'r** (**Caterpillar**). Tia nestabileco grave influis la stilon de **Piĉismo**, naskinte revolucian situacion en la mensoj de ties partoprenantoj, poŝtupe evoluigante malsanigan rapidomanion al la supra kosma plataĵo, nomata FRENEZO. Do, atentu la dosieron pri senlima duonjara intensobsedo :

1. Ĉio komenciĝis ekde **piĉisma** translokiĝo al najbara urbeto Hola Pristanj, kie en subgrundo de loka kulturdomo regas hardkora grupo **Obitelb** kaj primitivisma avangarda projekto **Hurry-Scurry**. Dum du varmegaj sendormaj noktoj per ordinara magnetofono *Sony* 'stis surkaseditaj kvar kanabimprovizaj demoj del' nova kaoskora projekto **Piĉismo & Hurry-Scurry** (fakte **Piĉismon** prezentis nur mi). Ĉi-demoj ne destinatas por vasta distribuo pro tute neeltenebla(por t.n. normalaj homoj) sonkvalito kaj ŝpruca etoso, sed por ni tiuj 90 minutoj da bruegado 'stas neelĉerpebla fonto de ideoj. Do, jenas detala priskribo de tiu ĉi rimarkinda mediuma revelacio del' sennomaj subteraj spiritoj :

a) *Tamusig Ŭlcinik* (Pramaŝino kontraŭmuziko). Tri kantoj en klasika volapük de **J. M. Schleyer**. ('Stas kuriozaĵo, ĉar nuntempaj volapukistoj uzas la reformprojeton de 1929 de d-ro **Arie de Jong**. Laŭ dubinda oficiala statistiko la ŝlejeran volapukon komprenas nur mi kaj **Rune Thorsell** el Svedio !). Do, la kantonomoj : 1) " Finapoedots " (**R. Thorsell**) ; 2) " Volapüka'um " (aŭtoro nekonata, eble **Schleyer**) ; 3) " Pened balid Yohanesa " (du ĉapitroj el la " Unua Epistolo Generala de Johano ", traduko de **J.M. Schleyer**).

b) *Instrukcio #!* Du kantoj en espo : 1) " Floj-ja eje hej ", 2) " Mi iĝis dio ". Ambaŭ tekstojn verkis **Glebo**.

Ĉi tiuj du demoj registritas la 14.06.95 far **Klečnjuvargann** (voĉo) ; **Broom-kcata-kcama-kahc** (gitaro, voĉo) ; **Kublaj-Ĥan** (baso) ; **Granbuslevar** (drumoj).

c) *Al Barikadi* (Al Barikadoj). Du kantoj en ido : 1) " Ni havas un e linguo " (**Andreas Juste**), 2) " L'instanto venis " (aŭtoro nekonata, traduko de **N. JuŠmanov**). Kaj unu kanto en Intal : 3) " Le Semero " (**Erich Weferling**). Registritas la 16.06.95 far **Klečnjuvargann** (voĉo, mikrofonvoko) kaj **Granbuslevar** (drumoj).

ĉ) *Volapüka'um* (Himno de volapuko). Du kantoj en klasika volapük : 1) " Födeiloböd Gledeilelis " ! (**Glebo**) ; 2) Volapüka'um. Registritas la 16.06.95 far **Klečnjuvargann** (voĉo) ; **Broom-Kcata-kcama-kahc** (*moog*, voĉo) ; **Zembbvaĥtogur** (gitaro) ; **Kublaj-Ĥan** (baso) ; **Granbuslevar** (drumoj).

2. **Piĉismo** kunorganizis kaj partoprenis du gigojn en Hola Pristanj : koncerton de laŭta muziko en nekompreneblaj lingvoj la 25.08.95, kaj koncerton de brumuziko la 22.09.95. Interalie, dum la koncerto de brumuziko unuafoje ludis ĥersona espopunkbando **Klingo**, prezentante 5 kruststilajn kantojn en espo, kiuj iom similas kreajojn del' japana brukora bando **Senseless Apocalypse**.

3. " Punkoj kontraŭas la fajrarmilojn ! " Altrudinte la ekstremmaldekstran sloganon, **Piĉismo** furore ludis la 3.11.95 en gigo organizita fare del' nazia oj-bando **Dachau** en la kulturpalaco de fervojistoj en Mikolaiv. L'ideologiaj interpuŝoj : dumkante miaj piedoj volupte spertis molon de faŝula muzelaĉo ; la basgitaristo de **Loor'r** ĝuis sonoron de naziaj fruntoj. Vivu kaoso kaj violentaj dancoj la plej taŭgaj armiloj kontraŭ faŝa infekto !

4. La 19-21.12.95, mi kun **Sesia** apaĉis en la 2a Internacia Scienca Konferenco pri Avangardo en Ĥerson. Rezulte niaj intervjuoj kaj perkomputile remiksita video pri **piĉisma** elpaŝo en Eŭpatorio eniris en la prikonferencan filmon, kiu prenis la ĉefan premion en la televizia festivalo en Suzdalj (Rusio), kaj jam dufoje ĉijare ĝin montris loka telestacio *Skijfija*.

5. Iu(j) kanto(j) de **Piĉismo** eniris en la internacian kasedan punkkompilon *Peacedies Deathsucks 3*.

6. Ekde 1995 notoj pri **Piĉismo** kaj Pterodactyl Records eniras en la ĉefan punkan adresaron *Book Your Own Fuckin' Life* (Usono). Krome regule aperadas pri**piĉismaj** informoj kaj anoncoj en internaciaj punkaj zinoj *Maximumrockunroll, No Sanctuary*, k.s.

7. Slavlingva gazetaro ne plu ignoras la frenezan bandon. Tajmira regiona ĵurnalo (Dudinka, Rusio) presis l'alvokon del' **Eklezio Piĉismo** : " Ni serĉas Ŝamanojn ". Ĉjurupinska loka ĵurnalo publikigis l'amuzan misinformajon " Laboro por vi, mecenatoj " ! Ĥersona ĵuranalo publicis artikolon de **K. Kostenko**, " Punkroko kaj ... espo ". La sama ĵurnalo en alia numero presis artikolon pri **Lexa** (kun fotomuzelo) sub la titolo " Roko en ĥersona radio ".

8. Nia kroata spiono denuncis ke Ill in the Head Tapes internaciskale distribuas piratan version de la demoalbumo *Subita Merdo*.

9. Nia ĥersona spiono sukcese propagandas **Piĉismon** inter moskvaj haŭtkapuloj. Ĉu senharuloj opinias nin faŝaj ? Se jes, do ili eraras !

10. En ĉiuj ĥersonaj kasedbutikoj ekde pasinta aŭtuno aĉeteblas *Subita Merdo*. Skribemuloj b.v. noti la novan poŝtadreson del' bando :

Piĉismo
p/a Glebo MALCEV
PK 38
UA 326520 CJURUPINSK
Ukrainio

Notoj : gigo (angla jargono, *gig*) : koncerto ; zino (A. *zine*) : subgrunda periodaĵo. Legu artikolon pri **piĉisma** polemiko en " *Tute ne gravas* ".

La Flugantaj Bananoj

Unuafoje en nia serioza fanzino aperas objektiva kontribuaĵo pri **La Flugantaj Bananoj**. **Jan Schröder**, repulo, kaj **Bendi**, gitaristo en la bando : nervaj vertikalflugantoj de la furioza furora repbando el Berlino, kies identeco duonsekretas, koncertoj sen averto, deveno sekretoplena....

Ni sukcesis havi ekskluzivan intervjuon faritan inter **Schröder** kaj **Bendi** : jen kio estis senvualigita.

Schröder : Demandu al mi seriozaĵon.

Bendi : Ĉu mi povas havi aŭtografon de vi ?

S : Hooo..., bedaŭrinde mi devas ankoraŭ prizorgi kelkajn milojn da petoj. Tio verŝajne daŭros dum kelkaj monatoj. Sed mi pledos por vi ke oni traktu vian peton privilegie.

B : Nun demandu al mi ion.

S : Kiuj estas viaj hobioj ?

B : Ni parolas ĉi tie por muzikzino, tio ne konvenas ĉi tie.

S : Vi povus kvazaŭ vian hobion aserti ja muziko. Pri tio oni povus plu demandi.

B : Mia hobio estas muziko.

S : Aha' ? Kion vi faras do muzike ?

B : En la komenco mi muzikis per kombilo, bekfluto, kaj Triola. Poste mi fariĝis gitaristo.

S : Pli bone vi restintus ĉe kombilo. Nu bone kiel vi faras tiun muzikon ?

B : Ekzemple kiam venas granda konato de la duškantado,
Schröder : " Hej, post du horoj mi prezentiĝos sur scenejo, mankas al mi ĝis nun muziko ", montrante al mi sian tekstofatrason, " jen, sparka teksto ! Tintu melodion ! " Do mi ŝtipas per fingroj sur la gitaro kaj havas melodion.

S : Ĉu tiel simple ?

B : Por inspiroj mi rigardas la demandosignan napovizaĝon de tiu homo – kelkaj taŭzaj akordoj pretas.

S : Mi pensas ke ni ĉesu en la intereso de la intelektula legantaro de ***ROK-gazet'*** kun la reciproka ofendado, vi pugo.

B : Vi pravas, je mia fetoro. Malsekretu al mi la sencon de la kantoj !

S : Nu, ekzemple en la unua kanto oni forpuŝas viron el la homa socio. Li estis gastronomo el Romo. Li estiĝis gnomo nur pro unu pomo, t.s. post kiam li manĝis la pomon. *Homo-pomo, Romo-pomo.* Tragedio !

B : Verdire ! Verseto je dostojevskia dimensieto. Bedaŭrinde tion komprenis nur la plej malmultaj aŭskultantoj. Ni volas mesaĝi metaforan profundecon. Oni ne vane diras hiphopon. Tio estas la verda balancprincipo kiu regas kaj harmoniigas la mondon. Kiel *jin* kaj *jang – hip* kaj *hop*. Ĝi devas flui kaj jen nova ritmo.

S : Tio estas primo. (Alternative : kun animo.)

B : Rakontu al niaj sciavidaj legantoj kiel vi ekhavis la revelacion " Manĝu Bananojn " ?

S : Ĉar ni estas ja la flugbananoj mi pensegis – kreu tekston pri bananoj.

B : Kiel aperis la nomo de la bando ?

S : Ĝi estis inspirita siaflanke el la kanto, kaj jen apertas la demandego : kio ekzistis unue ? Ĉu la kokino, ĉu la ovo ? Ovo aŭ kokino ? *Jin* aŭ *jang* ? *Hip* aŭ *hop* ? Kroma problemo estas ke la temo " bananoj " ja kovrite aperas ankaŭ en aliaj tekstoj. Asociante bananon kvazaŭ iuaĵo, oni estas jam ĉe nia dua furoraĵo, kiun mi verkis kun **Klaus Dahmann**, " Seksperanturismo ". Ĉu vi kredas ke la temo estas ankoraŭ tre aktuala ?

B : Laŭ mi baznivele. Malsekretu kiuj estas la flugbananoj ?

S : La **Bananoj** estas **Claudia** el Berlino, **Anja** el Chemnitz kaj **Nadja** el Tomsk – la knabinaj voĉegoj.

B : Ĉu vi ekzercas tre ofte ?

S : Kun **Nadja**, ekzemple, ni rekontiĝas ĉiun lundon al provludado. Mi telefonas kaj ŝi tuj apudvoje neĝas tra la pordo.

B : La muzikĵurnalo *Rolling Koncize* rakontis vian duran vivon en la subgeto de Berlino. Laŭ la intervjuo, koŝira fruaj interpafadoj kaŭzis viajn du naztruojn ?

S : Jes, ankaŭ en la oreloj.

B : Kaj en la dentoj ? Kial tiuj riskoj ?

S : La **Bananoj** fondiĝis en 1995 en St-a Peterburgo. Tiam mi unuafoje en mia vivo vidis sunon.

B : Ja estas tiu kvartalo kie estas pli da registritaj ĝardengnomoj en la mondo ?

S : Tio des pli montras ke la getuloj konservis profundan humanecon en siaj repkoroj. Malgraŭ ĉio. Kio estas via mesaĝo ?

B : La vorto forta, la impeto klara, la enhavo nebula. Iam mi pensis : la repversoj de **Schröder** devas vidi la sunon. Ili devas marŝi el la ombro de la necesejpordoj en la mondon ! Diru vian mesaĝon !

S : Manĝu bananojn.

B : Mi ne plu havas ŝaton fari intervjuon.

S : Ankaŭ mi ne. Do karega leganto, manĝu bananojn kaj dormu bone. Jen de **La Flugantaj Bananoj** kaj ilia furorkanto :

Bendi Jan Schröder.

Klingon en la vejnojn de espokomunumo.
Klingon en la ventron de debila ŝtataro!

Tio estas devizo de espa punkbando **Klingo** fondita meze de 1995 en Ĥerson (Ukrainio), ne sen helpo de **Glebo** el **Piĉismo**. **Klingo** firme konvinkitas pri pasivpederasta karaktero de espovivo. Necesas tranĉi ĝiajn vejnojn por verŝi maljunan, fiodoran, malsanan sangon de espo por lasi lokon por freŝa. Ĉi tiu ideo baziĝas en la muziko kaj tekstoj de **Klingo**, kiu protestas kontraŭ registaron, kaj ordon, kaj ĉion ĉirkaŭ ni (la nunan socion) : *" Ili ne volas Anarkion, sed ili ricevos Anarkion ! "*

Fine de 1995, la bando surbendigis unuan 6titolan demokasedon *Prezidanto-kanto*, kies teksto sekvas :

Prezidanto Kanto
Mia ĉasta prezidanto
Ĉu vi aŭdas min ?
Prezidanta ekskremento
Ĉu vi volas min ?
Mia ama prezidanto
Murdu mian vorton
Prezidanta Anarkio
Estas via vorto
Prezidanta harmonio
Fikas mian cerbon
Prezidanto estas Dio !
Mi ne kredas en li
Sed ne vivas, sed ne vivas
Mia ĉura lando Anarkio,
Anarkio Prezidanto-kanto !



Klingo konsistas el kvar uloj, ludantaj gajan politikatan punkonhardkoron. La 22an de septembro 1995 la bando ludis unuafoje kvin espokantojn en la koncerto de brumuziko en Hola Pristanj. **Klingo** pretas nun koncerti espe kie ajn oni mendos ĝin kaj serĉas kontaktojn kun aliaj espopunkuloj-hardkoruloj el ĉiuj eblaj mondpartoj por interŝanĝoj. **Klingo** ankaŭ ne rifuzos kontakti kun korespondemuloj. Pliaj informoj pri la bando kaj eventuale mendi kopion de la demo 6titola, skribu al :

Klingo
p/a Alekseo Dokienko
Filatova 26-14
UA 325027 ĤERSON
Ukrainio

Kune fantomas Tony kaj Flo ! :

Fantoma fenomeno



Rolf Fantom estas angla 15jarulo, denaska espisto, kiu produktis demokasedon *Fantoma fenomeno*. Li komencis verki kantojn en la angla, sed rapide preferis uzi espon, ĉefe en la infankongreseto en Tampereo, Finnlando. La interesiĝo kreskis de tie. Li tre malofte koncertis antaŭ plenkreskula publiko, sed li havas spertojn en lernejaj scenejoj kaj infankongresetoj. La muzikstilo de **Rolf** en tiu ĉi unua demokasedo estas " mola roko ". Li komponis kaj ellaboris ĝin sola akompanante sin per sintezilo, elektra gitaro, kaj basgitaro helpe de MIDI-aparataro, la tuto estrita per komputilo. Tiu kasedo aperis en julio 1996 por la UK en Prago, kaj ĝi estas memprodukto. Ĝi enhavas 11 titolojn, inter kiuj troviĝas multaj bonaj ideoj (muziko kaj tekstoj). Tamen ili bezonus esti poluritaj en profesia studio helpe de arta produktisto. Kelkaj titoloj devus iom pli maturiĝi, kaj la voĉo necesus esti pli ellaborita per pli trafaj efektiloj kaj subtenita de korusoj kaj pli riĉa instrumentado. Malgraŭ tiuj mankoj, la kasedo donas bonan bildon pri tiu ĉi naskiĝanta talento en Espujo. Kvankam sola, li sukcesis produkti per malgrandaj rimedoj sufiĉe kvalitan demokasedon, teknike eĉ pli kvalita ol kelkaj " profesie " produktitaj en Espujo.

Estonte li planas starigi propran bandon en Anglio, kiu, li esperas, kantos en espo. Sed li ankoraŭ ne finis studadon en lernejo – muzikaj projektoj pli maturaj venos poste. Ni restu atentaj pri la evoluo de **Rolf**, kiu rezervos por ni bonajn surprizojn. Tutcerte li kapablos estonte produkti gravajn verkojn. Tiu ĉi *Fantoma fenomeno* anoncas promesplenan karieron. Por informoj, kuraĝigoj, kaj mendoj kontaktu lin :

Rolf FANTOM

92 Enborne Road
NEWBURY RG14 6AN, Berkshire
Britio
Tel : +44 1635 38 592

Noto : La demokasedo estas disponebla ankaŭ ĉe UEA.

La Fratoj Naftalino

La Fratoj Naftalino (*Los Hermanos Naftalina*) estas bando de amikoj-muzikistoj 16-20jaraj el Buenos Aires, Argentino, kaj konsistas el vegetaranoj, neperfortuloj, kaj espistoj. La **Fratoj Naftalino** kantas hispane kaj espe. Per siaj muzikaĵoj ili disvastigas siajn ideojn pri espo, paco, kaj amo kiel rimedoj por senti feliĉon, ktp. Ilia muziko estas tre varistila, irante de skao, regeo, kaj repo, ĝis punko, popo, valso, ktp. Ili estas junaj debutantaj muzikistoj kiuj volas antaŭ ĉio amuziĝi. Ili ankoraŭ ne trovis propran rokstilon, sed ili aŭskultas multajn rokbandojn kaj kompreneble influiĝas de ili, kiel ekz-e **The Smiths**, **Morrisey**, **The Jam**, **The Housemartins**, **The Clash**, **Elvis Costello**, **Nick Cave**, **The Mission**, **Tom Waits**, **Lou Reed**, **The Sugarcubes**, **Björk**, **The Cardigans**, Cy **Preshill**, **Nas**, **Fugees**, **Ice Cube**, **The Specials**, **The Selecter**, **Skatalites**, **Scofflaws**, **The Trojans**, **Les Négresses Vertes**, **Black Uhuru**, **The Abiscinians**, **The Cinarons**, ktp.

Ĝis nun la **Fratoj Naftalino** ne havis kontaktojn kun aliaj esporokbandoj, kaj ekde nun ili tre ŝatus rilati kun ili por interŝanĝi spertojn, informojn, konsilojn, ktp. Laŭ ili espo estas tre bona komunikilo por kontakti muzikŝatantojn de diversaj stiloj el la tuta mondo.

La bando kreiĝis en 1995 kun **Ezequiel** (kanto) ; **Conri** (gitaro) ; **Marley** (gitaro) ; **Victor** kaj **Juan** (perkutilaro) ; **Ricky** (klavaroj) ; **Matias** (drumo) ; **Panto** (saksofono) ; **Lima** (trumpeto) ; kaj **Leo** (basgitaro). Ili koncertis plurfoje en subgrundaj rokscenejoj de Buenos Aires, sed ne aperigis diskon aŭ kasedon – **Los Hermanos Naftalina** ankoraŭ ne pretas.

Drumisto **Matias Perla** drumis ankaŭ en alia bando, la **Bonaj Knaboj**, kiuj nun disiĝis. La **Bonaj Knaboj** ne kantis espe, sed havis en sia repertuaro diversajn kantojn kies temo estis Zamenhof kaj la internacia lingvo.

Valsokanto de **Fratoj Naftalino** :

"Nia saluto"

Verda standardo. Krioj al paco.
Harmonio estas sonĝo kiu persistas.
Saluton al la kreinto (la kreinto de espo)
... Esperanto estas sonĝo kiu persistas.

Por pliaj klarigoj kaj interŝanĝoj kun aliaj esporokbandoj, kontaktu :

Matias PERLA, La Fratoj Naftalino
C.C. 95, Suc. 48
AR 1448 BUENOS AIRES
Argentino

Verdstele kompilis Solange Araujo kaj Floréal :

Verdstelaj Brazilajoj

Tarcísio Lima estas konfirmita muzikisto de Ceará (ŝtato de nordorienta Brazilo). Li estas aŭtoro, komponisto, gitaristo, kaj kantisto. Lia muzika vojo konsistas el 28 jaroj da intensa laboro kaj bonkvalita muzika produktado. Krome li estas profesoro pri muzikologio kaj profesia muzikinstruisto pri gitaro kaj harmonio. **Tarcísio** ludis en plej diversaj muzikensembloj kiel aranĝisto, instrumentisto, ĥoristo, kaj kantisto, kontribuante tiel en 16 albumoj de pluraj el tiuj brazilaj ensembloj de 1985 ĝis 1996. Li gajnis plurajn konkursojn, interalie li estis premiita en la Brazila Festivalo de Ekologia Kanzono en Esperanto kaj trifoje pri belarta kategorio de UEA dum UKoj en Tampereo kaj Prago (1995 kaj 96).

Li bonege penetris la filozofion de espo, kaj ankaŭ la lingvon mem. Espo, laŭ li, tradukas la universalan imagaĵon en etoso de kompleta interkompreniĝo kaj paco, donante egale al ĉiu popolo eblecon esprimi aŭtente sian propran kulturon, sian arton, siajn valorojn, siajn timojn, siajn kutimojn kaj esperojn.

Verdstelaj Brazilajoj estas lia unua aperonta solomuzikverko sur KD kaj kasedo. La projekto kunigos originalajn komponaĵojn kaj tradukojn de brazilaj kantoj en espon fare de li mem. Krom komponado kaj tradukado, **Tarcísio** gitarludos, kantos, kaj faros la muzikajn aranĝojn. Per tiu unua albumo, **Tarcísio** celas diskonigi en la tutan mondon konfirmitaj aŭtoroj de brazila proprajn komponaĵojn kaj tiujn de kaj stiloj. Liaj tradukoj klopodas popolmuziko de malsamaj epokoj la tekstoj, pri kiuj tute ne priatentis antaŭŝirmi la originajn sentojn de interalie. tiuj kiuj faris anglajn versiojn,

Verdstelaj Brazilajoj celas ankaŭ stimuli la interesiĝon por espo en Brazilo, kaj povos utili kiel aktuala materialo por kursoj kaj bazo por kreado de novaj didaktikaj strategioj. La projekto jam survojas, muzikajoj kaj tekstoj pretas, kalendaro pri la produktado establiĝis. Estas planate enstudiiĝi por surbendigi en marto kaj aprilo 97, kaj lanĉi albumon en junio (ĝi pretos por la someraj renkontiĝoj kaj kongresoj, interalie UK en Adelajdo, Aŭstralio.

Verdstelaj Brazilajoj repertuaros 18 titolojn, inter kiuj 9 tradukoj, ekz-e "La espero" de L. L. Zamenhof, kiujn brazilaĵigis **Tarcísio** ; la ceteraj venas de brazilaj aŭtoroj. Pri ĉiuj tradukoj respondecas **Tarcísio** mem, escepte de "Kolombetoj", kiun tradukis **Jorge de Oliveira**. Tre baldaŭ do, vi povos malkovri tiun ĉi valoregan novan muzikverkon, kiu certe estos nepre havinda en via espodiskaro.

Verdstelaj Brazilajoj disponeblos en kutimaj libroservoj, kaj kompreneble vi povos ĝin mendi laŭ referencoj VKKD18 kaj VKKS26 ĉe Vinilkosmo. La prezo estas ankoraŭ ne anoncita, sed aperos aldona informfolio kun la *Vinilkosmo-Katalogo* – ne hezitu peti ĝin ! Pliajn informpetojn direktu al :

Tarcísio José de LIMA
C.P. 12.128
BR 60021-970 FORTALEZA CE
Brazilo
Tel/faks : +55 85 284 11 07
Retpoŝto : >> tjlima@ ufc.br >>

Svinge prezentas Flo !

GMT svingotriopo

Kaj Stridell estas amiko de **Wim Posthuma**, kaj kiel li, envolvita en espomovado kaj radioelsendoj en Svedio.

Kaj estas eĉ radioamatoro (**SM5DAD**) kaj nuna sekretario de ILERA (Internacia Ligo de Espistaj RadioAmatoroj).

Krome, **Kaj Stridell** estas jazzmuzikisto – multinstrumentisto, sed lia ĉefa instrumento estas saksofono. Li ludas en la famega sveda jazbando **Trattbandet**, pri kiu vi povas legi en tiu ĉi numero mem en rubriko *"Jazajoj"*.

Kaj espistiĝis en 1950 kaj havis veran espofamilian vivon. En 1987 li renkontis **Giorgion Marchente**, italan gitariston kiu translokiĝis al Västerås, Svedio. Ili komencis ludi kune, nur por plezuro, sen pensoj pri publika aperado. Dum la jaroj, kompreneble, ili surscenejiĝis kaj ludis ĝis kvin aliaj muzikistoj, sed nun restas nur la kontrabasisto **Albert Eklund**.

La bando alprenis nomon **GMT** (**Giorgio Marchente Team**), la muzika repertuaro konsistas el plačaj svingomelodioj kun ĉarmaj akordsekvencoj. Tiel ili ludas konataĵn kaj ŝatataĵn pecojn el la granda usona kantaro, latinamerikajn melodiojn, tangojn, bosanovojn, ktp.

Kompreneble, **Kaj** enkondukis en tiun triopon espokantojn, kiujn li mem tradukis aŭ adaptis. **GMT**-triopo kutimas ludi en trankvilaj kafejoj, malgrandaj kluboj, bibliotekoj, kaj similaj ejoj. Maloftaj esceptoj estas festivaloj.

GMT disponas pri diversaj surbendigaĵoj kaj, interalie, svinga kvartitola demokasedo en espo laŭ nomo *Kaj Stridell kun GMT*.

La triopo pretas ludi en plej diversaj esparanĝoj kie ajn en la mondo, almenaŭ en Eŭropo. Por tiaj esparanĝoj la triopo petas nur la repagon de vojaĝ- kaj restadkostoj.

Ne hezitu kontakti ilin por pliaj informoj, materialo, invitoj, ktp. :

GMT
p/a Kaj Stridell
Rotevägen 1
SE 73533 SURHAMMAR
Svedio
Tel./faks +46 220 33 489

Ĵaŭzaĵoj

Funele kompilis Bertrando Albault

(laŭ informoj de Kaj Stridell):

Trattbandet – la "Funelbando"

Kun hejmloko en Västerås, la miljara industricentro cent kilometrojn okcidente de la sveda ĉefurbo Stokholmo, la bando fondiĝis en 1974 fare de la kornetisto **Olle Åhs** kiel pura " *New-Orleans*-bando". **Olles Traditional Jazz Band** baldaŭ fariĝis **Olles Trad-Band**, kaj iom poste **Olles Trattband**, aludante al la klosformaj "funeloj" de la blovinstrumentoj (korneto, klarneto, trombono, saksofono, kaj tiam ankaŭ bastubo), kaj ne malpli grave la megafono per kiu ili kantis la tekstojn.

En 1983, **Olle** forlasis la bandon por havi tempon por siaj studoj, kaj sekve la nomo **Olles** malaperis kaj restis nur **Trattbandet**. Iom post iom ili enmiksis ankaŭ pli novajn stilojn, kaj hodiaŭ la membroj modeste karakterizas sian bandon kiel " *Dixieland*-bando", sed kiu samtempe delikate konservas la tradiciojn kaj stilojn de Nov-Orleano de la komenco de la jarcento. Kaj ili ne forgesas la pli novajn ventojn de *Swing & Sweet* kaj *Rhythm & Blues* de la kvindekaj jaroj..., kaj jes, eĉ la karaibaj muzikstiloj estas reprezentitaj. Hodiaŭ **Trattbandet** estas forte svinganta grupo, kiu malpli zorgas pri precize kiun stilon oni momente uzas, kondiĉe ke oni sentas ke svingas kaj ke oni ludas "tion kion oni nomas *ĵazo*"!

Trattbandet partoprenis dum ĉiuj tiuj jaroj tre multajn internaciajn ĵazfestivalojn, ekz-e kvinfoje De Oude Stijl Jazz Festival en Breda, Nederlando, la plej granda festivalo por tradicia ĵazo en Eŭropo. En la sama lando ili partoprenis ankaŭ Jazzdagen en Eindhoven, kaj en 1992 alia turneo okazis. Ankaŭ en Germanio ili havas ŝatantan publikon, kaj dum sinsekvaj jaroj ili ĝis nun faris turneojn kaj havas konstantan inviton por reviziti. Ili partoprenis ankaŭ la Pori Jaz-Festivalon en Finnlando, kaj dum la du lastaj jaroj tiu lando estiĝis la plejofte rebonvenanta loko por la bando!

En Svedio, **Trattbandet** estis la unua grupo elektita por la unua Tradjazz Festivalo en 1983 en Askersund, kiun ili multefoje partoprenis ankaŭ poste. Ili ludis por ankaŭ Stockholm Jazz and Blues Festival, Örebro Musikfestival, Vallby Nutida Musik Festival, kaj Hässlö Happy Jazz en Västerås, Kungshamns-Smögens Tradjazzfestival kaj Göteborgs Trad Jazz Festival, la plej granda de Nordia. En Józzclassen en Arvika oni nomis **Trattbandet**on "Preferato de la Publiko" en konkurso kun konsiderinde pli famkonatoj kolegoj! Laste sed eble ne malplej valora , **Trattbandet** estis plimalpli neanstataŭebla dum la pli ol dek sep jaroj dum kiuj la grandegaj Västerås-Muziktagoj ĝis nun okazis! Kiam temas pri gaja kaj vigliga ĵazo ĉe diversaj eventoj, estas ofte **Trattbandet** pri kiun oni unue ekpensas. Bazaroj, inaŭguroj de aĉetcentroj kaj konferencoj, kampanjoj, geedziĝoj, firmajubileoj – ĉe ĉiaj penseblaj eventoj **Trattbandet** kontribuas, vestita en turkiskoloraj trikitaj jakoj kaj nigraj pantalonoj (jes, eĉ banvestoj...!), aŭ plenstile en smokingoj, ĉiam kun bona humoro kaj muziko kiu ŝatiĝas de ĉiuj kategorioj.

Citaĵo de fama veterana usona ĵazmuzikisto **Wild Bill Davison**, dum prezento kune kun **Trattbandet**: *"Ĉi tiu bando elvokas la amasojn al enormaj erupcioj da entuziasmo!"* Aliaj internacie famaj artistoj kiuj laboris kun **Trattbandet** estas **Red Mitchell**, **Marty Grosz**, **Buck Clayton**, **Kenneth Arnström**, **Bent Persson**, **Thorstein Bergman**. Sed ĝenerale ili preferas ludi kun la origina personaro, sen gastoj.

Trattbandet kontribuis en pluraj propraj landvastaj radioprogramoj, ĉu rektaj ĉu surbendaj, kaj la kasedoj kaj ko-diskoj kun la tuta **Trattbandet** aŭ kun klarnetisto **Rolf Carvenius** sole kun la ritmogrupo ricevas rapidan forvendon.

Trattbandet trapasis depost 1974 kelkajn personŝanĝojn, sed la nuna personaro estas la sama kiel en 1986. Vivi per ĵazludado estas favoro por nur tre malmultaj muzikantoj, kaj de la sep ordinaraj membroj de la bando, ses havas aliajn okupojn. Nur la klarnetisto havas muzikon kiel metion. Memkompreneble, liaj propraj dungiĝoj, same kiel la "civiloj" metiaj taskoj de la aliaj membroj, devas esti prioritataj, kaj tial okazas unuopaj eventoj. **Trattbandet** ludas per nur ses personoj, kaj havas ankaŭ alternativajn basistojn. La membroj:

Kaj Stridell, la ünunura espisto de la bando, konsistigas la "saksofonsekcion" per ĉefinstrumento C(Do) *Melody Sax*, kaj sopran- kaj baritonsaksoj kiel krominstrumentoj – kaj klarneto, kiam **Rolf** ne ĉeestas. Kantas refrenojn, ankaŭ kelkajn en espo! Krome li funkcias kiel bandestro. Li estis estro de seppersona danclbando en la kvindekaj jaroj, kaj en la sepdekaj li startigis **Hammerbandet Big Band**. Unu jaron li vivis kiel rondvojaĝanta metibasisto en Mez-Eŭropo kaj Nord-Afriko. Li apartenas de plej longe al **Trattbandet** seninterrompe de 1976.

Rolf Carvenius, land- kaj marvaste konata kiel "la Ununura *Stand Up Clarinetist* en la Mondo" tio signifas ke li aperas kun unuhoma prezento kiel klarnetsolisto kaj "babilisto" en ĉiuj eblaj kunligoj. Li komencis kiel membro de lernejaj *Dixie*-bandoj en Stokholmo en la kvindekaj jaroj, kaj post tio li rondvojaĝis kun sennombraj mondsteloj de populara muziko. Li estas unu el la tri kiuj fondis **Trattbandet** en 1974, sed pro tempomanko li dum kelkaj jaroj forlasis ĝin, kaj revenis nur en 1986. En **Trattbandet** li prizorgas la klarnetvoĉon, kaj krome estas la kiu plejofte interbabilas kun la publiko tamen, ne en espo!

Bo Bergendorf ludas la unuan korneton kaj kantas multajn (anglalingvajn) refrenojn. Li estas la "sudŝtatulo" de la bando, kaj komencis ludi ĵazon en la hejmurbo Helsingborg en suda Svedio. Krome li tie estis ĉampiono de tvist-danco! Estas facile aŭdi ke du el liaj idoloj nomiĝas **Louis Armstrong** kaj **Muggsy Spanier**, kies sinceran kaj ĝom incitegan ludstilon li transprenis. Li apartenas al **Trattbandet** depost 1985.

Per Dywling estas laŭ stilo kontrasto de **Bo**, kaj tiuj du tial bone kompletigas unu la alian. La facile fluanta lirika ludo de **Per** sur kaj korneto kaj trombono kaj nun kelkfoje ankaŭ sur baritonkorno prezentas efektoplenan kontraston. Krome li bone kantas kaj ludas gitaron kantri-stile. Post germana turneo en 1986, kiam li anstataŭis **Bo**, kiu devis dum tempo labori en Kanado, li nun estas la unuavica ladinstrumenta solisto de la bando.

Tio estas la "blovantoj" – nun al la ritmosekcio! **Bengt-Arne Hettman**, ordinare nomita **Pelle**, estas "la plej multa" ĵazpianisto de Västerås, kaj havis proprajn bandojn dum pli ol 35 jaroj. Longe antaŭ ol **Bo** aŭdis ion pri tvisto, ankaŭ li komencis sian karieron en Helsingborg per ludado de bebop-piano! Sed nuntempe unu el liaj idoloj estas **Jelly-Roll Morton**! Li estas membro depost 1978.

Pär Hettman, la filo de **Pelle**, fakte estis adoleska kiam li membriĝis en 1981. Li apartenas al la juna bonedukita generacio kiu same bone ludas bonan tradician ĵazon kaj svingon, kiel latinan muzikon, rokon, aŭ popon. Li estas ankaŭ fiera posedanto de malnovtempa lavtabulo, per kiu li kelkfoje akompanas la bandon kaj sian propran kantadon ĉe solenaj okazoj.

Peter Teglund ludas bason de la komenco de 1995, anstataŭanta ilian ordinaran basiston, kiu pro sia laboro devas labori en Usono dum kelkaj jaroj. Li kaj **Pär** prezentas unu el la plej solidaj ritmosekcioj en ilia lando, ĉiam korekta je la tempo kaj kun logika kontrapunkt-konstruado. Ili plenumas la necesan "rokon" sur kiun la solistoj konstruas siajn solojn.

Dum pli ol dudekjara periodo **Trattbandet** funkcias kiel fonto de ĝojo por ĉiuj interesitoj pri tradicia ĵazo, kiuj estas ilia publiko, sed antaŭ ĉio por si mem! Ili ĝojas renkontiĝi kaj ludi, kaj okazas de tempo al tempo ke antaŭaj membroj venas por kunludi kiel ekstra alloĝaĵo aŭ kiel anstataŭanto por ordinara membro. Ili esperas havi eblecon disvastigi sian ĝojigan mesaĝon al ĉiam pli kaj pli da agrablaj homoj en aŭ ekster sia oblonga lando.

Vi eble iam ĉeestis unu el iliaj koncertoj. Tiam vi jam scias kiel ili sonas kaj vi povas senpere dungi ilin por iu agrabla familia aŭ firmaa festo aŭ muzikfestivalo, solena inaŭguro de negoca aŭ konferenca centro, aŭ kio ajn nun povus esti. Se vi ne havis eblecon aŭskulti ilin, telefonu aŭ skribu al la suba adreso, kaj ili volonte sendos demokasedon kaj aliajn necesajn informojn. Ili bonvenigas ĉiun tian iniciativon por dungo!

Ĵazplenajn salutojn al vi ĉiuj! Kontakto:

Kaj STRIDELL, bandestro
Rotevägen 1
SE-735 33 SURHAMMAR
Svedio
Tel/faks +46 (0)220 334 89

AFRIKA ANGULO

Bedaŭrinde milito eksplodis en afrikaj regionoj, inter ili Zairo, kie troviĝas grava espomovado kun espomuzikistoj kaj bandoj. Ni esperas ke tiu situacio ne formalaperigos espon, kiu faris grandan paŝon en tiu lando. Ni atendas senpacience novaĵojn de niaj amikoj-muzikistoj.

VIGLA MUZIKO

Pere de **Ĵak Yvart**, ni havis kontakton kun afrika muzikgrupo ne konata de ni. Temas pri **Vigla Muziko**, kies gvidanto kaj kantisto estas **Preso-Neno**.

Vigla Muziko evoluas en la provinco Bas-Zaïre en la urbo Mbanza-Nunguo. Nun **Preso-Neno** serĉas bonan produktiston por surbendigi kaj produkti albumon de **Vigla Muziko**. Proponojn sendu al :

Vigla Muziko
p/a s-ro Preso-Neno
109 Av. Kasa-Uubu
(Croisement Saïd/Kasa uubu)
Zone de Ngiringiri
KINSHASA Zairo

ESPOGRUPO MELODIAS

Melodias estas nomo de memstara muzika espogrupo kiu konsistas el ses gekantistoj gvidataj de la respondeculo **Roger RASOLOFO**. Iliaj kantoj fluas laŭ adaptiĝo de negrospiritualoj kaj malagasaj ritmoj.

La espogrupo surbendigis demokasedon kaj serĉas produktiston kiu interesiĝus ilin helpi pri la eldono de kvalita disko kaj/aŭ kasedo.

Roger Rasolofo klarigas : "*Nia celo estas unuunura : unuworte, disvastigi espon en Madagaskaro. Generale en Madagaskaro, espo ne antaŭeniras sola, sed per nia fervora agado, ĝi vekiĝis.... Nia grupo decidis varbi espon per kantoj, tamen ni ne estas profesiuloj.... Ni celas harmonian vivon en paco kaj amo, kaj por tion atingi ni elektis espon.*"

Por pliaj informoj, eventualaj subtenoj, ktp., kontaktu :
Esperanto-grupo **Melodias**
Roger Rasolofo
Lot I.V.J 10
Ambohimiadana / Avaratra
Ambohimanarina
MG 101 ANTANANARIVO
Malagasio

VERDLUMA STELO

Kiam li eklernis espon, **Minani MATABARO**, Tanzanio, havis projekton de poemaro, kie li parolas pri Afriko, afrikaj vilaĝoj, amo, amo al la tero, al respekto de la arbaro, ktp.

Tion li publikigis en *Afrika Reto* en 1993, kaj ricevis la unuan premion ! Dum la kvara Afrika Kongreso, kiu okazis en decembro 1995 en Tanzanio, kiel vicsekretario de Tanzania Esperanto-Asocio (POB 14187, Dar-es-Salaam) li respondecis pri la kultura programo. Nun li proponas al ni provkasedon *VerdLuma Stelo*, kie sur fono de eŭropeca aŭ afrika muziko, li melopeas, parolas, aŭ kantas pri la temoj pri kiuj li interesiĝas.

-Renée TRIOLLE

WINDOWPLANEMAN

Windowplaneman eldonis albumkasedon kun ok titoloj. En la titolo " Ô Village " (Ho vilaĝo) , unua de Flanko B, espo estas menciita kaj espofrazo eldirita. Bedaŭrinde tio estas la sola espaĵo en la tuta kasedo, kiu tamen estas interesa kaj sufiĉe kvalita. Ĝi estas teknike kaj arte la plej bona el Afriko kiun ĝis nun ni ricevis produktita de espistoj. Kelkaj titoloj povintus esti pli bone surbendigitaj kaj miksitaj, sed la ĝenerala impreso estas agrabla ; la rezulto estas sufiĉe kontentiga por tiu kiu ne estas harfendulo.

Jen afrika moderna muziko per elektraj instrumentoj (sinteziloj, samplilo, gitaroj, drumoj, ktp.) fare de spertaj muzikistoj . La ritmoj de la muziko, kvankam aktualaj, venas el prapatraj afrikaj radikoj, kolorigante la etosan fonon de la albumo ĉefe en titloloj kiaj " Bikusseu Banen ", " Oya ", " Laissez passer " (Lasu pasi), interesa afrika kunfandiĝo inter folklora afrikomuziko kaj rokregeo. La ĉefkantadon plenumas sukcese **Prof. Oumarou Mba** per tipa voĉo. Gastas en tiu kasedo la kantistino **Lionne Bikusseu Banen**, kiu foje ĉefkantas kaj foje koruskantas. La tekstoj estas plejparte mesaĝoj kiuj atentigas pri ĉiutagaj problemoj en la vivo enlande, laboro, aidoso, kredoj, edukado, ktp., kantitaj mikse en kameruna lingvo kaj franca. Same okazas en la parto kie troviĝas espofrazo : "*Esperanto-muziko* ***Windowplanuloj****, klubo en Kamerunio fondita de profesoro* ***Oumarou Mbatakoutcha***" (dufoje), antaŭe estas franca frazo, poste kameruna, kaj sekve denove en la franca.

Interesa kasedo por afrikece etosigi vian hejmon. **Oumarou** anoncas ke li pretigas espodemokasedon. Tutcerte vi ne finis aŭdi pri **Windowplanuloj**. Informoj kaj mendoj por tiu kasedo sendu al :

Prof. Oumarou MBATAKOUTCHA
B.P. 7684 DOUALA
Kameruno
Tel : +237 43 23 06

RIMVORTARON KAJ PIVON

Mayoma DIANKEMBO estas aŭtoro kaj komponisto de espokantoj. Li bezonas por tio rimvortaron kaj *PV*on aŭ *PIV*on, kaj petas espistojn sendi al li donace eĉ uzitan. Krome li daŭre serĉas produktiston. Kontakto :

s-ro Mayoma DIANKEMBO
B.P. 152
KINSHASA 7
Zairo

KARAJ TERANOJ

Post longdaŭraj klopodoj kaj laboro, Zaira Espo-Rondo surbendigis kasedalbumon titolitan *Karaj Teranoj* enhavantan kvin titolojn en espo kaj unu en la angla pri libereco kaj paco.

ZER enkondukas tiun kasedon per tiu ĉi alvoko : *"Karaj teranoj, la superregadoj okazigas malamikecon sur Tero, kaj malamikecoj separas* [disigas] *popolojn. Tial ekzistas nun landlimoj ĉie. Precipe, tio estas agmaniero de niaj gepatroj. Nun ni petas al ĉiuj junuloj fari ĉion por kuniĝi kaj konstrui kune."*

La muzikbando de ZER konsistas el : **Michel Dialundama** (kanzonaro, aŭtoro, kaj gitaristo) ; **Bruno** kaj **Tshycocet** (sinteziloj, drummaŝino) ; **Bruno** (aranĝisto) ; **Ferdinand Kinkani** (produktado, arta konsilanto) ; **Nsakala** (arta konsilanto). Sonstudio : Maison Selike.

Laŭ nia scio, tiu kasedo estas la unua afrika espoprodukto eldonita en Zairo mem. Gratulinda estas tiu ĉi premiero, kvankam pro la manko de rimedoj la teknika kaj arta flanko ne atingas sufiĉan kvaliton por kontentigi larĝan publikon. Tamen kolektantoj de espomuziko, de rarajoj, kaj unuafojaĵoj nepre devas akiri ĝin por kompletigi siajn kolektojn, mendante ĝin ĉe ZER.

Krome Zaira Esperanto-Rondo proponas sin al diversaj eldonistaj espasocioj, libroservoj, ktp. por disvendadi en Zairo espaĵojn kiel toĉemizojn, sun- kaj pluvombrelojn, skribilojn, insignojn, kalendarojn, poŝtkartojn, muzikkasedojn, ktp. – ĉio kiu povus iel reklami por espo.

Ili serĉas ankaŭ bonvolemulojn kiuj pretus disponigi por ili presmaŝinon, kiu ebligus al ili mempresi proprajn espovarbilojn, broŝurojn, ktp. Interesitoj kaj helpemuloj povas rekte turniĝi al :

Zaira Esperanto-Rondo
Av. Bongolo N° 10, Yolo-Nord 3
BP. 6055
KINSHASA VI
Zairo

Cetere, viaj mendoj pri tiu kasedo produktita de ili (kvankam kvalito samizdatas) subtenos kaj helpos ilin en la daŭrigo kaj plibonigo de ilia espomuzikagado en Zairo.

INTERESIĜAS PRI ESPOMUZIKO

Olivier MAZODZE de Zimbabva Esperanto-Instituto interesiĝas pri espomuziko. Pro tio li ŝatus havi kasedojn kaj KDojn, sed pro financaj mankoj ne eblas al li akiri ilin.

Bonvolemuloj povas kontakti lin ĉe :

Zimbabva Esperanto-Instituto
PK. 1283
MASVINGO
Zimbabvo

EsperantÒC ★ butletin informilo
Amistat ambe les esperantistas.
Amikeco kun la okcitanoj.
EsperantÒC, Münsterer Straße 5, D-60326 Frankfurt
Daniel PFEIFFER
Münsterer Straße 5
D-60326 Frankfurt
00 49 69/73 66 50
31a de januaro '97

ĉe la domparo
monata cirkulero de kultura centro esperantista
Postiers 27 – CP 779 – CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando) – telefono/fakso (41)32-9267407

ESPERANTO
Eventoj
Internacia sendependa gazeto pri la Esperanto-movado
Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
+36-1-2828885

MUZIKMOVADO

Vojaĝigas nin Fred Kez@ko

Dum deko da jaroj **teknohaŭs**muziko (*Techno-House*) disvastiĝis tra la mondo dank' al la popularigado de la elektroakustikaj teknikoj. Sed ĝi estas tre kritikata. Oni akuzas tiun novan esprimformon esti brutiga, instiga al trouzo de drogoj, kaj eĉ generi totalisman spiriton.... Dum male, milionoj da junaj adeptoj prefere asertas sian apartenon al kultura, festa, kaj kunviviga movado. Tiaj akuzoj venas ĉefe pro konfuzo kiun nefakuloj faras inter la **teknomovado** kaj la **dancmovado**, ekz-e **revdanco** (*Dream:* komerca subprodukto de **dancmuziko**). Ili estas tre malsamaj laŭ muzika vidpunkto kaj havas tute malsaman spiriton.



Por kompreni kio estas vere **teknomuziko**, ni devas retroi en la 60ajn jarojn en Eŭropo. La influo kunligita de **rokmuziko**, **psikedelismo**, kaj moŝtuloj kiaj **Pierre Henry** kaj **Stockhausen**, naskis la germanajn muzikgrupojn kiajn **Kraftwerk** (*Radioactivity*, 1975), **Tangerine Dream**, **Can**, **Faust**.... Tiuj bandoj popularigis la uzadon de **elektroniko** en muziko.

Nun ni restu en Eŭropo kaj ni iru ĉe la angloj, kiuj estis la homologoj de la germanoj kun **Soft Machine**, **The Grateful Dead**, **Jefferson Airplane**, **Pink Floyd**, **Frank Zappa**.... Ĉiuj tiuj eŭropaj bandoj eksplodigis **popmuzikon** ekster ĝian korseton.

La jaro 1980 malfermis la eraon de **Nova Ondo** (*New Wave*), kaj ekaperis la unuaj bandoj de **teknopopo** kun **Dépêche Mode**, **OMD**, **Human League**, **DAF**, **Front 242**..., kiuj antaŭanoncis la erupcion de la eŭropa **teknomuziko**.

Ni nun iru en alian kontinenton, trairante la grandan oceanon por atingi Usonon. Notindas ke Usono estas la elirbazo de ĉiuj ŝataĵoj **teknomuzikoj**. En 1976 la laŭmoda danca muziko estis **soŭlmuziko** (*Soul Music*) naskita en Detroit. Samtempe en Philadelphia estis inventita la "**Filia" Muziko** (*Philly Sound*), premiso de la **diskomuziko** (*Disco Music*). Efektive en 1977 la **diskomuziko** eksplodis – ĉiuj konis kaj ne povis eviti ĝiajn plej famajn furorajojn. En 1979 **diskomuziko** laciĝis, kaj ekeksmodiĝis lasante sian lokon al **funko**, kiu devenas el **rokenbluso**, laŭ pli vigle ritma formo. Ĉiuj ĉi muzikoj dum pluraj jaroj prilaboriĝis, evoluis, kaj intermiksiĝis. En 1986 influataj de la eŭropa **elektromuziko**, la **gruvaj** (*Groove*) usonnigrulaj **diskĵokeoj** (*Disk Jockey, DJ*) kreis **haŭsmuzikon** (*House Music*, ankaŭ nomita sed malpli kutime **dommuziko**). **Haŭsmuziko** naskiĝis en Chicago en diskoteko *The House* (" la Domo ") kun *"Move Your Body "* de **Marshall Jefferson**, kaj *"Jack Your Body "* de **Steve Silk Hurley**. En 1987 **haŭsmuziko** alvenis en Brition, de kie aperis el la diskeldonejo FFRR Records la famega *French Kiss* de **Lil Louis**. Jam en tiu epoko, **haŭso** estis ege diversa : **etosa** (*Ambient*), **acida**, **teknoa**....

En 1988 ĉiuj forĵetis **haŭsmuzikon**. En Detroit geniaj produktistoj kiaj **Derrick May**, **Kevin Saunderson**, kaj **Juan Atkins** (ĉiuj tri nigruloj) prilaboris tiun **haŭson**, kaj iliaj muzikaj esploroj malkovris hibridan muzikon pli malmolan kaj viglan. Jen kiel naskiĝis **teknomuziko**. Paralele la **acida haŭso** naskiĝis de la fingroj de **DJ Pierre** (*"Chicaga "*) per la fama instrumento **TB 303** (ritmomaŝino por basoj) kreita de la japana muzikelektronika entrepreno Roland. En Britio naskiĝis la renomaj **ravoj** (*Rave*) : grandaj festoj organizitaj de **dancemuloj** kaj fanoj de tiu muziko. Tiel en tiu jaro la britoj freneziĝis pri la bando **KLF**. En Ibizo, Balearoj, jam komenciĝis la festo. Ibizo fariĝis la unuaranga **haŭsa** loko de Eŭropo. En Belgio estis inventita **nova takto** (aŭ **nova bato** *New Beat*), kun ritma takto.

En 1989 en Usono aperis plia stilo de teknoo, la **garaĝa** (*Garage*) el Nov-Jorko. **Garaĝo** viglis pro la voĉoj en grupoj kiaj **Adeva**, **Ultra Naté**, **Cé Cé Rogers**.... En 1992 Germanio invadis la planedon per sia **trancteknoo** (*Trance*) el bombastaj kaj sukeraj tavolaj sintezilsonoj. Ĝiaj dioj estis **Sven Väth**, **Cosmic Baby**.... En Nederlando kaj Britio oni fabrikis la **progresivhaŭson**, frukton de la usona **haŭso** transirinta en digitajn sonstudiojn.

En 1993 estis la eksplodo de la **teknomovado**. En Nov-Jorko la **teknoo** submetiĝis al la eŭropaj influoj kaj reage ĝi radikaliĝis donante vivon al **teknohardkoro** kun la diskeldonejo Industrial Strength kaj **DJ Lenny Dee**. En Nederlando en la sama periodo naskiĝis versio ultre vitaminita de **teknoo** : tio estas la **gaberhaŭso** (*Gabber House*) kun la diskeldonejo Rotterdam.... En Germanio **megaravoj** kiel *May Day* kunigis pli ol 100.000 ravantojn. Poste sekvis samdirekte Svisio kaj finfine Francio kiel ĉiam, lasta ! Tiu **ravfenomeno** celis kunigi gejunulojn ŝatantajn tiun muzikon por aŭskulti kaj danci en pozitiva spirito pacama (*"Peace & Love "*). En Usono la nordamerikanoj revenis kun **hardhaŭso** : **haŭso** pli muskolita sub ankoraŭfoje eŭropa influo. La **tranco** pli rapidiĝis kaj naskis **trancokoron** tre aprezatan en Belgio. Sed jen ankoraŭ alia nova stilo, la **tranco de Goa**, kun tavoloj tre ŝvebaj kaj posthipiaj. La **etosmuziko** (*Ambient Music*) famiĝis dank' al artistoj kiaj **Aphex Turin**, **The ORB**, **Future Sound of London**....

Antaŭ kelkaj monatoj oni multe aŭdis pri **ĝangalmuziko**. La **ĝangalmuziko** naskiĝis de la renkontiĝo inter la **sentemo** (*Feeling*) de **ragamufino** aŭ **jamaika regeo**, kun la eŭropa **elektronika spirito**. **Ĝangalo** venis ĉefe el Londono, kun mentoroj kiaj diskĵokeoj, kiuj estas ankaŭ produktistoj : **Goldie**, **LTJ Bukem**, **Alex Reece**.... **Ĝangalo** povas esti kantita **repe** (klaĉparole) (**ragamufinrepo**) aŭ **etose**. Ĝi estas la plej nova muziko de la **teknomovado**, kaj estas la plej promesplena. **Teknohaŭso** senĉese evoluas, plurfoje ĉirkaŭiris la mondon kaj riĉiĝas pro tiuj vojaĝoj. Okazas kelkfoje gigantaj **ravoj** internaciaj kiel ekzemple en Germanio (400.000 gejunuloj) en *Street Parade* de Berlino. Tiaj grandegaj **ravoj** kunigas la **ravantojn** sed ankaŭ **diskĵokeojn**, **grafistojn**, **vidjokeojn** (*Visuals Jockeys*), jonglistojn, fajrokraĉistojn, gogodancistinojn (*Gogo Dancers*), komputilgrafistojn, interretulojn, ĵurnalistojn, ktp. En tiuj **ravoj** intermiksiĝas gejunuloj de multaj nacioj kaj rasoj kun etoso festeca neperforta, pacema, kaj kontraŭrasisma. La grafismo de **teknoo** estas mirige genia, tre kolora, sciencfikcia, kaj plejofte komputila – unuvorte tre kreema kaj vivanta.

Gravas atenti kaj ne konfuzi inter **teknohaŭso** kaj **dancmuziko**. Ĉilasta ne estas **elektronika** muziko, sed ĝi estas vera komerca fekaĵo por gnomoj televidemaj kaj diŝkotekemaj muzikaĉo por burĝuloj plenplenaj je mono, uzantaj **ekstazion** (nuntempa furornarkoto). **Teknoemuloj** volas sian esprimliberecon, ĉar la ŝtato volas ilin silentigi pro ilia subgrundeco.

Nepre provu iam partopreni veran **ravon**, tiam vi havos propran opinion pri la **teknomovado**. Ĉiu muziko estas frukto de la homaro.



Glosaro por kompreni la teknomondon

etoso (*Ambient*) : estas la plej ŝveba **teknomuziko** ĉar ĝi utiligas abundajn tavolojn (etosaj sintezilaj sonoj kovrantaj unu la aliajn kiel tavolojn) kaj praktike neniun ritmotakton (*Beat*). Rokpsikedela posthipia 70-80. Diskeldonejo : Apollo (Belgio)

haŭso (*House*) : muziko kun radikoj nigrulaj, **gruvaj** (*Groove*). Kreita en 1986. Diskeldonejo : Relief (Chicago)

teknoo (*Techno*) : agresa muziko kaj postŝveba kreita en 88. Diskeldonejo : Axis (Detroit)

tranco, **trancgoa** (*Trance*) : tre ŝveba muziko melodia (influoj hipiaj 70-80). Diskeldonejo : Harthouse (Germanio), Matsuri (Britio)

hardkoro, **gabero** (*Hardcore*) : estas la plej agresa **teknomuziko** (**bruo** !). Diskeldonejo : IST (Novjorko), Rotterdam (Nederlando)

ĝangalo (*Jungle*) : elektronika **ragamufino** kaj foje ŝveba, plej nova formo de **teknoo** (96)

dancmuziko, **revdanco** (*Dance Music, Dream*) : ne estas elektronika muziko, sed tute komerca supo kiu brutigas junularon ; vere evitenda fekaĵo !

Subgrunde vizitigas nin Julio Calegari

La brazila subgrunda scenejo

Kiam oni demandas pri Brazilo, certe vi povas memori pri Rio-de-Ĵanejro: plaĝoj, futbalo, karnavalo, amazona praarbaro, kaj tiel plu – malsamaj kaj interesaj aferoj. Sed Brazilo ne estas nur ĉi tio, ĉar tie ĉi estas granda lando kie vi povas trovi multe da ekzotaj kulturoj kaj kutimoj, konsiderinda teknologio, riĉeco apud malriĉeco. Kaj inter naj longaj distancoj ekzistas tre malsimilaj personoj de unu loko al alia, do konsekvence ekzistas ankaŭ malsimilaj subgrundaj " *scenejoj* " en la lando. Ie estas fortaj kaj aktivaj anarkiistoj, kun siaj ideologiaj agadoj (prezentoj, manifestoj, kaj politikaj skribaĵoj), kaj aliloke estas nur rokemuloj, sed kun intensa movado de alternativa kulturo kaj muziko. Ĉi tie ekzistas ankaŭ la " **Muzik-TeleVido** " (*MTV*) kiel en multaj landoj kiuj akceptas la usonan kulturan influon, kiun la junularo komune kredas " sia originala kaj alternativa televida kanalo ", sed kiu laŭ mia opinio estas nur alia publika opinioformanto kaj manipulanto. Sed ĉi tio tute ne gravas, ĉar mi estas ĉi tie pro alia afero : la brazila subgrunda scenejo.

Estas neeble raporti pri subgrunda kulturo ne parolante pri **(fan)zinoj**. Ili estas faritaj alternative uzante gluadon de ĵurnaloj, skribaĵoj, kaj pentraĵoj, kaj poste estas eldonitaj per fotokopia sistemo. Kaj tiu maniero iĝas nia medio de komunikado, informo, kaj protesto.

En Brazilo ekzistas ĉiu speco de **zinoj**, de anarkiemaj kun protestaj tekstoj, ĝis erotikaj ; de kristana ĝis gotika ; ktp. Ekzistas zinoj kiuj miksas stilojn kaj publikojn, kaj kio estas pli bona afero estas ke la plimulto celas informi pri ideoj, ideologioj, muzikistaroj, poezio, prezentoj, agadoj, novaĵoj, sed ne celas profiti. Ne estas spaco ĉi tie por rakonti multe pri tiu afero, sed kiu volas povas skribi al mi* por interŝanĝi zinojn – sed la plej multaj estas skribitaj en la portugala kaj eventuale en la angla.

Mi raportos iomete pri la scenejo en tri brazilaj ŝtatoj, ĉar mi kredas ke nek mi nek iu alia havas sufiĉan scion kaj sperton por raporti detale pri la tuta subgrunda landscenejo, escepte pri ĝeneralaĵoj.

Brazilio

La ĉefurbo de Brazilo estis farita de fama brazila arkitekto **Oscar Niemyer**, mendita de nia eksprezidanto **Juscelino Kubitchek**, en periodo de nia historio konata kiel " la brazila miraklo ". Tie ekflugis kelkaj rokbandoj en la komenco de la okdekaj jaroj, sed tio forpasis rapide. Nun ŝajnas ke la brazilia scenejo fortiĝas kaj diversiĝas pli kaj pli, kun aparta atento al *garaĝbandoj*. Iuj ricevis nacian rekonon, ekz-e **Little Quail and the Mad Birds**, **Low Dream**, **BSB-H**, **Maskavo Roots**, **DFC**, **Cambio Negro** ; kaj aliaj eĉ internacian, ekz-e **PUS** kaj **Raimundos**. Ĉilasta faris prezenton kie **C.J. Ramone** kantis kun ili.

Vere internaj kaj aktivaj en la scenejo, sed kun sia demokasedo en la mano kaj surbendiga projekto en la kapo, troviĝas tie ĉi **Polibas**, **Death Slam**, **Animais dos Espelhos**, kaj **Dungeon**. Ĉe la *hardkora* stilo estas **Os Cabelo Duro, Desakato à Autoridade**, **Filhos de Menguele**, kaj **Dickheads** ; kaj la *anarkipunkuloj* estas bone reprezentitaj per **Besthoven**, **Alarme**, **Maxter Dijit**, kaj **Hipotrofia**.

Goiânia

Proksime al nia ĉefurbo estas granda urbo Goiânia. De tie mi ne povas neglekti ĉiti du vere bonegajn bandojn kiuj meritas agnoskon de ĉiuj : **Jukes** (*ska-hardkora*) kaj **Cash for Chaos** (*krosovero*).

Rio-de-Ĵanejro

Turisme, kiam oni rilatas pri Brazilo, oni tute ne povas forgesi tiun ĉi urbon. Tie ĉi estas la famaj *Savinta Kristo* (granda statuto), *Pão de Açucar* (monto), *Copacabana* kaj *Ipanema* (plaĝoj). Karnavala festo, mulatinoj, kaj (malfeliĉe) multaj domaĉaroj. Konataj lokoj kiuj malfermas pordojn por subgrundaj bandoj estas *Garage*, *Canil Pub*, kaj *Circo Voador* (en tiu ĉi lasta troviĝas, ekz-e vendrede *metaluloj*, sabate *sambuloj*, kaj dimanĉe *punkuloj* – sed tute ne gravas !

De tie ĉi estas bandoj **Brutal Symphony**, **Volters**, **Endoparasites** (*metaluloj*), **Mortify**, **Under Pressure** (*mortmetaluloj*), **Exhumation**, **Desova**, **Molestia**, **Genetic Deformation** (*grinckoruloj*), **VNS**, **Caos Urbano**, **TNM** (*punkuloj*), **Soutien Xiita**, **Sex Noise** (*roko*, sed kantas nur banalaĵojn), kaj la tre konataj **Gangrena Gasosa** (*roka*) kaj **Planet Hemp**, kiu nuntempe estas famega ĉar ili (laŭ *Cypress Hill* eksterlande) defendas la uzleĝigon de fumdrogo (*Kanabis sativa*), pri kiu la stulta junularo ŝatas aŭdi kaj paroli – sed se vi demandus ilin antaŭ du jaroj, ili respondus ke kiu fumas estas devianto, sed nun fumi estas modo, do ĉiuj stulte ekfumas kanabon.

San-Paŭlo

La ŝtato kaj la ŝtata ĉefurbo havas la saman nomon. Mi komencos per la urbo, kiu estas la plej granda kaj ekonomie grava en Brazilo – ĉi tie troviĝas la gravegaj kaj imponaj bankoj, oficejoj, kaj komercistaro. Ekzistas ega kaj interesa miksaĵo de ĉiuj landoj kaj regionoj, kun kvartaloj japana, itala, portugala, juda, ktp., kreante la sanpaŭlan popolon. Ankaŭ la subgrunda scenejo ĉi tie estas diversega : *skauloj, bruuloj, krustuloj, grinculoj, hardkoruloj, punkuloj* (anarkiistoj kaj kelkaj vandaloj), *psikorokuloj, razkapuloj* (naciistoj kaj nazioj, ĉiuj vandaloj), *metaluloj, mortmetaluloj*, ktp.

Ekzistas en la urba centro loko konata kiel *Galeria do Rock*, kie estas laŭ *Guiness-rekordaro*, la plej granda koncentriĝo de diskvendejoj (vinilaj kaj kompaktaj) – 56 en la sama loko. Tie jam en pasintaj jaroj estis granda subgrunda renkontiĝejo, sed nun pro malpacemo, la popularigo de alternativaj bandoj, kaj nedaŭraj modoj, ĝi nun estas pli komerca – kvankam oni povas ankoraŭ renkonti personojn kaj bandojn vere aktivajn en la scenejo.

Nuntempe feliĉe ne plu estas tioma malpaco, kiel en pasintaj jaroj okazis inter personoj kaj bandaĉoj pro malsimilaj ideologioj kaj muzikstiloj preferoj. Sed tio ankoraŭ daŭras nun, ĉar razkapuloj ĉie malpacemas ĉial ajn.

Prezentejoj, kiel *Aeroanta* kaj *Black Jack*, malfermas siajn pordojn por subgrundaj bandoj ĉiaj, sed foje estas problemoj pro burokrateco kaj la neceso paĝi por ie kanti.

Kiel multloke en Brazilo, bandoj kaj individuoj ariĝas en kolektivoja kaj kooperativoj por pli bone organizi prezentojn, politikajn skribaĵojn, kaj diskonigi idealojn kaj bandojn, ekz-e SELF (" *straight edge* " kun **Personal Choice**, **Self Conviction**, **No Conformity**) ; MAP-SP (*anarkipunkuloj* kun **Castitate Sociale**, **Rebeldia**) ; KRAP (*anarkipunkuloj* kun **Metropolixo**, **Execradores**).

Aliaj bandoj preferas agi per si mem, aŭ kelkfoje per kunlaboro kun tiuj ĉi aroj. Ĉe la sanpaŭla scenejo mi povas citi la bandojn **NYAB**, **Açao Positiva** (*bruuloj*) ; **Necrorrosion**, **Rot**, **Parental Advisory** (*grinculoj*) ; **DZK**, **Governofobia**, **Invasores de Cérebro** (*punkuloj*) ; **Newspeak**, **No Violence**, **Paura** (" *straight edge* ") ; **IML**, **Araukana**, **FDS** (*hardhoruloj*) ; **Dr. MC**, **Racionais**, **Pavilhão 9** (*repuloj*), **Korsus**, **Genocidio**, **Pentacrostic**, **Portrait** (*traŝ/mortmetaluloj*) ; ktp.

Granda interesaĵo kreskas ĉi tie, t.e. la " *krista scenejo* ", tre miksita , ĉar troviĝas kune kantantaj kaj dancantaj *punkuloj, razkapuloj, mortmetaluloj, rokuloj, klubuloj*, ĉiuj aŭskultantaj *punkbandojn* (**Ressurreição**), *mortmetalajn* (**Anti-Demon**, **Devilcrusher**), k.a. Ĉiuj havas sian propran muzikŝaton kaj ideologion, sed malfeliĉe ili ĉiuj havas ankaŭ streĉan menson pri religio – se oni demandas al ili kial estas tiom da malsimilaj personoj kune, ili respondas nur : *" Jesuo estas la respondo ! "*

Ankoraŭ en ŝtato San-Paŭlo, ĉe la marbordo, estas tre miksa scenejo, sed ĝi ne estas krista kaj ne inkluzivigas razkapulojn. En Baixada Santista, kie troviĝas la plej grava brazila haveno, originas bonegaj bandoj kiel **Abuso Sonoro**, **Bones Erosion** (*grinckoraj*) ; **White Frogs**, **Safari Hamburger**, **Primal Therapy**, **Blind** (*hardkoruloj*) ; **Hierarchical Punish** (*mortmetalo*) ; ktp. Tie estas nur unu problemo : malmultaj lokoj por prezentoj.

Ankaŭ interŝtate ekzistas aktivega subgrunda scenejo kie organiziĝas multaj bonegaj prezentoj kun bandoj kaj spektantoj el ĉiuj ŝtatoj. La *anarkipunkuloj*, kiuj kutimas organizi tiun agadon, estas Rosa Branca (el Ribeirão Preto), MAISP (el nordokcidentaj urbo kaj ŝtato), GALO (Birigui), kaj la bandoj kiuj kunlaboras kaj partoprenas estas *hardkoraj* : **Street Bulldog** (Pindamonhagaba), **Dezakato** (Rio Claro), **Active Youth** (Araras), **Guliver** (Barretos) ; *anarkipunkaj* : **Desordem e Regresso** (Porto Ferreira), **Denuncia** (Birigui), **Desturbio Mental** (Ribeirão Preto), **Desnutrição** (Mirassol), **Mente Fraca** kaj **Pedrocas** (Barretos) ; *grinckora* : **Hinfamy** kaj **Frontal Reaction** (Araras), **SOS World Project** (Campinas), **Democratic Disorder** (Barretos) ; " *straight edge* " : **Open Your Mind** (Pirassununga) ; *metala* : **Maggot Colony** (Nova Poá), **Rotting Flesh** ; *bruema* : **Academic Worms** (Neves Paulista), **Masher** (Ribeirão Preto), **Stupid Patriotism** (Araçatuba), **Kaaotic Orchestra** (Araras).

*Vidu lian adreson en rubriko *" Haste-Klaĉe "*.

Malrokmuziko

Ramona van Dalsem (1929-1997)

Andrzej Pettyn intervjuas

Ni eksciis pere de **Pola Radio** ke la espokantistino **Ramona van Dalsem** el Nederlando forpasis la 7an de januaro 1997. **Ramona** estis preskaŭ 68jara. Ŝi estis la " esperantonajtingalo ", kaj plenumis multajn popularajn kaj ŝatatajn espokantojn. Interalie *El fora lando,* kasedalbumo, estis tre ŝatata en la Movado, same kiel titoloj kiaj " La feliĉo ", " Donu al mi vian manon, amiko ", kaj " Adiaŭa kanto ".
Sur la mortosciigo estis presita jena poemo :

Simplajn florojn plukis mi el tuta mia koro
Mi petas vin, akceptu vi bukedon je memoro.

La malapero de espartisto estas granda malĝojo por la espistaro kaj granda perdo por espokulturo – nia tuta teamo kondolencas.
Ĉisekve ni prezentas je ŝia memoro intervjuon kiun realigis **Andrzej Pettyn** de **Pola Radio** en 1993 okaze de lia prelegvojaĝo en Nederlando.

Andrzej Pettyn : Antaŭ la mikrofono gastas **Ramona van Dalsem**. Unua demando : kiel ĉe vi naskiĝis tiu kantemo kaj tiu deziro kanti en espo ?

Ramona van Dalsem : Mi ne trovis la ekvilibron kiam mi alvenis al Nederlando post mia restado en Indonezio, kie mi naskiĝis. Mi konstatis ke espo donis al mi tiun ekvilibron, kaj mi konstatis ankaŭ ke infanoj rapide lernas fremdajn lingvojn pere de kantoj. Mi rimarkis ke ne ekzistas originalaj espokantoj – almenaŭ mi ne sciis tion. Mi pensis, se mi povus fari tiujn espokantojn – ja, kompreneble ili estus tre simplaj – tiel naskiĝus emo por fari kantojn.

Andrzej : Mi memoras, se mi ne eraras, ke la unua kanto de vi estis " Donu al mi vian manon, amiko " – ĉu vere estis tiel ?

Ramona : Ne, ne, ne ! Ĉar unue aperis disko pere de UEA kun titolo *La feliĉo.* La unuaj veraj kantoj de mi estis la " Eĥo " kaj " Al suna optimismo ". " Eĥon " mi faris laŭ la ritmo de la lavmaŝino, estis tre amuze. " Al suna optimismo " mi faris fakte por konatino kiu trapasis malfacilan periodon.

Andrzej : Do, malantaŭ ĉiu kanto estas iu fono en kreado. Ĉu tio koncernas ankaŭ la kanton " Donu al mi vian manon, amiko " ?

Ramona : Jes ! Mi ĵus pretigis ĝin kaj tiam eksplodis la milito en Mez-Oriento kaj okazis la kongreso en **Rotterdam** – **Tel-Aviv-Rotterdam**. Tiam unuafoje mi prezentis la kanton " Donu al mi vian manon ". Mi enkondukis ĝin per tiuj ĉi vortoj : " Estus naive pensi ke komuna lingvo povas forpeli kverelojn kaj militojn, ktp. Sed kiel simple estus se ni povus diri *Donu al mi vian manon, amiko, donu al mi vian manon, amikin'.* "

Andrzej : Tiuj pacaj ideoj ofte ripetiĝas en viaj kantoj.

Ramona : Jes, kompreneble, ĉar mi travivis, kune kun mia familio, la japanan okupadon. Poste mi konstatis ke estas tre granda malamo kontraŭ la japanojn, ktp., kaj mi pensas ke tiu malamo ne estas bona por vivi, ĉar fakte oni ruinigas sin mem anstataŭ ol povi ion fari kontraŭ la malamiko. Tio estas la rezulto de tiu kanto, fakte.

Andrzej : Do viaj kantoj fontas el la vivo. Ĉu ankaŭ en via vivo estis tiu **Karlo Vojpirat'** ?

Ramona : Ne en mia ! Sed ni faris prezentojn en kaberada grupo en Haĝo, inter ili estis juna knabino. Ŝi havis amikon, kaj mi pensis, nu ! mi volas fari tiun kanton por ŝi, do tio estas " Karlo ". Poste kiam ni surbendigis la kasedon *En fora lando,* mi pensis, nu ! neniu povis vidi kiom aĝa mi estas, do mi kantas tiun kanton.

Andrzej : Ĝenerale viaj kantoj estas facile memoreblaj, melodiaj, ankaŭ la tekstoj ne estas tre komplikaj, oni povas kunkanti. Ĉu vi plejparte memverkas tiujn tekstojn ?

Ramona : Jes. Mi pensas pri temo, pri io, kaj fakte venas la tekstoj en mian kapon kaj samtempe ankaŭ la melodio. Do, mi ne faras unue la tekston kaj poste la melodion aŭ inverse, sed ambaŭ kune kreiĝas, jes.

Andrzej : Do, tio signifas ke kantoverkado, komponado okupas gravan lokon en via vivo.

Ramona : Nu, komponado estas granda nomo, laŭ mi, ĉar estas nur simpla afero. Sed jes, ĉar ne nur en espo mi kantas, sed ankaŭ en la nederlanda kaj en la indonezia lingvoj mi kantas. Sed mi volas kombini tiujn tri, do estas la tre ŝatataj lingvoj de mi.

Andrzej : Ĉu la indonezia kulturo troviĝas ie en la fono de la kantoj ?

Ramona : Jes.

Andrzej : En kiu ?

Ramona : Fakte en *Fora lando,* kie vi bone povas aŭdi, la kanton " Nostalgio ". En multaj kantoj estas tiel ke mi aŭdas vokon de io, kaj de alia flanko venas revoko kaj tio bone aŭdiĝas en la kanto " Nostalgio ". Ĉar ĉe la maro kiam mi estas en **Schevenningen**, mi vidas tiujn ruliĝantajn ondojn kaj kvazaŭ pere de tiuj ondoj mi aŭdas la vokon de mia naskiĝlando.

Andrzej : Mi ne scias ĉu vi scias ke inter niaj aŭskultantoj estas amaso da admirantoj de via kantarto.

Ramona : Mi ĝojas pri tio, ĉar tio fakte estas mia celo, ke per miaj kantoj kaj per miaj simplaj sentoj, mi povas doni ion al la homoj.

Andrzej : Mi aŭdis ke vi donas ion. Viaj kantoj ĝojigas homojn ankaŭ pere de la viena radio, kie ofte oni aŭdigas viajn kantojn. Ĉu vi pretigas nun novajn kantojn en espo ?

Ramona : Nu ! mi havas ankoraŭ kelkajn kantojn, sed veršajne ili neniam aperos.

Andrzej : Kial ?

Ramona : Ha ! mankas al mi akompanantoj.

Andrzej : Veršajne mankas mono por pagi akompanantojn.

Ramona : Ankaŭ, ankaŭ, jes ! Ĉar mia edzo jam plendas, kaj diras kiam tiuj kasedoj estos elĉerpitaj, ni povos pensi pri alia kasedo aŭ io alia, sed nun unue ili devas esti venditaj. Sed tio fakte ne estas mia ĉefa celo. Per tiu ĉi kasedo mi volas adiaŭi. Ĝi estas fakte mia adaŭa kasedo al la espistaro.

Andrzej : Tiu kiun vi nun preparas ?

Ramona : Jes, kaj tiu adiaŭa kanto ekzemple, tiu teksto vere aperis el mia tuta koro kaj ĝi vere estas adiaŭa kanto.

Diskaro :

Disko *La feliĉo* ĉe uea, 1967.
Disko *Donu al mi vian manon,* 1970.
Kasedo *En fora lando,* 1988.
Kantaro *Simplaj floroj,* 1969.
Kantaro *Roseroj,* 1974.
Kantaro *Kantu kun Ramona,* 1974.

- Malroknovaĵoj -

Edgar + Asorti

La familia popgrupo **Asorti** el Litovio (legu pri ĝi en ***ROK-gazet'*** n-ro 7) aperigis kasedon kiu kompilas plej elstarajn titolojn de la unua kaj dua kasedoj. Ĝi titoliĝas *Edgar + Asorti*. Interesitoj povas rekte kontakti:

Edvardas, Elena, kaj Edgaras PIŠČIKAI

Draugystės 1-28
LT 4761 VISAGINAS
Litovio
Tel: +370 66 32123
faks: +370 66 31286

Atentigas Michel DUC GONINAZ

Aldonoj kaj kompletigoj pri Jadwiga Dziegielewska

En la recenzo pri la kasedo de **Jadwiga** aperinta en ***Rg*** 7 englitis eraro. **Bulat Okudĵava** ne estas pola, sed rusa (ekssoveta) poeto kaj kantisto, kiu jam delonge iĝis klasikulo. Nomi lin polo estas kvazaŭ aserti ke **Brassens** (franca kanzonisto) estis hispano. **Okudĵava** certe ne estas konata en rokrondoj. Cetere, la repertuaro de **Jadwiga** ne povas esti sennuance nomita " romantikstila ", kvankam tiu adjektivo ĝuste karakterizas ŝin. Ekzemple ne romantikaj, sed satiraj estas " Kaso-seks' " kaj " Nigra kato ". Ĉilasta kanto de **Okudĵava** (en bona, menciinda traduko de nia esperantlingva poetino **Lidia Ligeza**), estas rekte politika, kaj ĉiam kaj ĉie aktuala.

Cetere, **Jadwiga**, famiĝanta krakova espokantistino kiu, interaliĝe, kantis dum UK en **Prago**, atendas invitojn por koncerti en Espujo. Tiuj kiuj pretas inviti ŝin kaj ŝian akompanantinon **Grazyna**, skribu aŭ telefonu al:

Jadwiga Dziegielewska
ul. Goaska 12 m.16
PL 30-619 KRAKÓW
Polio
Tel: +48 12 55 74 04

Ankaŭ en sama adreso aŭ ĉe UEA, eblas mendi ŝian albumkasedon *Jadwiga kantas*.

Juliano kantas

Malgraŭ embargo, kuba espomuziko translimas. *Juliano kantas*, kasedalbumo de kuba kantisto, atingis nian redaktejon pere de d-ro **Detlev BLANKE** el Germanio. Temas pri **Julián Hernández ANGULO**, prezidanto de Kuba Esp-Asocio. Tiu ĉi kasedo titoliĝas *Juliano kantas* kaj prezentiĝas laŭ tre simpla kaj amatora formo, akompanita de tekstokajereto enhavanta 16 titolojn. Tiu ĉi kasedo estas la frukto de kunlaborado inter Kuba Esp-Asocio kaj la esporedakcio de Radio

Havano-Kubo, kiu surbendiĝis ĝin en siaj studioj sub zorgoj de la sonreĝisoro **Alejandro GARCÍA**. Espartistoj devus povi pli ofte profiti laborhelpon de radiostacioj. Por tiaj muzikaĵoj, la teknika materialo kaj kvalito de radiostacioj estas sufiĉe taŭga.

Ne temas pri superprodukto, sed ĝi estas kontentiga. **Juliano** kantas kaj akompanas sin per akustika gitaro. Espistoj kiuj konas kantistojn el orienteŭropaj landoj kiel **Jomarton** & **Natašan**, **Georgon Handslik**, aŭ eĉ la francan kanzoniston **Jak Le Puil**, certe ŝatos, sed ili estos surprizitaj pro la optimismo de tiuj kantoj kies ritmomelodioj estas pli varmaj (hispanecaj, kubecaj). La kantoj temas pri libereco, paco, amikeco, kaj amo. Ĉiu titolo estas prezentita per komenteto de **Maritza GUTIÉRREZ**. Enkondukas kaj fermas la albumon la furorkanto " Tiel la mondo iras ", kiun multaj kongresanoj dum UK en Prago povis ĝui. Ankaŭ Pola Radio prezentis ĝin vive en unu el siaj prikongresaj programeroj. Interesa kasedo aldonenda al via kolekto! Ĝi haveblas ĉe la produktinto:

Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120
CU 10500 LA HABANA
Kubo
Tel: +53 7 40 44 84 aŭ 40 13 64
Faks: +53 7 33 87 29
Retpoŝto: keacu@ tinored.cu
aŭ keacu%tinored.cu@ web.apc.org

-M.F.

Jen vivo mia

Gafur Mirzabajev estas uzbeka aktorokantisto. Li ĉefe kantas naciajn popolkantojn de mezaziaj landoj uzbeke, ruse, taĝike, afgane, turke, kazake, ktp. De kvin jaroj li samtempe kantas ankaŭ espokantojn, kaj lastatempe li preferas kanti nur espe pro ĝia pli agrabla belsono. Akompanas lin per sintezilo kaj aliaj instrumentoj **Alexander KANAKI**, kaj kunkantas (korusoj) **Majram** (lia edzino), **Umid** (lia filo), **Mohiĉehra** kaj **Marhabo** (liaj filinoj). **Gafur** partoprenis plurajn internaciajn esparaĝojn: Baltaj Espo-Tagoj en Estonio en 1991; Muza en 1991 (kantkonkurso en Vilnius, Litovio); 79a UK en Seulo, 1994; 80a UK en Tampereo, 1995; Azia Espo-Kongreso en Ŝanghajo en 1996; kaj prezentis dekon da espoprogramoj kaj kantis espe en uzbeka ŝtata televido.

Li pretigis spektaklon duope kun muzikisto, kaj tiel duope (se ne eblas kun tuta familio) li ŝatus partopreni internaciajn esparaĝojn, ekzemple UK en Aŭstralio, kaj samtempe fari turneon en najbaraj landoj kaj aliloke (Eŭropo, Ameriko, eĉ Afriko).

Gafur ĵus aperigis unuan kasedalbumon kies titolo estas *Jen vivo mia*. Ĝi konsistas el 14 kantoj surbendigitaj en kvar tagoj en sonstudio TONIKA en Taŝkent. Duonon de la melodioj de la titoloj de la kasedo komponis li mem, aranĝis kaj muzikis lia amiko **Aleksander Kanaki**. Tekstoj venas de diversaj aŭtoroj, inter aliaj **Reto Rossetti**, **Julio Baghy**, kaj **William Auld**. Ankaŭ kantoj al kiuj niaj oreloj kutimiĝis en la plenumo de **Olivier Tzaut** denove surscenejiĝas tra **Gafur**. Temas pri populara muziko kun kantoj en espo, certe aprezata de televidemuloj ŝatantaj varieteon. Popolaj kaj tradiciaj kantoj estis modernigitaj pere de instrumentado sintezila, uzante, laŭ

mia gusto iom tro, sintezilan ritmomaŝinon (perkutinstrumentiston neniam anstataŭos ritmomaŝino). Konklude, la albumo estus malpli malvarme maŝinrigida per instrumentado fare de tuta orkestro, kio donus pli da muzika profundo, varmo kaj etoso por akompani la konstante bonan voĉon de **Gafur**. Ĉar tamen ne temas pri **teknomuziko**. Krom tiu ĉi kritiko, la ĝenerala kvalito estas korekta kaj ne ĉagrenos viajn orelojn se vi ŝatas tian muzikstilon. Rokuloj sindetenu. Ĝi mendeblas ĉe :

Gafur MIRZABAJEV
Klara Cetkin str. 6-50
UB 700060 TAŜKENT
Uzbekio

kontraŭ 15 USD aŭ egalvaloro pagendaj pere de UEA konto-kodo : mrzb-n .

Operete recenzas Jacques CAUBEL :

Famaj kantoj por belaj horoj

Kava-Pech estas ĉeĥa entrepreno, kongresa kaj eduka. Ĝi eldonas sciencan kaj fakan literaturon, helpas kiel vojaĝagentejo. Ĝi aperigis kasedon titolitan *Famaj kantoj por belaj horoj* kiu entenas 18 kantojn, el kiuj 13 estas eltirajoj de operetoj kiujn verkis **F. Lehar, J. Strauss, K. Millöcker**, ktp. Tri kantoj fontas el *La Ciganbarono* de **Johann Strauss**. Ofte temas pri amo, kelkfoje pri vino tiuj ĉi du bonaĵoj en la vivo ofte kuniĝas ! Aŭskultante la kasedon vi certe rekonos faman arion, ekz-e el *La gaja vidvino* de **Franz Lehar**, aŭ *Funikuli, funikula*. Ĉar aŭdiĝas ankaŭ du italaj kantoj, unu trista kreola serenado. Preskaŭ ĉiuj aliaj kantoj esprimas amon kaj ĝojon. Vi aŭdos longajn silabvokalojn. Ĉiam etoso plaĉa, gajeta, brila ravos vin.

Sed kiu ja kantas ? Unue espigis la tekstojn **Joachim Giessner**, do ofte el la germana lingvo. La tri plenumantoj nomiĝas **Katerina Kudliková**, soprano ; **Miroslav SmyČka**, baritono ; **Jan Zimmel**, akompananto per fortepiano. Ilia interpretado kunigas viglecon kaj humuron, alternigas impetojn kaj deklamojn. Muzikfake dirite, alternas ritmegaj taktoj kaj longaj fermatoj. Post tiuj ĉi ripozmomentoj, apenaŭ finspiras la kantisto, jam reekbatas la entuziasmiga vigla pianisto, kaj la emfaza kanto tuj grandiozas ! Alternas ankaŭ la du potencaj voĉoj, kanto al la sekvanta. Foje duetas agrable. Kia tonuso ! Pli ol montrus tuta orkestro kaj koruso ! Se vi ŝatas humuron, viglecon, kaj ariegojn, vi frandos dum unu horo kaj kvin minutoj. Kaj reaŭskultos. Belajn horojn en perspektivo ! Per lupeo (ne provizita) vi legos la tutajn tekstojn (bone tajpitajn). Ĉu famaj kantoj ? Ne, sed bombastaj. Ĉu famaj ? Por operetŝatantoj, certe. Ĉu amaj kantoj ? Jes, plejparte.

La kasedo mendeblas ĉe :

Kava Pech
Anglická 878
CZ 25229 DOBRICHOVICE (Praha)
Ĉeĥio
Tel : +42 2 991 2201
faks : +42 2 991 2126
aŭ
Joachim GIESSNER
An der Nicolaischule 3
DE 37412 HERZBERG AM HARZ
Germanio
Tel : +49 5521 4586
Faks +49 5521 733 13

- Rimarko de la eldonejo : Ĉar la teksto ĉe la kasedo estas tro malgrandlitera por povi sekvi ĝin dum aŭskultado de la muziko, ni aldonas al ĉiu kasedo broŝureton kun duoble pligrandigitaj literoj. Ni dankas al **Joachim Giessner**, kiu ne nur havis ĉi tiun ideon, sed ankaŭ ĝin centprocente financis.

- Malrokaj recenzoj -

Prezentas kaj recenzas Yves Bachimont

La Internacia Esperanto-Floro kaj MEL kun Dimitâr Terziev

Estas granda ĝojo por mi prezenti al vi, karaj gelegantoj, kasedon pri la Internacia Esperanto-Floro (IEFl) sub la ĉefa gvidado de **Dimitâr Terziev**. Efektive, laŭ mi la 21 kantoj de tiu ĉi sonbendo, eldonita de Muzika Esperanto-Ligo (MEL) en 1992, perfekte respegulas la espokulturon pri dumkongresa kantado. Tiuj kiuj partoprenis tiujn korusojn tutcerte ŝatos kaj ĝuos aŭskultadi ĝin, memorante siajn proprajn horspertojn.

Dimitâr Terziev fondis IEflon en 1980 okaze de la 65a Universala Kongreso en **Stokholmo**. De tiam ekaperis la kutimo kanti komence de kantspektaklo la faman kanton " Kuniĝu ni ! ", verkita de **Dimitâr** mem. Tiel ekas ankaŭ la sonbendo, kaj poste, inter bonvenaj komentoj kiuj klarigas la historion de la aŭdotaj kantoj, rekoneblos de ĉiuj kantemuloj interalie la " Kanto de l' Ligo " de **Mozart**, nia kara " La lingvo por ni ", " Dancu, dancu ", kaj la " Himno de ĝojo " de **Beethoven**. Oni povas rimarki ankaŭ kelkajn aliajn kantojn, " Jo-a-di-ladi " pri jodlado (tipa kantaĵo de Tirolo, regiono inter Italio, Svisio, kaj Aŭstrio), kaj " Antaŭen, pacbatalantoj " kun infanoj. Ni fine notu ke kvankam amatora, la surbendigo estas bonkvalita kaj estis plenumata dum UKoj kaj aliaj festkoncertoj inter 1982 kaj 1990.

Dimitâr krome estras MELon, kiu eldonas diversajn muzikajn dokumentojn. MEL eldonis kajeron samnoman kiel la kasedo kaj enhavantan 12 ĥorkantojn kun partituroj kaj tekstoj de ĝi. Notindas ke inter aliaj eldonoj de MEL, interesaj broŝuroj kiaj *Esperanto kaj muziko*, kaj *Muzika terminaro kun alfabeta indekso*, disponeblas same kiel, kompreneble, la regula bulteno de MEL kiu informas pri la espo-malrokmuzika vivo.

La kasedo kaj la diversaj eldonaĵoj mendeblas ĉe :

Muzika Esperanto-Ligo
p/a Dimitâr Terziev
ul. Milin Kamâk 58
BG 1421 SOFIA
Bulgario
tel. +359 2 66 62 14

Kristnaskaj himnoj

Jen finfine kasedo por la kantemaj kristanaj religiemuloj.

Sur ĉi tiu kasedo, kies titolo estas *Kantoj el Himnaro Esperanta*, **Bil Munsil** kantas kristnaskajn kantojn, kaj laste ankaŭ " La esperon " de **Zamenhof**, kiel ĉerizon sur la kuko.

William W. Munsil havas tenoran voĉon kaj estas el Usono, kie li ludis muzikon dum multaj jaroj, kiel solisto kaj kiel membro de diversaj ĥoroj kaj lokaj scenejaj muzikaranĝoj. Li ludis ankaŭ operon dum unu jaro kun Arizona Oper-Kompanio.

Helpe de sia bofrato, kiu estas profesia muzikisto, kaj aranĝis la sintezajn orkestrajn akompanajojn, **Bil** kantas sur la unua flanko de la kasedo ok kristnaskajn himnojn en espo kun tri instrumentaj interludoj, kaj fine la espistan himnon.

Du versioj de tiu ĉi sonbendo ekzistas. La unua enhavas sur sia dua flanko la samajn kantojn en la angla (sed sen " La espero "). La dua estas por kunkantemuloj (*karaoke*uloj), ĉar ĝia dua flanko entenas nur la muzikon de la kantoj.

Pri la kantoj mem, estas vere ke la voĉo de **Bil** elstaras klare kaj profesie, sed oni povas bedaŭri ke la sonregistro de tiu ĉi kasedo produktita en 1992 ne estas tiel laŭta kaj kvalita kiel oni povus deziri.

La kasedoj aĉeteblas ĉe UEA aŭ rekte ĉe **Bil** (per 9-USD-poŝtmandato) :

Vilĉjo Munsil, c/o Lois Hunt
6405 East Shea Blvd.
SCOTTSDALE, AR
85254
Usono

Muzilo – Sub la stel' de l' espero

Inter ĉiuj korusoj kiujn mi ĝis nun aŭdis, **Muzilo** sonas la plej profesia. La voĉoj de la 25persona virina ĥoro estas klaraj kaj belaj, la ritmoj kaj muzikaj ligoj estas harmoniaj, kaj plie la surbendigado estas ege bonkvalita. Tiu ĉi espokoruso fondiĝis en Polio en la jaro 1974. Aparte notindas ke de kelkaj jaroj nur virinoj, kantante kvarvoĉe, konsistigas tiun ĉambran kantensemblon. Nuntempe la muzika gvidanto kaj direktisto de la ensemblo estas **Andrzej Seroczynski**, piane akompanas **Tadeusz Prejzner**, kaj la prezidanto de la ensemblo **Wiesaw Tomaszewski** plenumas la funkcion de literatura gvidanto.

Tiu ĉi kasedo, kies titolo estas *Sub la stel' de l' espero*, eldoniĝis en 1994 okaze de la 20a datreveno de la agado de la koruso kaj entenas varian repertuaron. Unue, kelkaj plaĉaj muzikeroj de famaj klasikaj verkistoj estas kantitaj de la ĥoro : " Hungara danco n-ro 6 " de **Brahms**, " Kvar sezonoj " de **Ĉajkovskij**, " Andante " de **Beethoven**, ktp. Poste eblas aŭdi pli religian muzikon, inter kiuj estas *"Laudate Dominum "* de **Mozart**.

Sur la dua flanko de la kasedo venas popolaj polaj kantoj, kiuj sonoras agrable kaj ĝoje. Fine estas vera feliĉo aŭskulti la varman kaj ĉarman voĉon de la baritono **R. Kossakowski**, kiu kantas muzikerojn, ĉu klasikan de **Schubert**, ĉu sentimentalajn (" Vin amas mia kor' ", " Mi kisas vian manon nur "...), ĉu pli viglajn kiel " Pluvaj ferioj ĉe l' mara bordo " (teksto de **Raymond Schwartz**) aŭ " La hispanino ". Indas mencii ankaŭ unu kanton, " La vojo ", kiu estis origine verkita de **Zamenhof** mem.

Mi devas konfesi ke tiu ĉi buntmuzika kasedo ekdezirigis min aĉeti ĝin, kaj por tiuj kiuj dezirus aŭskulti tiun espokoruson sur vera scenejo, sciu ke la ensemblo pretas akcepti invitojn de eksterlandaj espistoj. Por akiri la kasedon aŭ ricevi pli precizajn informojn, nepre skribu aŭ telefonu al :

Esperanto-Koruso Muzilo
Pola Esperanto-Asocio
ul. Wiejska 11/2c
PL 00-480 WARSZAWA
Polio
Tel : + 48 621.51.33 aŭ +48 621.64.38

Alberta Casey kantas esperante!

Kia plezuro aŭskulti la ĉarman anglan voĉon de **Alberta**, kantantan en espo la melodiojn de fame konataj klasikaj kantoj el la tuta mondo ! Tio plonĝigas nin en malnovan iel sopiratan romantikan epokon, kie la homoj estas lulatajn de amkantoj aŭ de kanzonoj pri naturaj aŭ urbaj mirindajoj elvokantaj dolĉaĵn vivsentojn.

En Usono, multaj ĵurnalartikoloj aperis siatempe pri la dua albumo de **Alberta Casey** de **La Jolla**, Kalifornio, *San Diego vokas* en 1981. Guste tiam ŝi aktivis en la espoklubo de **San Diego**. Ŝi eniris la espomovadon en 1971, partoprenis kiel kantistino kvin internaciajn kongresojn, kaj tiuepoke eldonis unuan kasedon en espo, *Al vi de mi*. En tiu unua volumo, eble influita de la franca deveno de sia praparencoj, ŝi elektis kanti du kantojn de du famaj francaj kantistoj, " La vivo en roz' " de **Edith Piaf**, kaj " La mar' " de **Charles Trenet**. Tutcerte ankaŭ internacie konataj estas la angla kaj la itala kanzonoj " Mia viro " kaj " Ĝis la revido, Roma ! ", ambaŭ bele interpretitaj de **Alberta**.

Pri ŝia dua kasedo unue menciita, multaj urbanoj el **La Jolla** partoprenis la registroprocezon tradukante la tekstojn, fotante la bildon de la kasedo, aŭ muzike akompanante la kantistinon per basgitaro (**Burt Turetsky**), gitaro (**Peter Sprague**), drumo (**Jim Plank**), kaj piano (**Edith Gordon**). La rezulto buntas kun multlandaj kanzonoj de Polio, Israelo, Havaĵo, Italio, Hispanio, kaj eĉ Latvio, harmonie miksitaj kun pli famaj kantoj kiel " Flugadi " (" *Volare* "), " Kisu min multe " (" *Besame mucho* ") aŭ " San Diego " kaj " Ponto trans akvo ŝtorma " (" *Bridge over Troubled Waters* "), neforgesante la famegan kanton de **John Lennon** kaj **Paul McCartney** *"Yesterday "* (ĝi fariĝis " Kredis mi en espo "). Tiu ĉi nura lasta rimarko igas la kasedon aĉetinda de ĉiuj tiamaj junuloj ! Plie, ĉiuj sciu ke **Alberta Casey** neniam kantis profesie, kio igas ŝian talenton de kantistino des pli rimarkinda.

Nun, **Alberta** malpli aktivas en Espujo, kaj okupiĝas pri pentrarto, kio estas ŝia dumviva okupado. Ŝiajn kasedojn kun espotekstoj oni povas mendi ĉe :

ELNA
PO Box 1129
EL CERRITO, CA
94530
Usono

· Fanoj de Alberta povas daŭre skribi rekte al ŝia nova adreso, kiun vi trovos en *"Haste-Klaĉe"*.

Tute ne gravas ...

E-fika polemiko daŭras

Post apero en *Helianto* n-ro 6/95 (ukraina gazeto) de rebato pri artikolo de **Zapata** aperinta en ***ROK-gazet'*** n-ro 7, ni ricevis longegan leteron el Ukraino, el kiu ni nur pro spacmanko aperigas fragmentojn signifoplenajn . Kompleton publikigos *Helianto,* al kiu vi povas mendi ekzempleron :

HELIANTO
Informilo de Ukraina Esperanto Asocio
UA-263018, UKRAINIO, LUCK-18, p.k. 26.

Malgraŭ furzetoj de ĝisostulaĉoj....

Saluton gebastardoj ! Denove **Glebo Malica** 'stas ĉiinformile. Mi havas aĉan novaĵon por vi : onidiroj pri disfalo de **Piĉismo** 'stas aroga fikalumnio ! Ja somere de 1995 pro familiaj kialoj **Piĉismon** lasis drumisto **Lexa** kaj basisto **Dima** (ili ambaŭ iĝis paĉjoj) kaj 'stis sendita kacen **Tarasevič** pro lia nekapablo progresi muzike kaj pejorativi morale – sed tio tute ne signifas ke la bando mortis. Venis novaj homoj, jam pretas kelkaj novaj kantoj multe pli rapidaj kaj malicaj ol antaŭe, do **Piĉismo** plu vivas kaj bonstatas, kion mi pruvos per faktoj post kelkaj alineoj. Sed komence mi volas iom vipobati malkleraĵn fikritikistojn. Dankon al **Zapata** el Francio pro l' ĉarma reago al larmoj de **H. Berezin**. Malfacilas ion aldoni, sed mi provu.

Estimata **Berezin** prudente konfesis sian nekompetentecon, kiu klare videblas eĉ sen tiu averto. Sed ĉu vere valoras artikolo kies aŭtoro nenion komprenas pri la priskribata temo ? Ĉu ne indus komence tralegi fakliteraturon, studi specialajn artikologiajn terminojn, lerni jargonon, aŭskulti almenaŭ centon da punkbandoj (de klasikaj ĝis adeptoj de la plej novaj fluoj ?), regule ricevadi periodajojn kaj vizitadi subgrundajn koncertojn, korespondi kun punkoj el diversaj landoj, do 'sti serioze envolvita en la punkmovadon, por poste kritiki ? Ĉu ne indus kompreni almenaŭ unu kanton punkstilan, por poste kritiki ? Ĉu ne indus almenaŭ aŭdi la kanton " Ne ricevos ŝtato ĉuron ! ", por poste kritiki ? Ĉi tion faris nek **Berezin**, nek **Heller** ! Ĉu eblas nomi ilin saĝaj homoj ? Mi opinias ke ne. Por ke similaj naivaĵoj ne plu aperu, mi devas iom klerigi miajn oponantojn.

Estimata **Berezin** dubas pri ekzisto de nacilingvaj kantoj, maltaŭgaj por bone edukitaj homoj, t.e. enhavantaj tabuan leksikon. Li do 'stas malbone informita, ĉar " tiaj abomenajoj " (folkloraj kaj aŭtoraj) ekzistas en ĉiuj lingvoj, eĉ tiom multas ke absolute ne eblas kompili la plenan liston. Sed aparte pekas pri maldecajoj t.n. subgrundaj muzikistoj, kion bone ekzemplas la kantonomoj : *" Poluj-naluj "* de siberia **Grajdanskaja Oborona**, *" Hej, tussa "* de islanda **Forgar ður Helvitis**, *" I'm Not a Fuckin' Jazzman "* de aŭstralia **Rupure**, kaj multaj aliaj. Plie , eĉ nomoj de kelkaj bandoj povas ruĝigi ne nur inĝenierojn, ekzemple : usona **Anal Cunt** (" Anusa Piĉo "), japana **Cocobat** (" Kripla Merdo "), latva **Ej Dirst** (" Iru Feki " – la plej akra latva blasfemo !), kaj ho, teruro ! – espa **La Bleka Forfikulo kaj siaj Orelboristoj** ! Kompreneble, por tion scii – ne sufiĉas televidumi.

Estimata **Berezin** ĝuste komprenas ke mankas limoj pri temoj de punkaj kantoj. Ĝuste pro tio observatas ega ideologia diverseco de **punkuloj** : ekzistas **anarkopunkuloj** kaj **nazipunkuloj**, **satanpunkuloj** kaj **kristanpunkuloj**, **pacpunkuloj** kaj **militempunkuloj**, **pornopunkuloj**, **vegetaranpunkuloj**, eĉ **futbal-** kaj **hokepunkuloj**. Certe, ne nur vorte, sed ankaŭ muzike same eblas esprimi sin laŭvole, sen ajnaj tradiciaj kaj harmoniaj baroj kaj malpermesoj. Do ne mirindas ke **punko** dispartiĝis je multnombraj stiloj kaj direktoj : **hardkoro** (*hardcore*), **grinco** (*grind*), **krusto** (*crust*), **ojo** (*oi*), **brukoro** (*noisecore*), **kaoskoro** (*chaoscore*), k.c. Strebo al absoluta libero "stas ideo de **punko** ! Vanas atendi ontan liberiĝon fare de ontaj herooj aŭ malheroj, ja : " Mankas futuro ! " – himnis **Sex Pistols** en 1977. Anarkio nun kaj ĉi tie ! – tiel instruis la unua punkulo **Jesuo Kristo**, same agas nuntempaj gepunkuloj en ĉiuj lokoj de la planedo. **Punko** 'stas la plej alta formo de kristanismo, ja Dio ordonis preĝi por malamikoj, do necesas ami ankaŭ la Diablon, ĉar Satanĉjo ja 'stas la plej granda malamiko homara ! Vivi plenspire, ne zorgante pri neekzistanta morgaŭo, vivi arte – jena 'stas vera dia harmonio, malgraŭ asertoj de ruzokulaj fariseoj, kaŝitaj sub maskoj de prudaj inĝenieroj, humanaj ŝtatestroj, kaj bonkoraj mecenatoj, kies unusola dio ja konatas – la **mono** !

Piĉismo ne intencas suicidi !

Tamen la liberon endas gardi. Ĝuste tion spertis miloj da punkoj la 4-6an de aŭgusto 95, amase venintaj en germanan urbon **Hannover**, por festi la tradiciajn Kaosajn Tagojn. Okazis vera ribelo kun nepraj atributoj : barikadoj, urbaj ĝerilanoj, strataj bataloj, ŝtonoj kontraŭ aŭtopafiloj, bruligado de aŭtoj, molotovkokteloj, specialaj policaŭtegoj, rabado de butikoj kaj oficejoj, cindro, frakasitaj ostoj.... Nekutimis nur sloganmanko, ja oni ribelis nur pro ribelemo. Presekaŭ milo da kapoj trafis en la hospitalon, miloj da punkuloj arestitis, sed la Kaosaj Tagoj 96 tutegale okazos. 'Stis amuzege rigardi tiun ĉi feston de **anarkio** en novajprogramoj de Ostankino – ja fine televizio anstataŭ kapitalismaj klaŭnoj nevole montris la ulojn kiujn mi pretas simili. Ve, s-ro **Heller**, ne por distro aperis **Piĉismo** !

Bedaŭrinde nek **Berezin**, nek **Heller** rimarkis kontraŭsklavecan karakteron de " Ne ricevos ŝtato ĉuron ! ", montrinte nur priseksorganan interesiĝon. Do, boju la hundaĉoj, defendu vian mastron ! Fiku la grandaj kacoj, koncipu novajn ferdojn por via faŝisma paŝtulo !

Pardonu estimata **Berezin**, sed mi ne kredas viajn fabelojn pri la Veroda frataro, ĉar mi ne hieraŭ naskiĝis kaj ne plu uzas verdajn okulvitrojn. Mi ja bone konas fortan etoson de espotendaroj, kie regas *" Lapaduj, jupija "*, drinkado, flirtado, senĉesa babilado, stulteco, diboĉo, malago.... Mi ne konvinkitas ke ĉiuj espistoj 'stas belanimaj kaj spiritaj homoj, ja faktoj pruvas malon. T.n. espistoj paŝon post paŝo detruas la revolucian ideon de mondolingvo, transforminte ĝian altspiriton al fia etburĝa sekteto de espajkolektistoj. Sed ĉu ni vere priploru disfalon de l' putra movado ?

Por iom trankviligi s-ron **Berezinon**, mi ne plu verkas malmoralajojn kaj fekumojn. Jes ja ! Nun mi ekkreas esponarkoslangon, do bv. eĝui la tekston de nia nova *sentitola* droghimno :

Rii nrii Fubakaĉi Reen mreen Kaki feki Rua rio Praareo Rea uro Muarelo.

Krome ne plu aperas poemaĉoj. Nun ni uzas vere belegan poezion. Do, eklegu ankoraŭ unu kantoteksto nomitan

" Krakplakmankpankpunkponkpinkpronk "

Krak Plak Mank Pank Punk Ponk Pink Pronk.

Neniu do nune povas akuzi min pri maldecemo ! Do, kiu scias ? Ha, jes, elstara ukrajna nacišovinisto **Mordko Heller**, malamanta ĉion sovetan. Nesuperebla majstro pri disdono de pseŭdonimoj (pli ĝuste moknomoj) kaj ĝenia reklama agento, malavare elspezante venenan salivon, ial klopodas silentigi junan kontraŭmuzikan movadon. Sed kial ? Komence mi opiniis, ke pro kaduka cerbo. Tamen iom pli poste niaj mikolaivaj (kia naŭza vortaĉo !) spionoj donacis al ni eltrančajon el iu mikolaiva (fek !) ĵurnalo kun la artikolo pri papaga folkensemblo **Zahrava**, kies aŭtoro 'stas nia ĉarma bubo **Mordko**. Tiu **Zahrava** aktive penas penetri en la espomerkaton, do kompreneble necesas forbalai la konkurantojn. Por ĉi " nobla " celo l' alta patrono uzis tutan forton de propra intestaro por superfeki **Piĉismon**, eĉ enmiksigis al sia sterko la teoriulojn de anarkio. Verŝajne kara **Mordko** remerdos, do por ke liaj ĉikanaĉoj pli perfektu kaj kredindu, jenas senpaga informo por li kaj aliaj kverelemuloj : mi preferas nomojn de l' praktikuloj **Emiliano Zapata** kaj **Nestor Maĥno**. Do, ek al skribotablo ! Sed, kara **Mordko**, 'stu singarda, ja Mikolaiv abundas de neŭrozaj pogromemaj junuloj kiuj ne toleras se oni impertinente fekas sur la ŝatatan bandon !

Se objektivi, mi tamen ŝatas unu terminon de **Mordko Heller** *" – anarkopiĉismo ".* Plaĉa !

Viva anarkia banditismo ! Ĉe vi trankvilas ? Vane ?

Glosaro :
ferdo : kaco
fubako : narka movo de fizika korpo
gigo : koncerto
hato : malamo
kopo : policano, milicano
mreo : abstinenco
mrio : narka miro
muarelo : narka volupto
rio : injekto
ruo : halucinaj strato, koridoro, tunelo, k.s.
uro : daturo

Skribemuloj notu la novan poŝtadreson de l' bando :

p/a Glebo MALCEV
P.K. 38
UA 326520 CJURUPINSK
Ukraino

- Glebo Malcev (Pejorativa Eklezio "Piĉismo")

Daŭrigas de *R-g* 7 – Rafa BLANCO:

Pri la superrego de la angla en rokenrolio, kaj 2

Citaĵo de mi elprenita el komento de **Solo** finis la unuan parton de tiu ĉi serio en la lasta numero de ***ROK-gazet'***. Malgraŭ ke la andaluza kantisto prenas kelkfoje tre noblajn poeziajn materialojn, kiel la tekstojn de **Miguel Fernández**, li taksas la voĉon plia instrumento ene de bunta orkestro. Kohere al tiu penso pravas la gravomanko de la tekstoj, kaj sekve la lingvo perata due aŭ laste rangas en la muzika komponaĵo. Tiel ĉi ni troviĝus antaŭ instrumenta muzikĝenro, tiu aspekte simila al simfonia klasikmuziko aŭ al senvorta jazo, inter multaj aliaj.

Memevidentas la fakto ke rokenrolaj lingveroj ne estas nur fonemoj, silaboj, aŭ morfosintaksaj rilatoj, sed aliaj semiotikaj indikiloj kiel vestostilo, scenografio, danco, lumoj, gestoj. Tamen, ĉu la transdoninda mesaĝo ne (mal)kaŝiĝas ankaŭ per la vortoj ?

Kiel sciate, rokenrolo estas plejparte evoluo kaj ido de bluso, muzika formo kie verŝajne nur ne prilaboris tre profunde la tekstojn ; spite al tiu ĉi aserto, areto da elstaraj verkistoj, kiel **Marguerite Duras**, miris pri la rudaj poemoj de tiu muziko. Ĉiukaze la ĝenerala publiko ne tre priatentis tiun aspekton en prezentoj, pli celantaj dancon kaj amuzon. "*La blusiston oni ne povas aŭskulti, pene li esperas ke oni lin aŭdos.... La publiko staras, babiladas, drinkas, manĝas, aplaŭdas. Kelkfoje eĉ batalas.*" (P. Paraire, 1988).

Woody Guthrie enkondukis kritikan voĉon kaj sociplendon en bluson, sed kutime simple traktado de amo estis preskaŭ nura zorgo dum la disvolviĝo de tiu afrikdevena (kaj komence ekskluzive anglalingva) muzikstilo.

Sammaniere la unuajn jarojn de la blusida rokenrolo mastrumis jenaj temoj : amoro, veturiloj, monamo, knabinoj. (La **amplifikia** "Aline" de la okdekaj jaroj konsistigas bonegan ekzemplon por koni la malmerginĝintan rokenrolon de la sesdekaj.)

Postmilita Usono, kune kun partopreno de avidaj entreprenistoj, ebligis fulman disvolviĝon kaj furoron. Tuj poste rokenrolo transmariĝis al Eŭropo, ravante la junularon de la sesdekaj jaroj, ĉefe pere de **Elvis**, kaj modernaj ensembloj ekrokenrolumis france, hispane, itale. La tekstokvalito, tamen, nek ravas nek diferencigas tiun eŭropan de tiu usona. Temas pri freŝaj rakontoj pri somero, amo, amata knabino, ktp., alkroĉitaj al gajaj kaj foje eĉ talentaj melodioj.

Ni staras ĉe la ĝermo de kultura fenomeno karakterizanta la jarcentfinon ; la junularo ekvingis postmilitan komforton aperigante ekologiajn, pacifistajn, kaj seksliberajn kondutojn kiuj akcelis alvenon de la kontraŭkultura kaj 68maja movado. Rokenrolo ja estis sufiĉe ribelema tenilo por elverŝi tiajn menciitajn sintenojn, tamen tio ne ŝuldiĝis al aggitaj tekstoj, sed al aliaj eroj de la spektaklo : amasrita allogo, frenezdanco, laŭtega sono.

Tiam ekestis la figuro de migra poeto kaj kantisto, **Robert Zimmerman**, plikonata kiel **Bob Dylan**, dekomence partopreninta en rokenrolaj grupoj, poste aliĝinta al la folka etoso, kaj perelektre skandaligante en Newport. Koncerne la tekstokvaliton, li alportis la plej videblan mejloŝtonon en la rokenrola historio per prilaboritaj valoraj poemoj vestitaj per elstaraj folkrokaj melodioj. **Dylan** dekomence konsciis pri la facila tento krei engaĝitajn kaj frapajn tekstojn sen vera arta valoro, kaj lia riproĉo al **Phil Ochs** ne okazis bagatele : "*Vi ne estas kantisto, sed ĵurnalisto.*"

"*Dylan kunfandis folkon, bluson, kaj rokenrolon laŭ tre persona koncepto, kaj la tekstoj, kelkfoje evidente elstaraj, unuarange reliefigis la tuton. Li estis la unua muzikisto kiu enŝovis literaturon en popmuzikon.*" (**M. Hernández**, 1994.)

La enhavo kaj formo de la kanto "*A Hard Rain's a-Gonna Fall*" bonege ilustras tiun aserton. De tiam iom post iom tiaj tekstoj akiris spacon ĉe la vastega rokenrola kampo. **Jimi Hendrix**, **Lou Reed**, **Jim Morrison**, **King Crimson**, aŭ **Martin Newell** inter multaj aliaj ne malmulte strebis por praktike ŝanĝi la literaturaĉfamon de la porrokenrolaj verkoj.

Simpla trarigardo de la realo, tamen, agnoskigas nin ke la ĝenerala publiko kaj la kritikistoj ne tre konsideras la vortvaloron de la kantoj. Ŝatantoj (kaj anglalingvaj) de **Metallica**, **U2**, **Michael Jackson**, aŭ **Rolling Stones**, demandite pri kio temas la kantoj de tiuj grupoj aŭ kantistoj, kiom da respondus kontentige ?

Eble la kerno de la afero ne kuŝas sur la elekto de la lingvo, sed de la tekstoj en la rokenrola komunumo, nome verkantoj, konsumantoj, kaj kritikistoj. Se la tekstoj ne meritas minimuman atenton, tute ne gravas la lingvo – ĝi povas esti plia estetika aldonaĵo, sed neniam nepra parto de la tuta verko.

Ĉu en rokenrolio oni ĝenerale agnoskos la rangon de la tekstoj ? Ni ne forgesu la kantaŭtoran flankon de **Dylan**. Ĉe la kantaŭtoroj la tekstokvalito donas kategorion al la kanto. Kiam oni aŭskultas **Sivio Rodríguez**, **Georges Brassens**, **Joaquín Sabina**, **Leonard Cohen**, **José Afonso**, **Lluís Llach**, ktp., neniel oni povas preterpasi konscion pri la enhavo de la poemoj.

Ju pli la kantaŭtoroj influas aŭ mem enkadriĝas en rokenrolio, des pli la tekstoj atingas pli altan ŝtupon. **Dylan** kaj multaj aliaj muzikistoj troviĝas ĉe la limo de la kantaŭtora kaj la rokenrola terenoj – ili bone konas ambaŭ flankojn, kaj ambaŭ riĉiĝas per mikso de eroj de tiuj najbaraj "landoj".

Mi ne scias ĉu *respondon al ni blovas la vent'*, laŭ mi la vera demando ne estas ĉu la angla regas monopole en rokenrolio, sed ĉu per rokenrolo oni komunikas ion mirindan, interesan, kaj allogan.

Rokaqado

Rokage raportas Yves Bachimont, sekretario de EUROKKA :

Iom pri la vivo de EUROKKA

De meldekstre Jomo, Bertrando, Johano, Flo!

Gravaj orientiĝoj

Dum la memorinda kvina Kultura Espo-Festivalo (KEF) en **Kopenhago**, okazis la 9an de aŭgusto 1996 kunveno de Espo-Rok-Asocio EUROKKA. La kunveno komenciĝis nur post tagmanĝo, por ke eĉ noktemuloj povu partopreni. Kaj efektive venis kaj ĉeestis proksimume 25 personoj, kun interalie la prezidanto de TEJO (**Danny Ten Haaf**, kiu ankaŭ kantas en **Akordo**), pluraj artistoj kaj muzikistoj (**Jomo**, **Flávio Fonseca**, **Martin Wiese**, **Bertilo Wennergren**, **Per Ola Axelsson**, **Rolf Fantom**, ktp.), ankaŭ JEFO-komitatanoj (**Philippe Berizzi**, **Tony Guyot**...), kaj kompreneble **Flo**, kiu estris la paroladojn kaj diskutojn. Por la novuloj, **Flo** unue rapide priskribis la historion de la asocio, de ĝia fondiĝo en 1988 ĝis nun. La diversaj agadoj de EUROKKA estis kaj daŭre estas multaj. Dum tiu kunveno oni pritraktis do la ĉefajn hodiaŭajn punktojn kiuj interesas ĉiujn muzikemulojn kaj muzikamantojn de Espujo.

ROK-gazet'

Unue oni parolis pri tiu ĉi magazino ("*zino*") kiun vi tenas nun en viaj manoj, nome ***ROK-gazet'***. Hodiaŭ vi legas la 8an numeron (se vi ne abonas ĝin, tuj abonu !) kaj tutcerte ricevis kun ĝi la "*Specialan Dosieron*" de la 2a *Vinilkosmo-Kompil'* pri la partoprenintaj muzikbandoj. Pro financaj kaj tempaj problemoj, la revuo aperas nur unufoje jare kaj eble ne plu aperos post tiu ĉi numero. Efektive, unuflanke ĝia eldonado okazigas sufiĉe gravan mondeficiton, kaj oni devas trovi rimedojn por financi ĝin – sendokostoj estas same grandaj kiel ĝia produktado ! Ĉu enlasi pagitajn reklamojn en la revuon, ĉu elpensi ion alian ? Ĉiuj ideemuloj skribu al ni.

Ĝis nun ni ricevis diversajn helpojn de Eduka Fondaĵo Carson, Fondaĵo Grabowsky, iom pere de la "*Speciala Dosiero*" de *Vinilkosmo-Kompil'* Vol. 1 & 2 de FAME-Fondaĵo, kaj tra TEJO de Eŭropa Junulara Fonduso. Aliflanke bezonatas kaj serĉatas urĝe aktiva ĉefredaktisto kaj kunlaboranto, ĉar **Flo** sufokiĝas sub la laborego – ĉiuj volontuloj kontaktu nin !

Do krizo ekvidiĝas, sed kun via helpo ni tamen fidas pri estonteco de la revuo.

Vinilkosmo-Kompil'

Poste, pri *Vinilkosmo-Kompil'*, vi ĉiuj jam scias ke la unua volumo estis granda sukceso – se vi ankoraŭ ne posedas ĝin, rapide mendu ĝin, ĉar restas nur proksimume 80 KDoj kaj 120 kasedoj.

La 2an volumon oni sendis fine de julio, kaj sekve ĝis la kunveno en KEF malmultaj reagoj elmontriĝis, kvankam ĝi estas pli kvalita kaj varistila ol la unua.

Koncerne tiun duan volumon, iuj rimarkis ke la germana versio de la traduko en la kantlibreto estas iom fuŝa – pro komputilmalkongruoj devis esti retajpita tiun tutan parton. Sed kiugrade fuŝa ? Ĉu represi la kantlibreton ? Ĉu por eventuala 2a eldono ? Ni petas do germanojn reagi pri tio.

Krom tio, aperigo de plia kompilaĵo ne estas antaŭvidata, ĉar tio ŝajnas nun neutila. Eventuale reeldono eblos, kiam volumo elĉerpiĝos, sed tio dependos de estontaj mendoj. En la estonteco Vinilkosmo planas plu eldoni aŭ eĉ produkti muzikgrupojn, sed tiu lasta afero postulos studion (eble post kelkaj jaroj).

Vinilkosmo-Katalogo

Kiel kutime la *Vinilkosmo-Katalogo*, pere de kiu oni povas mendi pasintajn kaj jusaperintajn albumojn, sendatas samtempe kiel ***ROK-gazet'***, kiu recenzas ilin kaj informas la legantojn pri la baldaŭaperontaj produktoj – Vinilkosmo aparte atentas pri la kvalito de la produktaĵoj kaj mem elektas tiujn kiujn ĝi pretas distribui. Fine nepras mencii ke en **Donneville** (apudurbeto de **Tuluzo**, sudokcidenta Francio) **Flo** intencas starigi muzikproduktejon (aparte de EUROKKA kaj Vinilkosmo), kie jam ekzistas funkciantaj muzikekzercejoj – nuntempe 19 kun ĉirkaŭ 35 rokbandoj lokaj. Post du jaroj estos investita mono por konstrui sonstudion, kie espobandoj rajtos surbendigi favorpreze – por ŝtopi la mankon post disfalo de Pigo-Studio en **Stokhomo**.

TTT

Alia temo de la kunveno estis eldono de varbcela hejmpaĝo pri EUROKKA, ***ROK-gazet'***, kaj Vinilkosmo ĉe **Interreto** (TTT : Tut-Tera-Teksaĵo ("*Web*"). Estis interkonsentite ke **Tony Guyot** kaj **Duncan Thomson** okupiĝos pri tio, kaj rilatos kun **Ono Takao** en Japanio, kiu proponis memorspacon en sia ret-servejo.

Koncert-Organiza Reto

Jen alvenis unu el la plej grave pritraktindaj punktoj : starigo de Koncert-Organiza Reto (KOR) tra Eŭropo unue, kiu utilos ne nur por koncertoj sed ankaŭ por varispecaj interŝanĝoj (informoj, distribuado, ktp.). Efektive, jam en Francio, **Marcel Redoulez** el **Bordozo** kreis fonduson SAFT por helpi interalie artistojn kaj organizi ilian turneon tra la lando. Kiam la organizado de koncerto estigas profiton, tiu profito poparte provizas la kason de la fonduso. Se estas deficito, oni tiam ŝtopas ĝin ankaŭ parte per tiu kaso. Tiu rimedo estigas do sekurecon kaj ebligas al espogrupoj organizi koncerton en siaj urboj kaj al espartistoj , kantistoj, muzikistoj, sin lanĉi en turneon. La sistemo bone funkcias en Francio – tie turneis dufoje **Kajto**, **Solo**, kaj **Jak Yvart**, kaj ankaŭ **Jomo** deko da datoj en diversaj urboj kaj foje eĉ du koncertoj en sama urbo. Tutcerte simila reto povus disvastiĝi al tuta Eŭropo.

Ni lanĉas alvokon al ĉiuj interesitoj kaj entuziasmuloj pri espomuziko por ke ili faru proponojn kaj kontaktu EUROKKAn – fakte nur unu kunordigulo en ĉiu lando povas sufiĉi. Tiam laborkunvenoj povos organiziĝi kun la volontuloj por diskuti pri ĉio ĉi, interŝanĝi spertojn kaj informojn, lerni kiel organizi koncertojn respektante la artistojn kaj samtempe la publikon, varbi, starigi espoprogramojn en lokaj radiostacioj, krei strukturon aŭ reton por kunligi la agadojn, ktp. Pri ĉio tio kontaktu nin tuj !

Festivaloj

La sekvanta punkto koncernis festivalojn kaj, unue oni notis ke PREFI (Pop-Rok-Espo-Festivalo Internacia), planita en **Tuluzo** en 1995, fiaskis pro manko de subvencioj. Male la unua FESTO en 1996 en **Liono** estis sukceso (FESTO estas Junulara Espo-Festivalo organizita en Francio de JEFO). Ĝi sukcesis trafi subvencion de OFAJ (Oficejo Franca-Germana por la Junularo). En 1997 FESTO disvolviĝos en **St.-Raphaël** (sudorienta Francio, sur la "Franca Riviero").

Krom tio, la 6a KEF veršajne okazos en **Stokholmo**, Svedio. La junulara kaj arta programoj dum UK 1998 en **Montpellier** promesas esti kulturriĉenhavaj.

Radio

Fine, oni parolis pri la rilatoj inter EUROKKA kaj radiostacioj. EUROKKA kunlaboras kun AERA (Amikaro de Esperanto en RAdio) por diskonigi kaj disaŭdigi espomuzikon tra la tuta mondo. Pri tio notindas ke en **Tuluzo**, instigite de EUROKKA, ekzistas tri espaj radioprogramoj kiuj elsendatas po unu horon ĉiusemajne en **Radio FMR/Radio-Radio**, **Radio Okcitanio**, kaj **Kanalsud'**. (Notindas ke ekzistas *kvara* esp-elsendo, sur **Radio Mon Païs**, sed ĝi okazas ekster EUROKKA.)

Rokan dankon al ĉiuj kunvenintoj kaj legintoj.

Instrumentoj kaj aliaj iloj

de Bertilo WENNERGREN

PARTO 4

perkutinstrumentoj *percussion.* 1 Ĝenerala nomo por ĉiuj instrumentoj, kiujn oni sonorigas per perkuto (frapo), ekz. tamburo, marimbo, cimbalo. 2 Aro de perkutinstrumentoj aliaj ol tiuj en drumo, ludataj de unu perkutinstrumentisto. Vd drumo.

piano *piano.* Granda instrumento kun kordoj, ludata per klavaro. La kordoj de ordinara piano estas vertikalaj (vertikala piano), tiuj de granda, orkestra piano, horizontalaj (horizontala piano).

pirata albumo *bootleg (record).* Albumo eldonita sen permeso de la kopirajtposedanto kaj/aŭ la artisto. Ĝi povas esti aŭ senleĝa kopio de ordinara albumo, aŭ senleĝa registraĵo de koncerto aŭ simile, kiun la artisto ne deziras eldonita.

plato *pad.* Tambursimila, sed plata kaj mem praktike silenta ilo, sur kiun oni batas en elektronika drumo. La plato sensas la batojn, kaj sendas impulsojn al sintezilo, kiu produktas la enprogramitan (perkut)sonon. Vd sintezilo, sampli, trigi.

plektro *plectrum, pick.* Malgranda maldika peco de plasto aŭ alia materialo, uzata por vibrigi la kordojn de gitaro, mandolino, ktp. Kordojn oni do povas plektri, pinĉi, arĉi, frapofingri, aŭ frapopinĉi. Vd fingroplektro.

ponto *bridge.* Tiu elstaraĵo sur la instrumenta korpo (ligna peco a.s.), sur kiu estas streĉitaj la kordoj de kordinstrumento. La ponto de gitaro estas gluita al la korpo, dum tiu de violono estas negluita. Vd selo, kapo.

portebla studio *porta-studio.* Speciala kasedmagnetofono por registrado de memfarita muziko. Havas almenaŭ kvar kanalojn kaj miksilon.

poŝkasedilo *Walkman.* Portebla tre malgranda kasedmagnetofono aŭskultata per kapaŭskultiloj, foje ankaŭ kun radio.

poŝ-k-diskludilo, poŝ-KD-ludilo, poŝ-kompaktadiskludilo *CD Walkman.* Portebla tre malgranda k-diskludilo aŭskultata per kapŭskultiloj. (Poŝ-k-diskludilo estu prononcata : " poŝkodiskludilo ".)

poŝmagnetofono. = poŝkasedilo.

poŝradio *radio Walkman.* Portebla tre malgranda radio aŭskultata per kapaŭskultiloj.

potenciometro *potentiometer, pot.* Regilo funkcianta per variado de impedanco.

prokrastilo *delay unit.* Efektilo, kiu kreas prokraston de la sono. Vd eĥilo, elfazigilo, flangilo, ĥorilo.

radio *radio.* 1 Sendado de sono per elektromagnetaj ondoj (= radiofonio). 2. Ilo por ricevi kaj aŭskulti radian elsendon (= radioaparato, radiofono).

regilo *control.* Aparataj regiloj povas havi diversajn aspektojn. Ili povas esti butonoj, kiuj estas rondaj, kaj kiujn oni turnas (aŭ premas) ; klavoj, kiuj normale estas rektangulaj, kaj kiujn oni premas (aŭ nur tuŝas) ; ŝovregiloj, kiujn oni ŝovas en fendo ; kaj regstangoj, kiuj oni movas diversdirekte. Vd potenciometro.

resonanca skatolo *sound box.* Tiu kava parto de la korpo de akustika instrumento, kiu per resonanco plilaŭtigas la sonon. Vd solidkorpa gitaro.

rulbendo *reel-to-reel tape, open reel.* Tia (granda) magnetofona bendo, kiun oni volvas ĉirkaŭ plastan bobenon, mem manipulante la bendon. Vd kasedo, DAT-maŝino.

rultamburo *snare drum, side drum.* La ĉefa tamburo en drumo. Sur la funda membrano estas zumrisortoj, kiuj helpas krei kontinuan sonon ĉe ruladoj. Devenas de militista drumado kaj marŝorkestroj. Vd bastamburo, tamo.

sakso *sax.* Slanga mallongigo de saksofono.

saksofono *saxophone.* Instrumento, kiu apartenas al la familio de lignaj blovinstrumentoj pro la buŝpeco, sed kiu fakte estas el metalo. Diversaj grandoj de baso ĝis soprano, ĉiuj en kurba formo (krom kelkaj sopranoj). Origine orkestra instrumento, sed nun ĉefe ĵaza kaj popularmuzika.

samplilo *sampler.* Elektronika aparata por sampli sonojn.

sekvencilo *sequencer.* Komputilo por aŭtomate ludigi sintezilon. La sekvencilon oni programas kun la diversaj tonsekvencoj kaj kun la rapido dezirata. Vd MIDI-o.

selo *nut.* Tiu elstaraĵo sur la supro de kordinstrumenta kolo, sur kiu apogiĝas la kordoj, kaj kiu limigas la vibrantan parton de la kordoj. Ordinare kun noĉoj, tra kiuj pasas la kordoj. Vd ponto, kapo.

sintezilo *synthesizer.* Muzika instrumento, kiu kreas sonon elektronike per oscililoj kaj diversaj filtroj. Ordinare ludata per klavaro, sed principe la regilaro por elekti la diversajn tonojn povas esti ajnforma. Ekzemple ekzistas gitarsinteziloj, kiuj uzas gitaron (aŭ gitarsimilan ilon) por elekti la tonojn ludotajn de la sintezilo. Ankaŭ elektronika drumo estas speco de sintezilo. En modernaj sinteziloj multe uziĝas ankaŭ samplitaj, do nesintezitaj, sonoj. Vd altotralasa, bendorifuza, bendotralasa kaj malaltotralasa filtroj, tensiregata oscililo, sampli.

sinto *synth.* Slanga mallongigo de sintezilo.

solgitaro *lead guitar.* Rok- aŭ popbando ofte havas du gitaristojn, unu kiu ĉefe ludas akompanan gitaron, kaj unu kiu ludas ĉefe solojn kaj melodiojn.

solidkorpa gitaro *solid body guitar.* Solidkorpaj gitaroj malhavas resonancan skatolon. Anstataŭe ili havas magnetajn mikrofonojn. Ankaŭ aliaj instrumentoj, kiel ekz. violono, povas esti solidkorpaj. Vd elektra, duonkorpa gitaro.

sonekvilibrilo *sound balance control.* Tiu regilo sur stereofonia amplifilo, per kiu oni regas la relativan laŭtecon de la du kanaloj. Vd panoramilo.

sonkluzo *(sound) gate.* Elektronika aparato, kiu permesas trapason nur de sonoj sufiĉe laŭtaj, tiel forigante parton de la bruo en sonregistrado. Uzata ankaŭ kiel efekto.

sontremigilo *tremolo arm, vibrato.* Stango sur la ponto de elektra gitaro. Manipulante la sontremigilon oni movas la ponton ŝanĝante la tonalton de la kordoj, tremigante la tonojn aŭ eĉ draste malaltigante ilin kiel efekton.

sontruo *soundhole.* Tiu truo en la resonanca skatolo de akustika instrumento, el kiu venas la sono.

spacosonilo *reverb unit.* Ilo por produkti artefaritan spacosonon. Speco de tre rapida sona prokrasto, kiu donas efekton de sono en granda spaco, kiel katedralo aŭ simile. Vd prokrasto, eĥo, flangi, elfazigo.

stativo *stand.* Aranĝo de ekz. vertikala stango kun piedo. Uzata por teni ekz. instrumenton aŭ mikrofonon. ➔ Tamburstativo, ĉarlestona stativo, mikrofonstativo, brakstativo.

ŝaltilo *switch, on-button.* 1 Aparato (aŭ parto de aparato), per kiu oni ŝaltas kaj malŝaltas. 2 La regilo, kiun oni manipulas por ŝalti. Vd ek, komutilo.

ŝtalgitaro *steel guitar.* 1 Mallongigo de pedala ŝtalgitaro. 2 Pli simpla instrumento sen pedalaj kaj stangaj mekanismoj. Vd Havaja gitaro.

ŝtaltamo *steel drum, steel pan.* Trinidad-devena perkutinstrumento farita el oleujo, kaj ludata per kaŭĉukpintaj bastonetoj. Ekzistas en diversaj grandoj, ekz. tenorŝtaltamo (kiu ludas melodiojn), gitarŝtaltamo (por harmonioj), kaj basŝtaltamo.

tamburbastoneto *drum stick.* Bastoneto uzata por ludi tamburojn kaj aliajn perkutinstrumentojn, kiel cimbalojn, bovsonorilojn, ktp. Vd batilo, broso, maleo.

RADIO LOGOJ

Radiadas Bruno MASALA kaj Flo !

Radio estas la plej trafa disvastigilo por espomuziko aktuala – uzu ĝin !

Esportistoj kaj bandoj – sendu viajn espomuzikproduktojn al la esporedaktejoj por dissendado ; skribu al ili por gratuli kaj peti disaŭdigi pli da viaj espomuzikaĵoj por ke tiuj programoj fariĝu espokulturvivoplenaj kaj aktualaj. Espomuzikemuloj, rokuloj, populoj, kanzonuloj, folkuloj, ĉiaj muzikŝtantoj – fariĝu radioaŭskultantoj de tiuj espogrupoj, skribu, fakuu, retpoŝtu al la esporedaktejoj por malkovrigi al ili kaj al iliaj aŭskultantoj viajn ŝatataĵojn espomuzikaĵojn !

OSIEK-AERA

(OSIEK-Amikaro de Espo en Radio) eldonas regule informilon kun ĝisdatigitaj frekvencoj, horaroj, kaj adresoj de ĉiuj espogrupraroj en radio (lokaj FMaj kaj mezondaj radiostacioj, internaciaj kurtondaj kaj satelitaj radiostacioj).

AERA havas ankaŭ TTT-paĝojn : http ://members.aol.com/OSIEK/AERA, kion ni invitas konsulti kaj sendi mesaĝojn al retpoŝto : OSIEK@aol.com. Tie troviĝas plej freŝaj radionovaĵoj kaj konektiĝo kun aliaj radio-TTT-adresoj kaj ankaŭ retpoŝtaj adresoj. Petu informojn ĉe la kunordiganto :

AERA
p/a Bruno MASALA
2 rue des Vignes
FR 57530 COINCY
Francio
Retpoŝto : bruno@ poetic.com
Tel +33 (0)3 87 76 63 94
fakso : +33 (0)3 87 32 03 00

: kaj pri amerikaj radiostacioj :
Marcelo Luiz BRAZIL
Rua Pedro Demeterco, 230
BR 81530-320 CURITIBA – Paraná
Brazilo

La Lasta Horo
estas tuthora espoprogramo okazanta ĉiutunde de la 2300 ĝis 0000 loka horo laŭ frekvenco 1.400 KHz. Informoj kaj espomuzikproduktoj (kasedoj kaj KDoj) bonvenas por diversaj la muzikenhavon. Kontribuoj sendendas al :

Ilmar GOMES FERREIRA kaj Claudio SPINELLI
Kultura Centro por Disvastigo de Esperanto
Rua Tenente Cleto Campelo, 394, Salo 201
BR 21021-020 ILHA DO GOVERNADOR – RJ Brazilo
Tel : +55 393 6969 aŭ +55 393 5252

EESTI RAADIO denove disaŭdigas espoprogramon enhavantan interaliie espomuzikaĵojn ekde la 1-a de julio 1996 ĉiumarde je la 1930 (UT) laŭ frekvenco 5.925 KHz (50,6 m). Gravas provi kapti kaj sendi raportojn pri aŭskulto por sciigi kia estas la kvalito de la aŭdebleco de tiu espoprogramo ricevita en via urbo. Kontakto :

Estona Radio
Esperanto-Fako
EE-0100 TALLINN
Estonio

Esperanto Radio-Kiso
estas nome de espoprogramo en Radio Unerhört (Radio Skandalo) laŭ 90,1 MHz, en Marburg, Germanio. **Maŭro Tauzzi** translokiĝis de Italio al Germanio por realigi speciale tiun radioprogramon (troĝo 1). Pro tio li bezonegas kunlaboradon kun aliaj esporedaktejoj por interŝanĝi espomuzikon, intervjuojn, esponovaĵojn, kasedojn, ktp. Por plaĵ informoj kontaktu lin rekte :

Maŭro TAUZZI
p/a Duhme
Friedensplatz 4
DE 35037 MARBURG
Germanio
Tel : +49 6421 16 26 02

RADIO UNERHÖRT MARBURG helpas en la diskonigo de espomuzikagado disaŭdigante espomuzikaĵojn regule. La esporedaktejo de Radio Havano helpas ankaŭ kubajn esportistojn surbendigi en iliaj radiostudioj. Tiel **Julian'** sukcesis aperigi sufiĉe bonkvalitan albumon sur kasedo (vidu recenzon en ** Malrokmuziko *)*. Imitinda kaj subtenindа agado ! Gratulu, kuraĝigu, kaj petu horaroj kaj frekvencoj al

Radio Havano-Kubo
Esperanto-Redakcio
PF 6240
LA HABANA
Kubo

ORF+

Perloj
La esporedaktejo de Radio Aŭstrio Internacia eldonis broŝuron kiu kompilas la plej elstarajn kaj interesajn disaŭdigitajn programerojn. Perloj estas la titolo de tiu eldonaĵo. Cetere estas planita ke en la venonta eldono de Perloj aperos ankaŭ tekstoj disaŭdigitaj de aliaj esporedaktejoj en aliaj radiostacioj. Por plaĵ informoj kaj abonoj kontaktu :

Prof. Katinjo FETES-TOSEGI
Radio Aŭstria Internacia
Esperanto-Redakcio
AT 1136 WIEN
Aŭstrio
Faks : +43 1 87 878/-4404
(Vidu ankaŭ ĉiekve la retpoŝtadreson.)

ASTRA

Satelitaj espogrupraroj
iom post iom alvenas en niajn domojn je la plej granda plezuro de niaj oreloj. Nun akiro de satelita anteno estas ne tiom kosta (almenaŭ por Eŭropoj) kaj donas eĝe kontentiĝajn rezultojn – la kvalito estas perfekta, kvazaŭ loka FMradio.

Aktuale aŭskultebas espomuziko satelite nur en Pola Radio (Eutelsat II F6 13 E (Hot Bird), 11.474 GHz Hpol, 7,38 MHz trifoje tage, 0630, 1530, 2000 en Mez-Eŭropa Tempo) ; kelktoje (ne ĉiutoje) en Radio Aŭstria Internacia (Astra 19,2 E, 11.141 GHz Hpol, 8,10 MHz per Astra DiGita Radio/ADR), kaj Radio 3ZZZ en Aŭstralio.

adr DIGITAL RADIO 3ZZZ Ankaŭ aliaj espogrupraroj dissendatas per satelito sed sen espomuziko : temas pri Vatikana Radio (dimanĉe 2020 UT, Eutelsat II F1 13 E, 10.987GHz, Vpol (NBC), 7,38 MHz), kaj World Radio Network (Astra 19,2 E, 11.538 GHz Vpol, 7,38 MHz). Detalaj informoj haveblas ĉe :

WRN Director Karl MIOSGA
Wyvil Road
LONDON SW8 2TG
Britio
TTT-paĝo : //www.wrn.org/
(Skribu angle aŭ io simile.)

Skribu al Budapeŝto
Dum la jus pasintaj monatoj, la demando pri reenkonduko de espo ĉe Hungara Radio (sed ĉiteje per la internacia stacio) estis pridiskutita de tiu institucio. Sajnas ke ekzistas bona ŝanco je tio. Nu, Hungara Radio havas pluraju kurtondojn tre bone kapteblajn, kaj en Eŭropo elsendas ankaŭ persatelite. En Budapeŝto ne mankas kapablaj homoj por produkti bonajn elsendojn al eksterlando. Se vi emas kuraĝigi la aferon, skribu al :

S-ro Antal RÉGER
Direktoro de la Eksteraj Elsendoj
Radio Budapest
Bródy Sándor u. 5-7
HU 1800 BUDAPEST
Hungario
Tel : +36 1 138 7339
Faks : +36 1 138 8838

Prefere skribu en unu el la nacilingvoj dissendataj – hungare, germane, angle, ruse, ukraine, kroate, rumane, slovake, aŭ serbe. Indas skribi ankaŭ al via landa ambasadoro de Hungario, kun peto ke li transsendu la mesaĝon al la stacio.

Itala Radio satelite
Post preskaŭ dujara atendo eblas finfine ĝui la perfektan persatelitan aŭdkvaliton por RAI Internacio en Eŭropo. Ĉiusabate, de 2000 ĝis 2020 UT (t.e. 2100 laŭ Mez-Eŭropa Tempo), aldone al la du kurtondoj (7180, 9755 KHz), kaptu per Eutelsat 13E (Hot Bird 1), 11.446 GHz Vpol, 7,56 MHz. Bonvolu nepre raporti al la stacio :

RAI Internacio
Esperanto-Redakcio
C P. 320 Centro Cor
IT 00100 ROMA
Italio
Fakso : +39 6 331 71 895

HOT BIRD EUTELSAT : Tutfaste la esporedaktejo de RAI Internacio lanĉis jenan gravan mesaĝon direktitan al la aziaj espistoj :
" RAI Internacia krom dissendado per satelito EUTELSAT Hot Bird por Eŭropo, dissendas ankaŭ per satelito AsiaSat, kiu direktiĝas al Azio ; sed la espelsendo ankoraŭ ne surondiĝas per tiu satelito. Tamen la ebleco povas esti pristudita se venas regule sufiĉe nombraj petoj de espistoj el Azio. " (Krom espe, skribu itale, france, aŭ angle.)

: Gravas kontakti ankaŭ jenan radiostacion kiu facile povus elsendi siajn espoprogramojn per satelito, ĉar ili jam havas ĉiliingvajn disaŭdigatajn, kaj tiel dissendi ankaŭ espomuziko. Skribu al ili, reskribu, kaj insistu ĝis vi ricevos pozitivan respondon al :

China Radio Internacio
Direktoro de la
Programoj
ĈN 100866 BEIJING
Ĉinio
Faks : +86 10 851
3175/ -1428

CRI

Informas la bulteno de UKS *Inter ni*
De pluraj monatoj la espokluboj La Espero en Malagasio provas starigi esporadion per mallongaj ondoj por atingi la tutan landon kaj Afrikon. Pluraj provoj estis faritaj per FM, sed la disaŭdigaĵoj aŭdeblis nur en la ĉirkaŭaĵoj. Por sukcesi tiun celon estas bezonata akiri taŭgan materialon, pro tio estas petata helpo de espistoj. AERA estas regule informita pri la evoluo de la situacio. Registraĵoj sur kasedoj estas ege bezonataj kun muziko, intervjuoj, registraĵoj persatelitaj espoprogramoj (Pola Radio, RAI, ORF, ktp.). Por plaĵ informoj kaj pri la bezonoj kontaktu la respondeculinon de la projekto :

Esperanto-Radio Malagasio
f-ino Julie ANDRIATSARAFARA
Lot. II. N 56 bis (1er étage)
Analamahitsy Tanàna
MG-101 ANTANANARIVO
Malagasio

EUTELSAT

Radio kaj Reto

Multegaj esporedaktejoj atingeblas nun retpoŝte aŭ vizitendas ĉe siaj hejmpaĝoj ĉe TTT. Provu ilin kaj muzikemigu ilin :

Pola Radio, Esperanto-Redakcio : pettyn@ radio.com.pl
Radio Aŭstria International, Esperanto-Redakcio : info@ rai.ping.at
Radio Habana Cuba, Esperanto-Redakcio : radiohc@ tinored.cu
Radio Vatacana, Esperanto-Redakcio : mc6778@ mclink.it
Narradio Västerås, Svedio, Esperanto-Redakcio : wimp@ quicknet.se
Radio FMR, Radio-Radio, Esperanto-Magazino : fmr891@ mail.starway.tm.fr
Radio Kanalsud', Esperanto-Magazino : canalsud@ worldnet.fr.
Radio Okcitanio, Esperanto-Magazino : ocradio@ cict.fr
Radio BRUME Horizon (Chronique Esperanto) : brume@ brume.org.
Narradio Malmö - Esperanto : sten.svenonius@ mailbox.swipnet.se.

CANAL SUD
POLSKIE RADIO 5
RADIO FMR 89.1 MHz
RADIO OCCITANIA FM 98.3 MHz

TTT-paĝoj :

Narradio Västerås, Svedio, Esperanto-Redakcio : http ://www.quicknet.se/ftp/dialup/q-111060/radioe.htm
Pola Radio, Esperanto-Redakcio : http ://ourworld.compuserve.com/homepages/simono/polrad.htm
Radio FMR, Radio-Radio, Esperanto-Magazino : http ://www.starway.tm.fr/fmr/gespero.htm
http ://www.starway.tm.fr/fmr/esperant/index.htm
Radio Kanalsud', Esperanto-Magazino : http ://www.worldnet.fr/~canalsud/esperanto.html
Radio Okcitanio, Esperanto-Magazino : http ://www.sv.cict.fr/radio-occitania/emis/esperant.htm
Radio Österreich International, Esperanto-Redakcio : http ://www.orf.at/rai/es/es_home.htm
World Radio Network : http ://www.wrn.org/welcome.html

HaSTe-Klaĉe

Rok-Reto-Anoncoj

Jomart kaj Nataša

Okazis granda ŝanĝiĝo en la vivo de niaj kazakaj trobadoroj Jomart kaj Nataša : ili geptatriĝis fine de 1995. Jes ja, unu jaro pasis por ilia filineto Karina, sed ĉiam bondeziroj ĝojigas la vivon. Nova adreso :

Jomart AMZEEV, Nataša GERLAFI, & Karina
p/a Sundström F.
Elinsborgsbacken 27 N-B
SE 16364 SPÅNGA
Svedio
Tel : +46 8 760 41 55

Tilio

Nova alternativulo kaj espereble rokemulo naskiĝis la 23an de decembro 95. Temas pri **Tilio**. Li tre frue jam organizis kun siaj gepatroj espokongreson de SAT-Amikaro en Limoges (Francio) dum pasko 97. Petu de li informojn pri tiu kongreso, kiu prezentis interesan kulturprogramon sed bedaŭrinde ne esporokmuzikon ! Kontakto :

Tilio
Isabelle & Pierre
JACOB-COGNARD
Pomarbo
FR 87200 SAINT-BRICE
Francio
Tel : +33 05 55 03 54 76

Atentu ! Atentu !

La kontaktadreso de la espomuzikgrupo **Kajto** ŝanĝiĝis ekde marto 1996. Nutu bone la novan :

Kajto
p/a Ankie VAN DER MEER
Dr. Siebingasingel 37
NL 9218 PV OPEINDE (Fr.)
Nederlando
Tel : +31 512 37 29 37

Börje Lund

La ekskantisto kaj gitaristo de **Persone** ankoraŭ ne forjetis en rubujon sian gitaron dum la devana translokiĝo. Ŝajnas ke li ankoraŭ ne havas planojn pri starigo de espobando – tamen, kiu scias ? Demandu lin rekte :

Börje Lund
Östra Kyrkogatan 91
SE 593 33 VÄSTERVIK
Svedio

Per Ola

La eks-**Persone**- kaj **Amplifiki**-ano patriĝis kaj eĉ edziĝis (kun **Betina**). Sed ĉu tio estas kialo por forlasi espomuzikon ? Instigu lin starigi espomuzikbandon :

Per Ola FEUERSTEIN (Axelsson)
Tobaksvägen 22, 2tr.
SE 123 57 FARSTA
Tel : +46 8 604 74 32
portebla tel : +46 0103 32 67 99

Atenton, atenton !

La adreso de **Nanne Kalma**, la unununra viro de la espofolkbando **Kajto**, ŝanĝiĝis. Nun li atendas viajn mesaĝojn, bondezirojn, gratulojn, kaj invitproponojn ĉe jena adreso :

Nanne KALMA
Kolfbaan 100
NL 9251 AD BURGUM
Nederlando
Tel : +31 512 37 29 37

La Viskiosaŭroj

Tio estas la nomo de portugala rokbando kiu kantis siatempe en espo. La bando fondiĝis en 1991 kaj konsistas el : **Pedro Duarte** (klavaroj, gitaro, perkutilaroj, voĉo) ; **Miguel Castro** (voĉo, komponado, verkado) ; **Benedita Barros** (saksofono). La triopo konatiĝis en la lisbona sciencfakultato, kie ili studis, kunigis siajn muzikajn lertojn kaj spertojn, kaj komencis provludi kune.Ili prezentiĝis en kelkaj studentaj festoj kun aliulaj kaj propraj kantoj. La bando apartiĝis iom poste kaj disiĝis en 1993. Al Espujo ilin varbis komuna kolego kaj amiko (aŭtoro de tiu ĉi artikoleto), kiu tradukis por provludo unu el iliaj originalaj kantoj (" Nur per kokaino "). Bedaŭrinde la disfalo de la **Viskiosaŭroj** ne ebligis plian espaktivadon de tiu ĉi bando, kies biografio tuŝas nur tute rande la movadon de espa rokmuziko.

raportas Antonio Martins

Ido ?

pro quo ne ?

Nia redakcio ricevis gratulleteron de Germana Ido-Societo por la aperigo de la 2a volumo de *Vinilkosmo-Kompil'*. La sendinto, kiu cetere skribas en bona espo, diras interalie : "*Sen aldona kantbrošureto mi estus opiniinta ke eble estas portugala aŭ alia lingvo... ĉar neniun vorton komprenis. Sed kiel idoscianto, mi iomete preferas ne kompreni la vortojn, ĉar malplaĉas al mi aŭdi (kaj paroli) espon, ĉar por mi estas malbela lingvo.*"

Antonio Mattozzi

volas starigi espomuzikgrupon, kaj al li bonvenas helpo kaj konsiloj. Li estas provincrespondeculo de nova ekologia asocio (*Guardia dell' Ambiente*) bazita sur alternativa kulturo. Tiu ekologia asocio decidis uzi espon kiel laborlingvon ĉar laŭ li tiaj ideoj ne povus vivi en malvastaj naciaj limoj. Per muzikgrupo kiu kantas espe pri la natura medio kaj beleco de harmonia kunvivado, viva muziko, ktp., **Antonio** volas ĝojigi la homojn. Kiuj pretas subteni kaj iel helpi, kontaktu :

Antonio MATTOZZI
Via Luigi Valdieri 147
IT 80128 NAPOLI
Italio

La Mondanoj

En la tekstkajero de *Vinilkosmo-Kompil'* Vol. 1 estas meciita ke la bando la **Mondanoj** postlasis nur tiun solan registrajon aperintan en la kompilaĵo. **László Szilvási** (redaktisto de *Eventoj*) ekmemoris ke en 1985 la Junulara Espo-Renkonto JER en la urbo Mezokövesd, la **Mondanoj** faris unuafoje vivan koncerton. Bonŝance tiam **László** zorgis, ankaŭ interalie, pri surbendigo, kaj feliĉe li konservis tiun kasedon. Do ekzistas ne nur unukanto, sed surbendigo de tuta koncerto de la **Mondanoj**. Tiuj kiuj deziras pli da detaloj aŭ havi kopion de tiu surbendigajo nesurmerkatigita (ne sufiĉe kvalita tiucele) povas rekte peti al :

László SZILVÁSI
Pk 87
HU 1675 BUDAPEST
Hungario

Duncan Thomson

kreis espomuzikan TTT-paĝon, kie troviĝas informoj interesaj ĝisdatigataj. Konsultu ĝin :
http://www.medc.paisley.ac.uk/~duncan/eo/muziko/

La Flugantaj Bananoj

Repbando la **Flugantaj Bananoj** fondiĝis. Multaj gejunuloj spektis ĝin dum IS kaj IJK. Ili kantis en Freiburg, kaj venonjare ili volas koncerti kun drumist(in)o. Informoj haveblas ĉe :

Jan SCHRÖDER
Meller Bogen 11
DE 13403 BERLIN
Germanio
Tel : +49 304 135 304
(Legu intervjuon en "*Rok- kaj Pop-bandoj* ")

Zamenhofaj Kondomoj

En pasinta 7a ***ROK-gazet'*** en "*Haste-Klaĉe* " , ni alvokis por scii ĉu iu povus informi nin pli detale pri disko kiu aperis en Belgio kun jenaj indikoj : " **Zamenhof** : *Surmetu vian kondomon, kamarado !*" **Jorge Camacho** faris enketon kaj aperigis jenan informon en la revuo *Esperanto* n-ro 1070 (majo 95) je paĝo 99 : "***Zamenhof** pri aidoso : Ĉi tiu juna brusela duopo de repkantistoj nomiĝas **Zamenhof** kaj batalas per sia muziko kontraŭ aidoso.* " Krome, **Jorge** aparte donas klarigon pri la muzikstilo : "***Repo** : sinkopa muzikstilo, karakterizita de rapida rima parolado.* "

La bando **Zamenhof** aperigis disketon (*single*) kun titolo *Mets ta capote, mon pote* (Surmetu vian kondomon, kamarado), kaj produktis toĉemizon kun la kovrilo de la disketo. Jen do la mistero senvualigita – ĉu vi bone ricevis la mesaĝon ? Eble en venonta numero iu sendos al ni la adreson de **Zamenhof**, kaj indikos ĉu la bando scipovas espon, kaj kial ili elektis tiun nomon ?

Aleksandr Fjodorov

surbendigis demokasedon dektitolan kiu enhavas plejparte popkanzonojn kun blusrokaj influoj. **Aleksandr** kantas, aranĝas kaj komponas. Tradukas en espon el la rusa **Eŭgeno Ĥabarov**. En la malmultaj informoj kiujn ni ricevis kun la demo, neniu indiko aperas pri la muzikistoj kiuj akompanas lin (gitaro, basgitaro, drumo, kaj klavaroj). El tiu demo malmergiĝas relative bonaj tekstoj, la kantado laŭ la muzikaĵoj estas malegala (foje ne sufiĉe ĝusta) ; el la muzikaĵoj kio plej elstaras estas tre bonaj gitarsoloj kiuj viglIĝas iomete la tuton. **Aleksandr** pretas koncerti ĉie ajn. Li atendas ke vi invitu lin, li postulas minimume la repagon de la vojaĝkostoj kaj restado. Petu de li demokasedon, sed eble intertempe li estos eldoninta albumon kasede aŭ diske – informiĝu ĉe li :

Aleksandr Fjodorov
ul. Kombajnostroitelej 3A-11
RU 660048 KRASNOJARSK
Rusio

Bardhyl Mezini

tradukis el ***ROK-gazet'*** n-ro 7 artikolojn kiu aperis en la albana periodaĵo *Bashkimi*, inter ili la alvokon por bojkoti ŝaŭismajn rokbandojn. Interesajn artikolojn li pretas traduki kaj transdoni al tiu gazeto. Kontakto :

Bardhyl MEZINI
Rr. Maliq Muço P 50 A3
TIRANA
Albanio

Familio Berce

Atentu al ĉiuj amikoj de muzika **Familio Berce** : ilia adreso ŝanĝiĝis. Eblas skribi, telefoni, aŭ faksi al ili ĉe tiu nova kontaktadreso :
Andreo & Natalia BERTSE
Lupinvägen 72
SE 185 41 VAXHOLM
Svedio
Tel/faks : +46 8 54 13 63 54

Ĉu vi memoras

pri **Aline Boulet**, eks-**Amplifiki**-anino, kaj **Zara Boukortt**, eks-**Shifters**-ano ? Ili havas knabon **Sami**, kaj la 2an de aprilo 96 naskiĝis ilia dua knabo, nome **Elias**. Ek de tiam la programo daŭras tage kaj nokte ! Baldaŭ surscenejiĝos roka kvaropa familio. Vi povas jam mendi ilin :



Aline, Zara, Sami, Elias BOULET-BOUKORTT
30 rue du Plateau
FR 75019 PARIS
Francio
Tel : +33 1 42 08 81 45

La freneza biciklanto

alportis grandan frapon en la espomovadon : li forlasis biciklon por bebdorloti **Jasminon**, kiu naskiĝis la 4an de majo 1996. Certe jen nova membro por BEMI. Same kiel la esporokmovado, paralele la bicikla espomovado kreskas ! Biciklajn proponojn kaj invitojn por bicikla karavantrairo de via urbo sendu al :
Jorgos, Jani, Rafael' kaj Jasmin' COMTE-ETESSE
7 rue de l'Espéranto
FR 09120 SAINT FÉLIX DE RIEUTORT
Francio
Tel : +33 5 61 60 86 83

Tropa Colors

Joni (" Goni "), eksbasgitaristo de **Pixamandárries**, starigis novan rokbandon en Barcelono, la **Tropa Colors** . **Joni** estas liberecano, pro tio li lernas espon kaj volas kanti kelkajn kantojn tiulingve. Kiam la bando surbendigos albumon, li planas aperigi en ĝi espotitolon. Informoj kaj subtenleteroj sendendas al :
Joni SAHUN
carrer Parlament 52, 1°, 2a
ES 08015 Barcelona
Katalunio, Hispanio
Tel : +34 3 442 38 82
faks : +34 3 423 85 55

KD *Esperanto* sen espo

Nova KD de itala kantisto titoliĝas *Esperanto*. Ĉiuj kantoj tamen estas itallingvaj, nek iu el ili mencias la lingvon espo, nek iu titolo de kanto mencias ĝin. Laŭ televida intervjuo spektita de nia raportisto, la itala artisto elektis la titolon *Esperanto* ĉar li ŝatis la ideon de monda harmonio, monda miksaĵo, monda vilaĝo kaj en la disko miksiĝas pluraj muzikstiloj, same kiel en espo miksiĝas pluraj lingvoj. Jen la datumoj : kantisto : **Rosario DI BELLA** ; disko : *Esperanto* ; diskeldonejo : Polygram Italia Srl. ; kodo : 528 562-2. La sama albumo ekzistas ankaŭ sonkasede.

– Laŭ informo de Giuseppe Castelli el artikolo en Eventoj n-ro 92, 2.12.95

Alberta Casey

pri kiu vi jam certe legis en rubriko "*Malrokmuziko*", translokiĝis, kaj ni sciigas al ĉiuj ŝiaj fanoj ke la malnova ne plu validas. Bonvolu noti ŝian novan :
Alberta CASEY
PO Box 303
WARNER SPRINGS, CA
92086
Usono

Brazila kunlaboranto

Julio CALEGARI farigas unu el niaj nemalhaveblaj kunlaborantoj en Sud-Ameriko. Li ne nur artikolas por ***ROK-gazet'*** (vidu en rubriko "*Muzikmonado* "), sed ankaŭ espe basgitaras kun bandoj en San-Paŭlo. Li bone konas la rokscenejon de sia lando.
Kontaktu lin :
Julio CALEGARI
CP 60084
BR 05096-970 SÃO PAULO - SP
Brazilo
e-poŝto >> turismo.asterix.anhembi.br
(kun indiko " Letero por Julio ")

Entzun !

estas eŭska rokfanzino tutkolora kiu prezentas eŭskajn rokbandojn kaj roknovajojn. La tuto estas verkita en la eŭska lingvo. Vera kuroziaĵo por rokuloj interesiĝantaj pri tiu lingvo kaj ties kulturo !
Kontakto :
Entzun !
Eŭskarazko
Musika Aldizkaria
Bizkaia 10, 5D
ES 20400 TOLOSA (Gipuzkoa)
Eŭskio, Hispanio

Juna esprokulino

Ŝi laboregas kaj strebas por kanti en espo en la bando Pač & **la Titanoj**, kaj bonvenigas muzik- kaj kant-spertojn. Kuraĝigojn ĉiam varmigas la koron eĉ de gerokuloj. Plijaĵn informojn pri la bando vi povos peti al :
Hélène HOUGUET
65 rue de Toutes Aides
FR 44600 ST.-NAZAIRE
Francio

Adelajdo

UK en Adelajdo, Aŭstralio, okazos de la 19a ĝis la 26a de julio 1997. En la Loka Kongresa Komitato aktive agadas naŭ geamikoj subtenantoj de Eurokka kaj ***ROK-gazet'***.
Kvankam ili estas tre okupataj pro la organizado, ili pretos doni al vi detalajn informojn pri la artaj aranĝoj de tiu 82a UK :
Max WEARING
30 Westbury Street
HACKNEY, SA 5069
Aŭstralio
tel. +61 8 362 53 38
faks +61 8 231 29 90
kaj/aŭ
Margaret FURNESS
PO Box 2605
KENT TOWN, SA 5071
Aŭstralio

Montpellier

La 83a Universala Kongreso okazos en Montpellier, kore de Okcitanio, de la 1-a ĝis la 8a de aŭgusto 1998. Ĝi promesas esti speciale elstara kultura kongreso (espa kaj okcitana), kaj la junularo havos grandan programon. Estos interesaj kaj kvalitaj muzikokazaĵoj !

Eurokka aktive partoprenos tiun UKon, kun interaliĝ Flo !, kiu respondecos pri la artaj aranĝoj.

Carlos Alberto

estas 26jara, ŝategas rokmuzikon, kaj deziras havi kontaktojn kun geespistoj kiuj aŭskultas ĉi tiun muzikon, por interŝanĝi impresojn, ĵinojn, novaĵojn, informojn, ktp., por rompi la izolitecon en kiu li estas en tiu lando. Kontaktu lin :
Carlos Alberto CARDOSO
calle Villamil Edif I apto 5
p/a Narziso López y Avellaneda
CU 67210 MORÓN C. DE AVILA
KUBO

Norberto Díaz Guevara

estas la redaktisto de *Jajabo*, kuba bulteno de la urbo Sancti Spíritus. Li aktive diskonigas la agadon de EUROKKA en la historia centro de la lando (kvar provincoj). Pro malfacilaĵoj kiujn vi povas imagi en la lando, li ne povas akiri muzikproduktojn. Tiuj kiuj estos senditaj al li, estos larĝe diskonigataj en tiu regiono. Adreso :
Norberto DíAZ GUEVARA
Jajabo
Apartado postal 77
CU 60200 SANCTI SPíRITUS 2
Kubo

Rubén T. Diaconu

estas la redaktisto de *Fenikso en Ameriko*, li subtenas kaj disvastigas espomuzikon kaj ankaŭ la agadon de EUROKKA. Adreso :
Rubén T. DIACONU
119 y 122
AR 3700 P.R. SÁENZ PEÑA, Cho.
Agentino

Yanic Viau

esporokemulo en Kanado, vizitadis Tuluzon dum unu jaro por studi, denove li hejmas. Por rokumi espe en Montrealo kontaktu lin :
Yanic VIAU
317 rue Beau Bien est
MONTRÉAL, Québec H2S 1R9
Kanado

Sergej Tarasevič

estas eksgitaristo de **Pičismo**, ŝajnas ke nun li ankoraŭ ne trovis alian bandon. Li lernas espon kaj ŝatus korespondi kaj interŝanĝi muzikajojn. Li antaŭĝojas legi vin. Adreso :
Sergej TARASEVIČ
Jiljposjolok, d2, kv 87
UA 326520 CJURUPINSK, Ĥersonskaja obl.
Ukraino

Jean-Claude MANUEL

estas rokulo – li lernas espon de kvin monatoj. kaj interesiĝas pri esporokmuziko kiun li ĵus malkovris. Kontakto :
Jean-Claude Manuel
14 rue Cabrel, Bt. D
FR 30400 Villeneuve les Avignon
Francio

Liberecana Espo-Grupo

De kiam Liberecana Espo-Grupo ekstartis en Tuluzo fine de 1996, diverslandaj espanarkirokuloj sciigis pri sia ekzisto, ekz. **Araukana**, **Pičismo**, **Klingo**, **Parental Advisory**....
Samkiel diversaj aliaj liberecanaj grupoj kiuj utiligas espon por internaciaj rilatoj, ekz. CNT, Ibera Liberecana Espo-Grupo, Liberecana Espo-Junularo, Liberecana Frakcio de SAT..., la grupo de Tuluzo ekde la komenco klopodas interrilati kun la aliaj.
Espanarkirokbandoj kaj liberecanaj espoparolantoj estas invititaj kontakti :
Liberecana Esperanto-Grupo
p/a Canal Sud
40 rue Alfred Duméril
FR 34000 TOULOUSE
Francio
faks. +33 5 61 25 95 43
retpoŝte >> canalsud@ worlnet.fr >>





Plej freŝaj produktaĵoj en la katalogo ! Petu ĝin ...

ABONU !

ROK-gazet' - ABONILO

EUROKKA Esperanto-Rok-Asocio
F-31450 DONNEVILLE
Francio
Tel / Faks : +33 5 61 81 95 65

Abono kostas 100 FRF, 35 NLG, 21 IRK aŭ16 EKU (20 NLG aŭ 12 IRK aŭ egalvaloro por netranspagpovulo) kaj validas por 4 numeroj.

Familia Nomo : .....
Persona Nomo : .....
Asocio : .....
Adreso : .....
.....
.....
.....
.....
Tel / Faks : .....

Dato kaj Subscribo :

- ❑ Mi deziras aboni ekde n-ro :
- ❑ Mi deziras recivi la n-rojn : 1❑ 2❑ 3❑ 4❑ 5❑ 6❑ 7❑ 8❑ (po 25 FRF, 8.75 NLG, 5 IRK)
- ❑ Mi deziras reaboni ROK-gazet' on.
- ❑ Mi sendas 100 FRF per ĉeko aŭ poŝtmandato (nur por Francio).
- ❑ Mi sendas 35 NLG aŭ egalvaloron per internacia poŝtmandato al EUROKKA.
- ❑ Mi sendas 35 NLG per UEA-konto al EUROKKA (UEA-kontkodo : rokk-b).
- ❑ Mi sendas 20 NLG por netranspagpovuloj al peranto de ROK - gazet' aŭ la esp asocio de mia lando.
- ❑ Mi sendas 21 IRK (internaciajn respondkouponojn) aŭ ? IRK netranspagpovuloj al EUROKKA.

Presojo : SACCO 10 rue Gazagne 31300 Toulouse FRANCIO Tel : +33 5 61 42 03 30 Faks : +33 5 61 59 43 06